

# ***Beletra Edeno***

**neregula beletra bit-revuo n-ro 14 (marto 2025)**

---



Ĉiuj kontribuoj estas bonvenaj.

Redaktis Vejdo (vejdo@163.com)

**Kontribuis** James Bridge, Jin Guang, Evgeny Khvalkov, Liu Wanli, Han Bing, Fangfang, Bardhyl Selimi, Leming Lin, Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser, Detlef Karthaus, Guozhu, Kanglong, Soneto, Viktoro Li, Sergei Isakov, Vejdo, Mikaelo Bronŝtejn, Rita Mkrťĉjan, Marzena Wawrziczkowa, Laimundas Abromas, Elena Popova, Rovere Emanuele, Minosun, Ardo, Alessandra Madella, John Huang

AI-ilustris John Huang, karikatur-esperantigis Paula Ad úriz

---

# Enhavo

---

## Originala prozo

James Bridge: Instru-kunsido.....	003
Jin Guang: Kancero.....	006
Evgeny Khvalkov: Agrabla vorto estas agrabla al trolo.....	008
Liu Wanli: Enamiĝo de lupo.....	016
Han Bing: Patrino amo.....	018

## Tradukita prozo

Zhu Hongshun: La homo, kiu savis la lunon (trad. Fangfang).....	020
Iljet Aliĉka: Konfesoj de poeto (trad. Bardhyl Selimi).....	023
Guy de Maupassant: Du amikoj (trad. Leming Lin).....	028
Fratoj Grimm: Enigmo k.a. (trad. Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser).....	034
Pearl S. Buck: Vento orienta—Vento okcidenta (1) (trad. Detlef Karthaus)..	041
Chen Xuanyou: Animo disiĝanta de la korpo (trad. Guozhu).....	054
Anonimulo: Kantvoĉo (trad. Kanglong).....	056
Anonimulo: Du almozuloj (trad. Soneto).....	057
Song Guoren: Letero el Dio (trad. Viktoro Li).....	059
Maksim Boĉkarev: Jaga (1) (trad. Sergei Isakov).....	062
Chiung Yao: En profunda korto (14) (trad. Vejdo).....	080

## Originala poezio

Mikaelo Bronŝtejn: Meditado k.a.....	088
Rita Mkrťĉjan: Mi memoras, kiu min instruis.....	091
Marzena Wawrziczko: triado k.a.....	092
Laimundas Abromas: Filino de diablo.....	096
Elena Popova: Ĉielarko por li k.a.....	098
Vejdo: Ankaŭ vi estas lupo k.a.....	099

## Tradukita poezio

Rovere Emanuele: Kisoj k.a.....	106
---------------------------------	-----

---

---

Du Mu: La printempo sude de la rivero Jangzio (trad. Minosun, Vejo, Ardo) 111

### Artikolo kaj Eseo

Alessandra Madella: Intervjuo kun Ĵenja Amis pri la teatraĵo “1910”.... 115

John Huang: Turisma vojaĝo tra Tanzanio (5)..... 122

---



**John Huang**, prezidanto de internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF) nordamerika, ĉefredaktoro de la revuo "La Merkato", estas ĉina-kanada esperantisto kaj komercisto. Li estas la oficiala fotisto por tri sinsekvaj Universalaj Kongresoj en 2022, 2023 kaj 2024. Li esperantistiĝis jam en la 1980-aj jaroj kaj aktive partoprenis en multaj Esperanto-agadoj en la sekvaj jardekoj.



Karikaturoj esperantigitaj de **Paula Adúriz** (Hispanio)

---

Foto sur la kovrilo: pejzaĝo de Venecio, Italio (fotita de John Huang)



## James Bridge (Kanado)



### Instru-kunsido

Megano ridetas kaj kunfrapas la manojn, “Tio estas bonega demando, Brandono! Tio, kion vi preparolas, nomiĝas ‘revado.’” Ŝi piediras la ĉeflokton de la kunsidtablego kie la tuta kunveninta laborantaro povas

*aŭtoro, James Bridge*

vidi ŝin. Ŝi atendas momenton kaj daŭrigas, “Same kiel estas trudemaj pensoj, revado estas fantazia aŭ nekutima en la menso de la elsendanto, sed malsame kiel estas revado, trudema penso estas daŭrigata ripetigo kiu longete okazadas. Ĉu tio respondas vian demandon?”

Brandono malfermas sian kajeron kaj rapide trafolumas kelkajn paĝojn da notoj, sed skuas la kapon nee. “Kial homoj revas? Mi kredis ke ili faris tion nur nokte.”

“Jes, tamen necesas memori ke homoj havas du vortojn por priskribi la elsendadon depende de la fizika stato de la elsendanto.” Megano plu klarigas, “Elsendoj de dormanta homo nomiĝas ‘sonĝoj,’ dum la elsendoj de maldormanta homo nomiĝas ‘revoj.’ Ĉu tio respondas vian demandon?”

Brandono hezitas momenton antaŭ ol respondi, “Mi supozas ke jes, sed kiucele laŭdas ĉi tiu... revato?”

“Atentu la konsonanton.” Megano levas la manojn ĝis la buŝo por emfazi la formon de la lipoj, kaj malrapide eldiras, “Revado.” Brandono pasigas momenton silente ripetante la vorton al si mem. “Koncerne la alian demandon,” Megano klarigas, “La vera celo estas neklara. La malplimulto da esploristoj kredas ke revado estas maniero por toleri nepreferatan realon, sed la plimulto konsentas ke homoj prilaboris tiun ĉi povon kiel manieron de mensa masturbado.”

La dungitaro kune gapas, kaj iu ĉe la maldekstra flanko de la kunsidtableto protestas, “Ĉu vi permesas al ili fari ĉi tion en la laborloko?”

Megano metas iun manon sur la brusto kaj profunde enspiras antaŭ ol respondi. “Mi aŭdas vin, Roberto, kaj mi komprenas viajn sentojn – ankaŭ mi estintece sentis same – sed vi devas memori ne nur ke homoj ne kapablas ne revii, sed en tiu speco tio ĉi efektive okazas malantaŭ fermita pordo.”

Alia laboranto ĉe la dekstra flanko de la kunsidtablego konsternite ekkrias, “Tio ĉi estas maljusta, kial ankaŭ la homoj ne devas partopreni ĉi tiujn lecionojn?”

Megano afable kapjesas kaj piediras ĉirkaŭ la maldekstran flankon de la kunsidtablego, kaj tenas la manojn antaŭ si dum ŝi daŭrigas, “Dankon pro tio ke vi kunhavigis viajn sentojn, Jesiko. Multe da ni same sentas! Pro la manko de post-antaŭa lobo, homaj mensoj estas mirige reagemaj.” Megano haltas kaj fingromontras la malplenan seĝon ĉe la fino de la kunsidtablego, alparolante la kunvenintojn, “Se homo estus inter ni, ĉu vi scias kio okazus se mi demandus, ‘Ĉu vi vidis la verdan elefanton?’”

Jesiko firidetas, “La homo ekimagus verdan elefanton.”

“Tute prave, Jesiko!” Megano vaste ridetas kaj kelkfoje aplaŭdas antaŭ ol daŭrigi, “Estas ridinde, sed eĉ kvankam la homo denaske scias ke verdaj elefantoj ne ekzistas, kaj kompreneble scias ke iu neniel povus aperi en ĉi tiu esplorŝipego, la homo tuj nevole ekimagus verdan elefanton.”

La tuta laborantaro ekridegas, dum unuj tiras al si la vizaĝan haŭton por imiti la formon de homaj okuloj kaj aliaj kunpuŝas la vangojn por peni formi homan buŝon. Megano spektas la elmontron dum momento kaj atendas ĝian finiĝon. Ŝi admonas la laborantojn, “Mi scias ke ĉiu el vi opinias ĉi tion amuza, sed tio ne estas la fino de la afero. La homa menso simple pluimagos. Eĉ se la homo aktive penas subpremi la pens-ripetiĝon, li nevole imagados elefantojn ĉiugrandajn kaj ĉiukolorajn eble dum horoj post kiam oni starigis al li la unuan demandon...”

Ambaŭflanke de la kunsidtablego, Roberto kaj Jesiko ŝerce etendas iun el siaj brakoj kiel rostron, ĝeneme trumpetantaj dum la resto de la kunvenintoj daŭre ridegas. La ridado daŭras momenton ĝis kiam ĉiuj konscias ke Megano ankoraŭ staras ĉe la ĉefloko de la kunsidtablego kun la brakoj krucitaj sur la brusto kaj granda vemieno sur la vizaĝo.

“... kaj iam poste la revadon penetros trudema penso,” Megano klarigas, dum ŝi malkrucas la brakojn kaj iras la alian finon de la kunsidtablego kie ŝi haltas kaj fiksrigardas ĉiun unu post la alia. Ŝi demandas ilin, “Kiom granda estas la rostro de elefanto, kaj kiom da ĝi povus elefanto puŝegi en la anuson de Brandono? Ĉu ne estus amuze se la elefanto distiris la brakojn kaj krurojn de Jesiko? Ho ĉielon, Roberto tiel multe ĝenis min per tiu stulta demando pri elefantoj, mi scivolas ĉu mi povus facile detiri de li la digest-membranon?”

La laborantaro malsuprenrigardas al la kunsidtablego ne sciante kiel respondi. Roberto ŝajnigas trafoliumi siajn notojn, dum Jesiko studas sian skribplumon. Brandono paŭsas dezajnon sur la surfaco de la kunsidtablego.

Megano sidiĝas ĉe la ĉefloko de la kunsidtablego kie ŝi trankvile kaj kuraĝige konsilas la laborantaron, dirante, “La grava afero estas ke vi memoru ke en homoj

trudemaj pensoj estas sendanĝeraj kaj naturaj, kaj nur treege malofte malsana homo agas responde ĉi tiajn pensojn.”

Brandono suprenrigardas de la tablo kaj levas la manon petante paroli, “Sed kiel ni povas certigi nin ke homo ne faros plian Batalon de Nov-Andromedo?”

“Nu, precize tio faris ilin tiel valoraj al la koalicio, ĉu ne?” Megano gestas pardonpetante al la kunvenintoj dum ŝi konsilas ilin, “La realo estas ke neniel eblas esti tute certa, do estas plej bone ke ĉiu el ni fokusiĝu super nia laboro kaj ne demandu pri verdaj elefantoj, ĉu bone?”



# Jin Guang (Ĉinio)

## Kancero

Timiga kancero! Lo Li finfine ĉagreniĝis pri sia malsano: utera kancero. Ho ve! Kiam ŝi troviĝis nur ĉe la sojlo de la aĝo de dudek jaroj, ŝiaj idealo kaj estonteco deiris de ŝi iom post iom malproksimen, dum la morto alproksimiĝis al ŝi paŝon post paso. Kia sufero! Ŝi falis en malesperon. Ŝi preferis forlasi plene komforte ol resti turmentata de la malsano. Ŝi do komencis akumuli dormigajn pilolojn...

Sufoke varmege. Post vespermanĝo, ŝi eksentis senliman teruron. Elirinte el la malsanulejo, ŝi paŝis sencele en la korto, kaj poste eksidis sub arbeto, fikse rigardante foren senrimede.

“Ĉu malsanulino en hospitalo aŭ vizitanto al malsanulo?” aŭdiĝis voĉo.

Reveninte de distriĝo, ŝi trovis apud si starantan junulon, kiu, kun dika libro aksele, estis atendanta ŝian respondon.

“Ne, ho, mi estas kuracata en hospitalo,” ŝi respondis senorde.

“Mi nomiĝas Li Ming. Ankaŭ mi estas enhospitaliĝanto. Ŝajne, ni estas samsortuloj. De kia malsano vi suferas?”

“Kancero,” ŝi ridetis amare, sentante tion amuza.

La demandinto, sen pluaj vortoj, eksidis kaj, elpoŝiginte cigaredon malrapide, ekmeditis.

“Kian libron?” Ŝi ekprenis la libron kaj komencis foliumi ĝin, sed nenio videbliĝis pro la malhela vesperkrepusko.

“En la tuta libro troviĝas interesaj rakontoj. Vi povas ekkoni ĝin per mia rakontado.” Li Ming ekrakontis, “Estis juna soldato je la aĝo de 18 jaroj. Tuj kiam li rekrutiĝis, komenciĝis la memdefenda batalo kontraŭ Lamndo V. En batalo, li perdis kontakton kun sia armeo. Kvankam liaj kruroj estis rompitaĵoj per kugloj de malamiko, li ne fariĝis malespera. Nur kun granda persista volo, li sukcesis rampi sur la montan vojon foran je pli ol 100 kilometroj kaj reveni al la landlimo...”

Li rakontis serioze sed humure, dum ŝi aŭskultis gustplene. Ĝuste tiam li ĉesis abrupte.

“Kaj poste?” ŝi demandis.

“Pardonon. Mi legis ĝis ĉi tie. Se vi volas aŭskulti plu, mi daŭrigos legi alian parton antaŭ ol mi rakontos.”

De tiam, ĉiuvespere ili venis al la korto senaverte. Ŝi jen aŭskultis al la rakonto jen babilis kun li, tute forgesante sian malsanon. Kun alproksimiĝo al la finaj rakontoj de la libro, li ekhavis multe pli seriozan vizaĝesprimon ol antaŭe. Iutage,

post ŝia nova korpa ekzamenado, la kuracisto konfirmis al ŝi, ke ŝi suferas de benigna tumoro anstataŭ utera kancero, kaj petis ŝin preta por morgaŭa operacio de fortranĉado. Ŝi surprizite rondigis siajn okulojn kaj poste komencis ridegi pro ĝojo, tiel ke ŝi forĵetis ĉiujn dormigajn pilolojn kaŝitajn sub la kapkuseno. Tiam ŝi ekpensis pri Li Ming.

Post vespermanĝo, ŝi iris multe pli frue al la malantaŭa korto de la hospitalo kaj eksidis sur la longa lata apogbenko, kiun ambaŭ ili bone konis, atendante lian alvenon. Tamen post longe li ne aperis. Ŝi do turnis sin al lia malsanĉambro, kiun li iam indikis. Kiam ŝi ĝoje puŝmalfermis la pordon, ŝi trovis lian liton vaka escepte de la libro kuŝanta apud la kapkuseno. Lia kunĉambroano diris al ŝi, ke Li Ming subite forpasis tagmeze pro malsukcesa urĝa savado de sia plimalboniĝa kancermalsano... Ŝi ekterimis. Ŝi sentis sian kapon rigida kaj vidis sennombrajn orstelojn antaŭ siaj okuloj, nesciante kion fari. Post longe, ŝi sin eltiris el la duonkonscio. Ekpenso ŝajne fulmis tra ŝia menso. Kaj ŝi ekprenis la libron, kiun li ofte tenis en la mano. Sur la kovrilo estis presitaj kelkaj vortoj *Manlibro por Metallaboristoj...* Ekkompreneble ĉion, ŝi nereteneble larmis.





## Evgeny Khvalkov (Rusio)



*aŭtoro, Evgeny Khvalkov*

kaj brodis tapiŝojn. Ili havis tri filojn: Gelot, Nalfar kaj Mirisleif. Kiam ili plenkreskiĝis, la kavaliro vokis siajn tagojn kaj diris:

“Estas tempo por vi, filoj, iri al la reĝa kortego, servi Lian Moŝton la Reĝon, rigardi homojn kaj montri vin. Vi, Gelot, estas la plej aĝa, vi iras la unua.”

Kaj Gelot, la plej aĝa filo de la kavaliro, iris servi la reĝan kortegon. Kiam li alvenis tien, la reĝo diris al li:

“Antaŭ ol eniri mian servon kaj fariĝos kavaliro, vi devas trapasi teston. La koboldoj, kiuj loĝas en la najbaraj montetoj, ne pagis al mi la ŝuldan imposton de tri jaroj. Iru al ili kaj kolektu ĝin!”

Gelot iris kolekti impostojn de la koboldoj. Sed la montetanoj estas ruzaj homoj! La koboldo sendita de ili elsaltis kaj kriis al li:

“Saluton, sinjoro Gelot! Pri kiu imposto vi parolas? Ni neniam aŭdis pri iuj impostoj, ni neniam pagis impostojn al iu ajn. Sed rigardu, ni liberigos kvin el niaj infanoj — se vi kaptos eĉ unu, tiam pagu al ni imposton por la reĝo!”

La koboldoj liberigis siajn infanojn, kaj Gelot komencis postkuri ilin. Sed koboldoj estas lerta aro! Gehlot neniam kaptis, revenis al la reĝo kun malplenaj manoj, kaj li resendis sin al sia patro. La maljuna kavaliro ĉagreniĝis, sed ne montris ĝin, kaj diris nur:

“Vi, Nalfar, nun iru al la reĝo. Provu ne malhonoru nian familian nomon kaj blazonon!”

Kaj Nalfar, la meza filo de la kavaliro, iris servi la reĝan kortegon. Kiam li alvenis tien, la reĝo diris al li:

### Agrabla vorto estas

### agrabla al trolo

Loĝis maljuna kavaliro sur la bordo de Norevid, proksime de la blua maro. Li vivis en sia antikva familia kastelo kun sia edzino dum almenaŭ dudek aŭ tridek jaroj. Kiam ne estis milito, la kavaliro pasigis siajn tagojn ĉasante, kaj lia edzino ŝpinis fadenon, teksis

“Antaŭ ol eniri mian servon kaj fariĝi kavaliro, vi devas trapasi teston. La koboldoj, kiuj loĝas en la najbaraj montetoj, ne pagis al mi la ŝuldan imposton de tri jaroj. Mi sendis vian pliaĝan fraton, sed li nenion povis preni de ili. Iru al ili kaj kolektu ĝin!”

Nalfar iris kolekti impostojn de la koboldoj. Sed la montetanoj estas ruzaj homoj! La koboldo sendita de ili elsaltis kaj kriis al li:

“Saluton, sinjoro Nalfar! Pri kiu imposto vi parolas? Ni neniam aŭdis pri iuj impostoj, ni neniam pagis impostojn al iu ajn. Sed rigardu, ni liberigos kvin niajn infanojn — se vi kaptos eĉ unu, tiam ni pagos imposton al la reĝo!”

La koboldoj liberigis siajn infanojn, kaj Nalfar komencis postkuri ilin. Sed koboldoj estas lerta aro! Nalfar kaptis neniun, revenis al la reĝo kun malplenaj manoj, kaj li resendis sin al sia patro. Estis vespero, kaj la kavaliro sidis kun sia familio apud la kameno, kaj lia plej juna filo, Mirisleif, rigardis libron, kie diversaj bestoj kaj birdoj estis bildigitaj en miniaturoj. Kaj kiam la turhorloĝo sonis la sepan, la meza filo aperis kaj rakontis, kiel li ne povas trapasi la reĝan provon.

La maljuna kavaliro ĉagreniĝis, sed ne montris ĝin, kaj diris nur:

“Vi, Mirisleif, mia plej juna filo, nun iru al la reĝo. Nun ĉiu espero estas sur vi! Provu ne malhonoru nian familian nomon kaj blazonon!”

“Mi ankoraŭ ne finis legi la libron pri la moroj kaj kutimoj de ĉiuj bestoj kaj birdoj, patro! Kaj kial servi tiranan reĝon? Ĉu ne estus pli bone por mi ĉasi kun vi?”

“Mi servis la reĝon kaj plenumis liajn ordonojn fidele,” diris la maljuna kavaliro, “kaj via avo servis la reĝon, kaj vian praaŭon kaj prapraaŭon, kaj ĉiujn niajn glorajn prapatrojn.”

“Mi ne ŝatas reĝan servon, patro!” diris Mirisleif.

“Kiel do vi ne ŝatas lin, se vi neniam servis?” la maljuna kavaliro surpriziĝis.

“Sed mi ne ŝatas lin anticipe,” respondis Mirisleif. “Mi ne ŝatas servi iun ajn.”

Tamen la junulo ne volis ĉagreni sian maljunan patron, do li konsentis iri provi sian sorton en la reĝa servo. Kaj Mirisleif, la plej juna filo de la kavaliro, iris servi la reĝan kortegon. Kaj oni devas diri, ke ĉar li el la tri fratroj pasigis la plej grandan parton da tempo en la arbaro, li lernis kompreni la lingvon de bestoj kaj plantoj. Vi povas demandi - ĉu ĉi tio estas vera? Mi ne respondos, sed nur diros: eble li simple kredis, ke li komprenis ilian lingvon — ja tute ne necesas scii, ĉu ĝi estas vera, por kredi al io. Li rajdas kaj rajdas, kaj aŭdas unu alcionon sur arbo dirantan al alia:

“Ĉu vi vidis, kiel la kobolda estro Gilderolf denove prirabis hodiaŭ karavanon de vojaĝantoj?”

“Kiel vi povas ne vidi?” respondis al li la alia alciono. “Ili nun dividas la rabaĵon en kaverno apud la rivero.”

Mirisleif ŝteliris al la kaverno kaj aŭdis la kriojn de la koboldoj venantaj de tie. Tiam li englitis en la kaverton, eltiris sian glavon kaj kovris sian kapon per malgranda ŝildo (post ĉio, ĉiuj scias, ke perdi la kapon estas unu el la plej gravaj perdoj en batalo).

“Jen vi, rabistoj!” li kriis, penante, ke lia voĉo sonu kiel eble plej malĝentile — ja li estis ankoraŭ juna viro, preskaŭ infano! “Dum du monatoj, la reĝa gardisto kaj mi spuras vin, kaj nun ni finfine kaptis vin! Forigu viajn armilojn, se vi ne volas, ni haku vin en pecojn!”

Kompreneble, Mirisleif estis tute sola, krom, kompreneble, kun sia fidela ĉevalo, sed la koboldoj ne sciis pri tio, kaj koboldoj estas malkuraĝaj homoj. Ili rapide faligis siajn armilojn kaj kapitulacis al la junulo. Mirisleif ligis ĉiujn koboldrabistojn, ligis ilian gvidanton Gilderolf al sia selo, reŝarĝis la ŝtelitajn varojn sur la mulojn, kiujn la koboldoj prenis de preterpasantaj komercistoj kune kun varoj kaj oro, kaj iris kun la rabajo al la reĝa kortego. Kun siaj brakoj sur la talio, li eniris la urbajn pordegojn kaj direktiĝis al la reĝa kastelo. La gardistoj, vidante, kiun li gvidas, iom konfuziĝis kaj eĉ ne petis de li enirpermesilon, kaj tial Mirisleif troviĝis en la reĝa kastelo sen raporto.

“Saluton, Via Moŝto!” li salutis la reĝon. “Mi estas Mirisleif, la filo de via maljuna servisto, kavaliro el la bordo de Norevid, kiu sendas al vi siajn salutojn kaj dezirojn pri longa sano. Mi aŭdis, ke vi ordonis al miaj pliaĝaj fratoj kolekti impostojn de la koboldoj dum tri jaroj. Ĉar mi ne sciis precize, kiom ili ŝuldas al vi, mi alportis al vi ilian ĉefon (li estas ligita al la selo de mia ĉevalo en la korto de via kastelo), kaj samtempe ĉiujn liajn homojn kune kun oro, muloj kaj diversaj varoj, ĉu vi degnas kolekti de ili ĉion, kion vi devas!”

La reĝo ordonis malŝarĝi la mulojn kaj porti la oron kaj varojn en la reĝajn provizejojn, kaj ĵeti la koboldajn rabistojn en malliberejon — ili sidu tie kaj pripensu ilian konduton! Kaj la reĝo ordonis, ke Mirisleif estu enoficigita al la taĉmento de ĉasistoj, kaj la junulo komencis ĉasi ĉasaĵon por la reĝa tablo. Iun tagon li promenis tra la arbaro sekvante la spuron de cervo kaj vidis belan knabinon kiu sidis apud rivereto, kaj flankenmetante sian liuton kaj rigardante en la akvon, kombis siajn longajn orajn harojn.

“Bonan matenon, mia fraŭlino,” la junulo ĝentile alparolis ŝin, ne sciante kie komenci la interparolon, precipe ĉar la mateno estis ja bona.

“Saluton, sinjoro,” la knabino respondis al li. “Kio venigis vin ĝis la profundo de la arbaro?”

“Mi spuras cervon por alporti ĉasaĵon al la reĝo por vespermanĝi,” respondis Mirisleif. “Ĉu li ne trakuris ĉi tien?”

“Kio, mia Findabair?” la bela fraŭlino kunpremis siajn manojn. Oni devas diri, ke ĉi tio estis ne nur knabino, sed nimfo de ĉi tiu arbaro, kaj ŝia nomo estis Lajfo, kaj la cervo, kiun nia ĉasisto postkuras, estis ŝia plej ŝatata. “Ne damaĝu lin, mi petas! Kiam elaçeton mi povas doni al vi, por ke vi ĉesu persekuti lin?”

Mirisleif estis embarasita kaj diris ke kiam fraŭlino petas bestaĉon aŭ iu ajn alian, neniu elaçetomono estas necesa - krom se, eble, ŝi jesas ludi la liuton por li kaj kanti. Lajfo prenis la liuton en la manojn kaj komencis ludi kaj kanti kanton, pri kiu ŝi multe konis, kaj kiam la kanto finiĝis, la junulo freneze enamiĝis al la arbarnimfo. La kanton sekvis alia, poste tria, kaj je la fino de la tago la junulo enamiĝinta fariĝis tiel aŭdaca, ke li invitis la belan junulinon iri al sia ĉasdomo. La nimfo konsentis — ja ŝi ŝatis la junulon, kaj por esti kun li ŝi eĉ ne devis forlasi sian propran arbaron. Do Mirisleif kaj Lajfo vivis kune, kaj estis tre feliĉaj, ĉiu el ili faris por ke estu bone por la alia, ĉar amo ĉiam cedas lokon al la feliĉo de tiu, kiun vi amas. Pri la cervo Findabair, li ankaŭ estis tre kontenta, nur ĉar nia ĉasisto ĉesis ĉasi lin.

Iun tagon la reĝo organizis grandan taŭrobatalon ĉe Beltane kaj kunvokis kavalirojn el la tuta regno. Multaj mirakloj de lerteco estis montritaj tie. Fine la plej potenca kaj furioza virbovo, kiun kvar kavaliroj apenaŭ povis teni, estis alportita en la arenon. Kiam li estis liberigita, la reĝo ekkriis inter la kavaliroj, sed neniu kuraĝis batali kontraŭ la feroca besto. Volontulis nur Mirisleif, kaj ĉiuj kortegaj sinjoroj kaj sinjorinoj kredis, ke la reĝa ĉasisto tuj mortos – ja eĉ la plej fortaj kaj kuraĝaj militistoj timis batali kontraŭ la monstran taŭron. Mirisleif eniris la arenon sen kiraso, kun nur unu glavo, kaj kiam la virbovo alkuris lin, li lerte saltis flanken, saltis sur la dorson de la taŭro kaj per unu klako sur la frunto faligis la teruran beston.

Post ĉi tiu batalo, la famo de la eksterordinara forto, lerteco kaj eltrovemo de Mirisleif disvastiĝis tra la regno kaj multe preter ĝiaj limoj, kaj la reĝo komencis timi sian ĉasiston, envii lin kaj pensi pri kiel forpeli lin el la mondo. Krome, li aŭdis de la servistoj, ke la ĉasisto loĝas en ĉasdomo kun bela orhara fraŭlino, kaj li volis havi ŝin kiel edzinon.

Iun malvarman vintran tagon, tuj antaŭ Jule, la reĝo vokis Mirisleif al li kaj diris:

“Hodiaŭ malaperis el mia grego la plej bona bovino, tiu kiu donis trioblan lakton ĉiutage. Aŭ feroca besto trenis ŝin en densan arbaron, aŭ drako portis ŝin al foraj klifoj al la blua maro. Iru, ĉasisto, kaj trovu mian bovinon, kaj ne revenu sen ĝi!”

Mirisleif iris hejmen kaj rakontis al sia Lajfo pri la reĝa tasko. Kaj Lajfo diras al li:

“Morgaŭ vi havos bovinon el mia arbaro, ne maltrankviliĝu. Mi donos al vi la plej bonan kapon el miaj arbaraj gregoj, la samajn, kiujn paŝtas miaj fratinoj, la orharaj feinoj.”

La sekvantan matenon, Lajfo alvokis grandegan urson el la arbaro, ĵetis blankan koltukon ĉirkaŭ lian kolon, ligis sonorilon — kaj li fariĝis tiel obeema, kiel reĝa bovino, kvazaŭ ŝi ĵus estus trovita! Mirisleif kondukas la urson tra la urbo kaj fajfas kanton, kaj ĉiuj urbanoj kaŝas sin en siaj domoj, rigardas tra la fenestroj kaj estas mirigitaj. La junulo alportis la urson al la reĝo, kaj la reĝo tiel ektimis, ke li forkuris kaj kaŝis sin en bierbarelo. Kiam la urso estis forportita, la reĝo eliris, enspiris, regrimpis sur la tronon kaj nutris eĉ pli grandan rankoron kontraŭ sia ĉasisto.

Iun tagon la reĝo de Mirisleif vokas kaj diras:

“Hieraŭ mia amata kato malaperis el la kastelo, tia, kiu kaptis kvin dekduojn da musoj ĉiutage. Nun mi ne havos pacon de musoj kaj ratoj! Iru, ĉasisto, kaj trovu mian katon, kaj se vi revenos sen kato, vi estos forblovita!”

Mirisleif iris hejmen kaj rakontis al sia Lajfo pri la reĝa tasko. Kaj Lajfo diras al li:

“Ne estas problemo. Mi donos al la reĝo katon kiu valoras dek el la plej bonaj muskaptuloj!”

La sekvantan matenon, Lajfo alvokis ferocan leonon el la arbaro, ĵetis sian zonon ĉirkaŭ lian kolon kaj ligis ĝin per pafarko — kaj li fariĝis tiel obeema, kiel reĝa kato, kvazaŭ ŝi ĵus estus trovita! Mirisleif gvidas la leonon tra la urbo kaj fajfas kanton, kaj ĉiuj urbanoj kaŝis sin en siaj domoj, rigardante tra la fenestroj kaj skuante pro timo. La junulo alportis la leonon al la reĝo, kaj la reĝo tiom ektimis, ke li grimpis sur la kabineton pli lerte ol iu ajn kato. Kiam la leono estis forportita, la reĝo malsupreniris, enspiris, sidis reen sur la tronon, kaj fine decidis detrui sian ĉasiston ĉiakoste.

Kelkajn tagojn poste, la reĝo de Mirisleif vokas kaj diras:

“En la Trodharma Montoj loĝas trolo, kiu ŝuldas al mi mil orpecojn - kaj mi ne povas sukcesi enspezi de li la ŝuldon. Mi ne scias, por kio li elspezis ĝin, sed vi nur devas kolekti ĝin de la trolo, kaj se vi ne reakiras ĝin, la hakilo de la ekzekutisto ploras por vi!

Mirisleif iris hejmen kaj rakontis al sia Lajfo pri la reĝa tasko. Kaj Lajfo diras al li:

“La tasko de la reĝo estas vere malfacila kaj danĝera: la Trodharm-trolo estas konata de ĉiuj pro sia krueleco. Li elmetas al ĉiu, kiu trapasas lian enirpermesilon, tri enigmojn, kaj tiuj, kiuj ne povas respondi, estas manĝataj vivantaj - kaj mi ne aŭdis pri iu ajn, kiu povus solvi liajn enigmojn, ĉiu perdis sian vivon sur ĉi tiu pasejo. Sed ne timu, mi donos al vi akvon el la fonto de scio kaj eble vi povos diveni la enigmojn de la terura trolo kaj devigi lin plenumi la reĝan volon. Jes, prenu iom pli da pulvoro el sekigita blindiga herbo; ĉi tiuj troloj, vi scias, estas tre ruzaj kaj perfidaj estaĵoj, kaj vi neniam povas fidi ilin.”

Lajfo prenis Mirisleif ĝis la koro mem de la arbaro kaj donis al li akvon por trinki el la fonto de scio; kaj ĉiuj sekretoj de la naturo de ĉi tiu mondo kaj duono de la sekretoj de la alia mondo estis malkaŝitaj al la junulo. Li iris al la Trodharm-montoj, kaj la vojaĝo al ili el tiu regno ne estis mallonga, almenaŭ unu monato; tamen, se vi mem estis en la Trodharm Montoj, tiam vi bone komprenas, pri kio mi parolas. Dume, la reĝo kaj lia sekvantaro alvenis en la arbaron kaj komencis frapi la pordon de la ĉaskabano de Mirisleif.

“Bela fraŭlino,” li diris ceremonie, “por tia belulo kiel vi ne decas esti edzino de iu almozula ĉasisto. Mi havas la honoron inviti vin translokiĝi en la reĝan palacon kaj fariĝi mia edzino.”

“Mia koro apartenas al mia edzo Mirisleif,” respondis la arbarnimfo, “kaj mi ne fariĝos edzino de iu alia.”

“Tiel estas!” ekkriis la reĝo. “Vi rifuzas la suverenon kaj preferas ĉi tiun almozulon!”

“Mi amas mian edzon, sinjoro, kaj neniun alian,” Lajfo respondis trankvile, ĉar ŝi sciis, ke ŝi paciencu, se ŝajnas, ke la interparolanto ne aŭskultas vin. Eble liaj oreloj estis nur blokigitaj.

“La trolo jam delonge ronĝas la ostojn de via edzo, sed vi ankoraŭ estos mia, ĉu vi volas aŭ ne!” kriis la reĝo. “Hej, gardistoj! Tuj kaptu ĉi tiun senhontan virinon kaj jetu ŝin en malliberejon. Ŝi sidu tie, ĝis ŝi rekonsciiĝos!”

Kaj tiel la arbarnimfo trovis sin en ŝtonsako en la karcero de la reĝa kastelo.

Dume, Mirisleif atingis la Trodharm Montojn kaj vidis trolon ĉe la pasejo. Nu, li aspektis monstra! Tamen la ĉasisto tute ne timis, ĝentile salutis la kanibalon kaj diris:

“Sinjoro Trolo, Lia Moŝto la Reĝo sendis min al vi por postuli de vi la mil orpecojn, kiujn vi iam pruntis de li. Ĉu vi bonvolos informi min, ĉu estus pli oportune por vi pagi la reĝon persone aŭ per mia perado?”

“Ve,” surpriziĝis la monttrollo, “mi ne memoras, ke la reĝo pruntodis al mi monon! Tamen, ĉar li sendis al mi freŝan viandon, kiu mem venis al mi por tagmanĝo, mi verŝajne estus dankema al li!”

“Ne rapidu, sinjoro trolo,” respondis la ĉasisto eltirinte sian glavon, “vi ne prenos min sen batalo. Sed mi aŭdis, ke vi estas majstro pri elmetado de enigmoj. Ĉu ni ne devus ludi ĉi tiun antikvan ludon?”

“Nu,” la trolo konsentis, “ni povas ludi. Ni simple klarigu la regulojn tuj. Se vi ne bone divenos miajn tri enigmojn, mi vin manĝos.”

“Estu via maniero,” la junulo konsentis, “sed kio okazos se mi divenos ilin?”

“Hum...” pensis la trolo kaj rigardis unue sin, poste la junulon. “Ĉu vi do vere povos manĝi min?”

“Eble mi rifuzos tian regalon,” respondis Mirisleif, “sed tiam vi devos plene repagi vian ŝuldon al la reĝo!”

Pri tio ili decidis. La trolo elmetis al Mirisleif tri enigmojn - kaj imagu lian surprizon kiam li divenis ĉiujn! Sed ĉar la trolo havis neniun spuron de mono kaj li havis absolute nenion por doni al la reĝo, li nudigis la dentojn kaj moviĝis al la junulo.

“Kio pri nia interkonsento, sinjoro trolo?” ekkriis la surprizita Mirisleif. “Ja vi mem promesis redoni mil orpecojn al la reĝo, se mi solvos ĉiujn viajn enigmojn!”

“Nun mi montros al vi mil orpecojn, homa fraŭlo!” kriegis la kanibalo kaj kuregis al la ĉasisto. Kaj la junulo estus malgaja, se li ne havus blindigan herbon en sia vojaĝsako, kiun donacis al li lia zorgema Lajfo! Mirisleif prenis manplendon da pulvoro kaj ĵetis ĝin rekte en la okulojn de la trolo, kaj dum li staris fiksiĝinta sur la loko, nenion vidante, la ĉasisto ĉirkaŭpaŝis lin de malantaŭe kaj metis la klingon de sia glavo al la gorĝo de la monstro.

“Ne mortigu min, sinjoro!” petegis la trolo. “Mi ankoraŭ estos utila al vi. Mi ĵuras al vi, mi ne plu provos malbonigi vin; sed mi devas konfesi, ke mi ne havas mil orpecojn, ĉar fakte la reĝo neniam pruntedonis al mi monon.”

“Kiel do?” Mirisleif estis surprizita. “Ja Lia Moŝto ne povis mensogi! Tamen, sinjoro trolo, nun vi estas mia kaptito; sekvu min al la reĝa kortego, kie vi devos persone respondi al lia moŝto.”

Kaj tiel Mirisleif kondukis la trolon al la reĝa kastelo. Ili marŝis longe, kaj fine atingis la murojn de la ĉefurbo, sed poste Mirisleif rigardis la arbaron, kie staris lia kabano, kaj pensis pri sia amata Lajfo.

“Sinjoro Trolo,” li diris, “antaŭ ol mi prezentiĝos antaŭ la reĝo kaj venigos vin al li, mi ŝatus vidi mian edzinon. Ĉu vi degnus atendi en la maldensejo? Post unu horo mi revenos al vi kaj kondukos vin al la kastelo.”

La trolo konsentis atendi, kaj Mirisleif, rememorante, kion diris al li lia edzino pri la perfido de troloj, volis ligi lin firme al arbo por la okazo, por ke li ne forkuru, sed poste li pensis kaj diris tion:

“Sinjoro trolo, ĉiuj parolas pri la perfido de via tribo, sed mi kredas, ke oni povas fidi vin kaj ke vi ne forkuros dum mia foresto, ĉar vi estas inda sinjoro ĉiurilate, kaj vi atakis min ĉe la pasejo. Pro malespero, nur pro tio vi vere ne havis monon. Mi povas fidi vin, ĉu ne?”

La trolo estis tiel kortuŝita, ke li eĉ verŝis larmojn. Ne ofte trolo aŭdas tiajn afablajn vortojn pri si!

“Mi atendas vin ĉi tie, sinjoro Mirisleif!” li diris, “Vi povas tute fidi al mi!”

Mirisleif venis al sia ĉasdomo, kaj la cervo Findabair staris malgaje ĉe la pordo kaj verŝis larmojn grandajn kiel perloj.

“Kio okazis, bona Findabair?” demandas la junulo. “Kial vi ploras tiel amare?”

“Mia mastrino kaj via edzino estis kaptitaj de la servantoj de la reĝo, mia bona sinjoro. La reĝo volis delogi ŝin, kaj kiam ŝi ne konsentis, li ordonis, ke oni ĵetu ŝin en ŝtonan malliberejon. Estintus pli bone, se vi batus min per sago en la tago, kiam vi renkontis ŝin, — almenaŭ tiam mi ne vivus por vidi ĉi tiun funebran tagon, kiam fraŭlino Lajfo restas en karcerio, kaj mi povas nenion fari por helpi ŝin!”

“Kia fiulo!” Mirisleif ekkriis. “Mi ĵuras, mi liberigos ŝin, kaj la reĝo pagos kare por tio!”

Kaj la ĉasisto revenis al la arbara rando, vokis la trolon kaj ordonis, ke li sekvu lin al la reĝa kastelo. Dum Mirisleif gvidis la trolon tra la urbo, la urbanoj kaŝis sin en siaj domoj kaj nur singarde klinis sin el la fenestroj por rigardi la senprecedencan spektaklon - ne ĉiutage oni vidas vivan trolon kondukata tra la stratoj! Kiam la junulo venis al la pordego de la karcerio, kie Lajfo estis malliberigita, li ordonis al la trolo rompi la pezajn riglilojn, kio estis nur bagatelo por la trolo — same kiel fajfi per du fingroj por vi. La arbarnimfo estis nun libera, kaj denove kune kun sia amata edzo, kaj la malnobla reĝo, vidante Mirisleif vivanta kaj nedifektita, kaj eĉ en la kompanio de trolo, kuregis, haste faligante sian kronon, saltis en la puton por kaŝiĝi de la trolo, kaj tie li dronis.

La orhara Lajfo prenis la kronon kaj kronis sian Mirisleif per ĝi, kaj ili vivis kaj regis feliĉe por ĉiam. Kio pri la trolo? La trolo estis liberigita en la Trodharm-Montojn, promesinte lin, ke li neniam plu manĝos preterpasantajn vojaĝantojn, sed ĉasos nur bestojn, kaj eĉ tiam nur neparolantajn. Kaj, kiom ni scias, li plenumis ĉi tiun promeson, kaj li eĉ rakontis ĉi tiun rakonton al la plej persista el la vojaĝantoj, kiuj grimpis en lian kavernon por rigardi lin - do la afablaj vortoj de Mirisleif kaj la fidon, kiun la junulo montris, ŝanĝis lin!

Ekde tiam oni diras: “Ankaŭ afabla vorto estas agrabla al trolo.”



esperantigita de **Paula Adúríz** (Hispanio)



# Liu Wanli (Ĉinio)

## Enamiĝo de lupoj

Mi estas bonkora lupoj. Ekde kiam mi ekhavis komprenkapablon, mi eksciis pri la fifamo de lupoj kaj pri la ĉiama singardemo de homaro al lupoj. Por ŝanĝi ties malbonan situacion, mi decidis unue ŝanĝi min mem. Mi neniam vundis nek mortigis malfortajn kaj malgrandajn bestojn, tamen neniu besto volis amikiĝi kun mi, tiel ke mi sentis min izola kaj soleca.

Ĝis kiam tiu leporo aperis, mia vivo tuj ekbrilis, plena je sunlumo. Tiun tagon, kiam mi sola serĉis manĝaĵon, mi trovis, en herbaro, leporon kun neĝe blanka hararo. Mi, tiam en komenca sento de amo, estis frapita kvazaŭ de elektro. Ĉu tia sento estas la amsento je la unua vido kiel priskribita en libro? Mi iris al ŝi. Ŝi tremis trakorpe kun panika timo en siaj okuloj, preta por lukti kontraŭ mi. Mi diris, ke mi ne vundos ŝin. Sed ŝi ankoraŭ tremis kun okuloj plenaj je sangaj strioj. Okazis, ke, vundita, ŝia kruro sangas. Mi alproksimiĝis. Kaj ŝi malfacile stariĝis kaj volis forkuri, sed ŝi falis surteren tuj post kelkaj paŝoj. Kredu min, mi diris, mi ne vundos vin. Ŝi direktis sian dubeman rigardon al mi. Mi helpe starigis ŝin kaj bandaĝis ŝian vunditan kruron. Mi demandis, kie ŝia hejmo lokiĝas, kaj mi volis eskorti ŝin al ŝia hejmo. La timego en siaj okuloj tuj malaperis. Ŝi diris tre amikece, ke ŝia hejmo troviĝas en Lepora Rokego. Trapasinte montojn kaj montojn, mi helpe subtenis ŝin ĝis ŝia hejmo, kaj mi revenis sola.

Ekde tiam mi kaj ŝi fariĝis amikoj. Tagon post tago ambaŭ la amikeco kaj amo inter ni pliiĝis freneze. Mi eĉ maltrankviliĝis se mi ne vidis ŝin nur por unu tago. Mi decidis malkaŝi mian korinklinon al ŝi. Je sunplena posttagmezo, kun fasko da sovaĝaj floroj, kiujn mi kolektis, mi surgenuiĝis antaŭ ŝi kiel homoj faris la samon, dirante, “Mi amas vin. Edziniĝu al mi!”

Kun larmplenaj okuloj, ŝi kapjesis feliĉe. Post hejmvreveno, mi informis miajn gepatrojn pri nia geedziĝo. Tion ili forte kontraŭis: kiel eblas la geedziĝo inter lupoj kaj leporoj?

Mi respondis, “Mi amas ŝin.”

La patro replikis, “Ĉu vi scias, kio estas amo? De kelkaj mil jaroj leporoj estas niaj ĝismortaj malamikoj. Ni devas neniigi ilin ĉiujn.”

Mi diris, “Avideco, maliceco kaj krueleco ĉiam okupas vian koron, ĉu restas io bonkora, bonfarema kaj amikeca en via konduto? Ne estas mirinde, ke ni lupoj havas fifamon. Jen estas vi fiuloj ruinigis nian reputacion.”

La patro kolere kontraŭdiris, “Se vi insistas edziniĝi ŝin, mi malakceptos vin kiel

mian filon. Vi ne estos permesata plu iri en nian hejmon por eterne. For!”

“Do mi forirul!” mi respondis. Mi iris al la hejmo de la leporo. La pordo estis riglita. Mi frapis je la pordo, vokante ŝin. Ŝi plore respondis. Mi demandis, kial ŝi ploras. Ŝi respondis, ke ŝia patrino oponas nian kuniĝon kaj ne permesas al ŝi eliri post la riglita pordo. Ankaŭ mi rakontis pri la malaprobo de mia patro. Aŭdinte tion, ŝi ploris pli dolore.

Mi proponis, “Ni simple forfuĝu por nia pura amo!” Post kelka pripensado, ŝi konsentis. Rompinte la pordon, mi tiris ŝin je la mano kaj forlasis Leporan Rokegon. Antaŭ ol ni foriri disde niaj hejmoj, mi decidis hejmeniri por diri ĝisrevidon al miaj gepatroj, ĉar ili, malgraŭ ĉio, donis al mi favoron de naskigo kaj vartado. Surgenuiĝante antaŭ miaj gepatroj, mi petis ilin pardoni min pro mia mallojaleco kaj esperis, ke ili sin zorgu post mia foriro. La patro insultadis pro kolerego, ke mi estas malkonfidindulo kaj perfidulo. Kaj li malpermesis al mi rehejmeniri. Li levis pecon da ŝtono por frapi al mi, kaj mia patrino baris al li, petante, ke mi forkuru tuj.

Tirante la leporon, mi forkuris kontraŭ la subiranta suno, kun larmoj en la okuloj. Mi malamis ilin pro iliaj obstineco kaj krueleco. Mi volis pruvi, ke mi ne estos perfidulo nek malkonfidindulo, ĝis kiam mi fariĝos kapablulo estontece. Mi kaj la leporo fine konstruis novan hejmon en kavo. Ĉiutage ni kune eliris por serĉi manĝaĵon, petole ludi, kapti papiliojn...Nia vivo sin montris bona kaj feliĉa.

Iutage, la leporo malsaniĝis. Mi eliris sola por kolekti herbdrogojn por ŝi. Je sunsubiro, mi jam kolektis plenkorbon da herbdrogoj. Kiam mi revenis dekelkajn metrojn fore de la hejmo, mi ĝoje vokis ŝian nomon. En la kavo mi ne trovis la leporon, sed mian patron anstataŭe, kiu manĝis ion kun gusto. Mi demandis, “Kie estas la leporo?”

Senparolaj, miaj gepatroj daŭre manĝis, donante nenian atenton al mi. Vidinte sangmakulojn sur la tero, mi tuj komprenis, ke ili mortigis kaj formanĝis ŝin. Indigno tuj plenigis mian tutan korpon. Mi alkuris kaj kaptis mian patron je la kolo, dirante, “Kiel vi...” Mi ne povis eligi aliajn vortojn pro kolerego.

La patro respondis, “Mi ne volas perdi mian filon, kaj krome, tiel delikata leporo allogas ĉies apetiton.”

Miaj manoj kunteniĝis pli kaj pli firme, kaj miaj fingroj eniĝis en la karnon de mia patro. La vizaĝo de la patro deformiĝis kaj liaj okulgloboj iom post iom senmoviĝis. Mi eĉ strangolis mian patron. Vidante la kadavron de mia patro, mi sentis nenian pentemon, sed malamon anstataŭe en mia koro. Rigardante la subirantan sunon, mi ekhurlis per raŭka voĉo, kiu timige ŝvebis tra la valo. Mi decidis malsupreniri la monton. Mi sciis, ke ekde nun mi fariĝos vera lupo.

# Han Bing

## Patrino Amo

Mi aŭdis la jenan rakonton, kies ĉefaj roluloj estas patrino kaj ŝia filo.

Ĉirkaŭ 40-jara, ŝi, tre kompetenta, estris kompanion, por kiu laboris kelkaj miloj da dungitoj. Ĝuste pro tio, ŝia edzo ŝin forlasis, kaj li argumentis, ke ŝi tro kompetenta en sia kariero. Tio okazis antaŭ dek jaroj. Dum la sekva jardeko, ŝi kaj administris sian kompanion kaj plenkreskigis sian filon. Ŝi ja multe ŝvitis kaj faligis multe da amaraj larmoj — sed neniu rimarkis ŝian larmadon. En ĉies okuloj, ŝi estis fridsanga virino. Eĉ ŝia filo konsideris ŝin tia.

Diplomiĝinte el supera mezlernejo, la filo ne povis eniri universitaton, ne pro tio, ke li estis malpermesita lerni en universitato, sed pro tio, ke li mem neniel volis lerni plu. Nelonge post lia diplomiĝo el supera mezlernejo, li atingis la aĝon de dek ok jaroj.

Je lia naskiĝtago, lia patrino venigis sian filon kaj donis al li sumon da 1000 juanoj, dirante, “Nun vi jam aĝas 18 jarojn kaj ne daŭrigas vian lernadon. La aĝo de 18 jaroj signifas plenkreskulecon. Plenkreskulo devas sin vivteni. Ĉi tiu monsumo servas kiel via kapitalo. Nun foriru kun la sumo. Revenu al mi ĝis kiam vi sufiĉe lukros monon, alie ni ne havos sangan rilaton inter ni.” Ĉimomente la filo sentis, ke lia patrino estas senkora kaj fridsanga.

Nur post kelkaj tagoj, la monsumo elĉerpiĝis. Kion fari? Peti iom de la patrino! Kiam li reiris al la apartamento, kie ili loĝis antaŭe, li trovis, ke ĝi jam estas je aliula dispono, kaj lia patrino malaperis senspure. Li tuj falis en profundan malĝojon. Sento de forlasita izoliteco ekvolvis lin tiel firme, ke li apenaŭ elspiris.

Malsato pelis lin al serĉado de okupo. Fine li sukcesis gajni okupon por blankŝmiri murojn. Kiel laborpagon li povis lukri unu juanon por unu blankŝmirita kvadrata metro. Li laboris la tutan tagon, kaj lia laborpago sufiĉis nur por tiutaga konsumado. Se mi plulaboros tiamaniere, li pensis, tio, kion mi gajnis, nur povos plenigi mian stomakon, kaj nenio restiĝos. Post longa cerbumado, li decidis dungi kelkajn laborantojn por fari ĉi tiun laboron. Li kalkulis, ke li donos al ili 0.8 juano por ĉiu kvadrata metro, kaj li mem retenos 0.2 juanon kiel profiton. Kiel profitdona negoco!

Tiel li povis gajni ĝis cent juanojn ĉiutage. Post duonmonato, lia profito atingis pli ol 1000 juanojn. De tiam, surbaze de la antaŭa sukcesa sperto, li komencis serĉi aliajn ŝancojn por komercado.

En okupiteco li forgesis la patrinan kruelecon al li iom post iom, sed li ne inklinis ŝin pardoni.

Post unu jaro li fariĝis sukcesa komercisto, kiu havigis al si cent milojn da juanoj kiel kapitalon. Kiam li dronis en memkontenteco, li ricevis el sia patino leteron skribitan unu jaron antaŭe, kiu legiĝis:

Kara filo mia,

Kiam vi ricevis ĉi tiun leteron, mi jam forlasis la mondon.

Pardonu al mi, ke mi kruuele forpelis vin el la hejmo lastafoje. Tiam mi jam estis trafita de nekurablebla malsano. Kvankam mi posedas dek milionojn da havaĵo, vi tamen ne havas nenian kapablon subteni vin. La vera kaŭzo, kial mi forpelis vin sensimpatie, kuŝas en tio, ke mi volas, ke vi ellernu kiel postvivi. Ĉar mi baldaŭ forlasos la homan mondon kaj karan vin, vi devos zorgi pri vi mem.

...

via kare,

panjo, kiu vin amas profunde

tuj antaŭ la momento de morto

Kune kun ĉi tiu letero estis alia leĝa atestilo pri heredado de la tuta hejma havaĵo.



# Zhu Hongshun

## La homo, kiu savis la lunon

En malproksima estonteco la tergloblo jam sin trovos danĝera en la interstela milito. Oni proponas, ke la luno uzita kiel supera misilo, pafiĝu por detruji la malamikan stelon. La plano de lunpafado tuj plenumiĝos...

Pro tio, ke pli intensiĝas la milito inter la Terglobo kaj Titan-stelo, la trupoj de la tergloblo en la avangarda pozicio sur Titan-stelo ne havas sufiĉe da forto por elteni la pli grandskalan militon.

Tiutage la plej altaj ĉefoj de la Tergloba Federacio kunvenas por diskuti pri tre grava temo.

La unua la ĉefo de Ameriko parolas, “Se ni plu batalus, ni pagus tro da kosto. La Terglobo ne povus elteni ĝin. Miaopinie tempas por ni lanĉi tiun planon.”

Ekskuinte la kapon, la ĉefo de Afriko skeptike diris, “Ĉu vere necese? Ĉiuokaze ĝi estas nia lasta armilo.”



“Sed fari tion estas pli bone ol ke pereos pli da teranoj!” La ĉefo de Eŭropo krias, “Mia filo, kara Pitri, ĝuste hieraŭ mortis en la mano de Titananoj. Tiuj damnindaj bastardoj! Mi tre volas, ke ni tuj nun lanĉu tiun planon...”

Larmoj falas el la vetero-atakita vizaĝo de la forta viro. Tomba silento regas en la kunvenejo.

Fragnetinte la ŝultron de la ĉefo de Eŭropo, la ĉefo de Azio diras, “Ĉu oni lanĉos tiun planon, la decido kuŝas en la mano de la popolo. Morgaŭ ni lanĉos referendumon, tiel ke la popolo decidos, kion ni faru poste.

Post dudek kvar horoj la ĉefoj de ĉiuj kontinentoj aperis sur ĉiuj elektronikaj ekranoj. Aŭdiĝis ruliĝantaj elsendoj: “Respektataj sam-teranoj, pro tio, ke la milito inter Terglobo kaj Titan-stelo intensiĝas, la registaro decidis lanĉi referendumon, ĉu oni plenumos la planon de lunpafado!”

“Lunpafado” estis la plej grava parto de terglob-savado lanĉita antaŭ dudek jaroj, la plano, kiun oni pretigis dum dek ok jaroj. La homaro konstruis supergrandan pafilon, kaj kiam la Terglobo alfrontos la seriozan militon inter steloj, oni povos pafi la lunon kiel superan misilon por detruai la stelon de la rivalo.

Samtempe la Terglobo elspezos doloran koston pro perdo de la luno.

La teranoj, kiuj jam suferis multe en la milito kaj kovis malamon kontraŭ Titananoj, ne multe hezitas kaj donas sian aproban baloton pere de elektronika aparato, kaj la nombro de aprobaj balotoj senĉese terure pliiĝas.

Post kelkaj horoj unu homo tamen ne donis baloton.

Laŭ la reguloj, por tiel grava balotado, post kiam nur ĉiuj homoj donos baloton, la referendumo finiĝos. Sennombraj rigardoj tra la tuta terglobo fiksiĝis sur la bagatela, sed neestingebla ruĝa punkto sur la televida ekrano.

La ĉefo de Azio diris, “Kontrolu, kiu estas tiu, kiu ankoraŭ ne donis baloton.”

La komputilo rapide respondas, “La estimata ĉefo de Azio, li estas via patro.”

“Mia patro?” la ĉefo de Azio surpriziĝis. Ekde kiam li estis elektita kiel la ĉefo de Azio, li ne hejmeniris longan tempon kaj la rilato inter li kaj lia patro pli kaj pli malintimiĝas.

Li rapide reiras al sia hejmo kaj vidas sian patron sidi tie kun trankvila mieno, “Mia filo, vi ne hejmeniris longan tempon.”

La ĉefo de Azio iom koleriĝas, “Kial vi ne donis baloton? Ĉu vi nur volas, ke mi nur revenas vidi vin? Ĉu vi scias, ke en ĉiu sekundo eble unu soldato de la Terglobo mortas sur la Titan-stelo?”

Ekskuinte la kapon, la maljunulo senhaste diris, “Mi ne volas, ke vi revenas, sed via patrino revenos.”

La ĉefo des pli koleriĝas, “Ĉu vi jam freneziĝas, paĉjo? Mia patrino jam forpasis dudek jarojn!”

Post momenta silento, la maljunulo mallaŭte diras, “Jes, ŝi mortis, sed ŝia cindro ankoraŭ restas sur la luno.”

La ĉefo subite ekmemoris, ke pro progresado de la epoko ĉiu colo de la grundo de la Terglobo fariĝas valora kaj li mem iniciatis “entombigon sur la luno; kaj malgraŭ

la opono de la patro, li entombigis la cindron de sia patrino sur la luno. Ekde tiam la rilato inter li kaj lia patro sin trovis en malbona stato.

Dum momento la ĉefo ne povas eligi unu vorton, sed tamen la maljunulo subite ekscitiĝas, “Estas vi, kiu sendis ŝin sur la lunon tiujare, kaj nun ankaŭ estas vi, kiu proponas eksplodi la lunon. Kion finfine vi volas fari? Ĉu vi volas, ke via patrino ne kuŝas en paco?”

Farinte profundan enspiron, la ĉefo diris, “Mi volas respondeci pri la Terglobo...”

Interrompinte lin, la maljunulo diras, “Scienco kaj teknologio progresas, sed la koro de homoj ŝanĝiĝas. Se vi volas eksplodi la lunon, vi ne nur eksplodus la lunon, sed ankaŭ la tombojn de la antaŭuloj kaj dignon de la homaro. Jes, vi povas eksplodi la lunon ĉifoje, sed venontfoje kaj triafoje?”

La ĉefo eksilentis. Jes, venontfoje, triafoje? Sed la referendumo jam komenciĝis kaj tre malfacile haltigas ĝin. Li subite eksentas grandan lacecon kaj nereteneble fermas la okulojn.

Tiam li aŭdas bruon malantaŭ si. Turninte sin, li trovis la ĉefon de Eŭropo alvenanta kaj grupon da raportistoj lin sekvantan.

Vidante tiujn homojn, la maljunulo eligas longan spiron kaj diras, “Ankaŭ mi scias, ke la milita situacio troviĝas en danĝera stato. Sed ĉu oni vere ne havas alian rimedon? Ĝis kiam niaj infanoj plenkreskiĝos, ili demandos al ni kio estas la luno, kiel kompreni tiajn versojn kiaj ‘Sterniĝas lunlumo antaŭ la lito’, ‘Levante vintason mi invitas la lunon’ kaj ‘Mi deziras, ke ni ĝuu la saman lunon por eterne’. Kiel ni respondos al ili?”

Jes, vere ni havas alian rimedon? La spektantoj antaŭ la televid-ekrano ankaŭ falas en silentan pripenson...

Post longa tempo raportisto la unua diras, “Oĉjo, mi subtenas vin.” Tuj poste alia raportisto diras, “Ankaŭ mi vin subtenas!”

Post kelka silento aŭdiĝas voĉo, “Mi estas la ĉefo de Eŭropo. Mi petas al la centra komputilo denovan balotadon.”

La ĉefo de Azio ekstreme surpriziĝis. Tre baldaŭ la komputilo bonorde elsendis informon, “Konfirmado de identeco, la ĉefo de Eŭropo. La konfirmado sukcesis. La programo de referendumo komenciĝos denove...”

Post voĉdonado de aliaj ĉefoj la referendumo komenciĝas denove...

Post multaj jaroj la nepo de la ĉefo de Azio demandas al tiu, “Avĉjo, la historia leciono pritemos ‘la lunan krizon’ morgaŭ. Kio estas ‘la luna krizo’?”

La ĉefo de Azio montris delikatan rideton, dirante, “Pri la luna krizo demandu vian praavon. Li estas tiu, kiu savis la lunon.”

*elĉinigi**s** Fangfang (Ĉinio)*

## Iljet Aliĉka (Albanio)



*aŭtoro, Iljet Aliĉka*

### Konfesoĵoj de poeto

Kiam iun tagon mi renkontiĝis kun la konata poeto Iks kaj li komencis plendi, estis tuj videble, kiel suferegas lia animo.

– Ho, kia nacio! ĉu la tempon por legado

povas havi tiuj, kiuj preterlasos nenian okazon, por senhonte kaj cinike postkuradi monon? Mi scias, ke en malordo neniu turnas sian kapon per la vera literaturo, kaj al la socio mankas la tempo okupiĝi pri tio. Sed – mi ne pardonos, ke nin, verkistojn, ili forlasas tiel rapide kaj senkompatate? Ĉu estas tolereble? Ĉi tion la literaturo neniam pardonos al la homaro, ho kia hontego!

Li diris patose kaj foriris, kun ĝibigita dorso, trenante la ŝuojn defalantajn de liaj piedoj. La poeto videble suferis ne nur spirite, sed ankaŭ finance.

Post kelka tempo mi renkontis lin denove. Kiel ĉiu talenta poeto en la mondo li ne subiĝis al zorgoj.

– Bone vi aspektas – mi diris. – Kion vi faras?

– Mi skribas kondolencajn versaĵojn – li respondis mallonge. – Kaj mi devas al vi diri, ke mi gajnas pli-malpli sufiĉe da mono.

– Kaj ĉu poemojn vi ankoraŭ skribas? – mi demandis.

– Ho, mi pardonpetas, amiko – li vigliĝis – kiucele elekti longan vojon, se oni povas iri mallonge? Ĉu ne?

Post momento lia vizaĝo esprimis seriozecon.

– Mi skribas morto-afiŝojn, nekrologojn, kondolencojn kaj porokazajn rememorojn. Venis la nova tempo, Yllo, la socio civilizis sin, la morto-afiŝoj ne pendas sur lignaj tabulaĉoj. Nun doloron post la morto de sia proksimulo oni povas esprimi kun amosento, elegante, en la gazetoj (kompreneble laŭ dikeco de monujo). Mi disvolvis ĉi agadon kiel la unua – li parolis – kiam nia plej granda gazeto komencis tiun modernan praktikon. Estis serĉata iu, kiu povus okupiĝi pri tio. Mi ŝajnis la plej taŭga kandidato ne nur pro mia nomo, sed ankaŭ pro la kapablo skribi grandan amason da nekrologoj kun eminente poezia karaktero. La prezoj de nekrologo – li daŭrigis – varias inter la minimumaj por mallongaj frazoj (kiel



*Forpasis tiu kaj tiu aŭ Mortis tiu kaj tiu*) kaj la maksimumaj por frazoj plej longaj (*Estingiĝis la vivo de edzo, frato, filo...* aŭ *Malgajaj estos niaj tagoj de nun, ho frato, ho filo, ho edzo*). Ju pli longe, des pli multekoste. Kiel en telegramo, en kiu oni pagas ĉiun vorton aŭ literon. Do, mi spuras la morton ĉie, kie mi povas, amiko. Mi ekscias pri ĝi kiel eble plej rapide (serĉu, kaj vi trovos), por tuj proponi al familio la konvenan servon. Kaj sincere dirite: la homoj estas nun tiel snobaj! Ankoraŭ kelkajn jarojn pli frue ili konkuris pri skulptitaj ĉerkoj aŭ tomoŝtonoj el greka marmoro, kun figureto supre, kaj nun okazas la konkurado pri tio, kio gravurigos pli kortuŝan surskribon en tomboplato aŭ aperigos pli longan kaj pli belan nekrologon en gazeto. Tia modo estas nun, Yllo ... Ĉu vi scias, kion foje diris al mi la konata skulptisto M., kiu faras nun tomoŝtonojn? – demandis la poeto. – „Ah, se ankoraŭfoje ripetiĝus la marto en 1997, kolego, tiam ni ne devus plu ĉagreniĝi pri mono, nek ni, nek niaj nepoj”. Same pensas ankaŭ la ŝtonistoj kaj ĉerkistoj – kaj ili pravas! Mi rimarkis tion. La ordinara epidemio de azia gripo donas al ni tiom da laboro, ke mankas loko en la gazetoj. Kompreneble, ĉe tia okazo, la mono ŝutiĝas plenmane. Mi diros al vi, ke en la komenco mi okupiĝis pri tio kun pasio distinga por la poetoj. Sed kunmetado de funebraj versaĵoj, eĉ kiam vi mem estas kortuŝita, fariĝas pli kaj pli banala kun tempopaso. Do, ĉe la unua renkontiĝo kun la familio de mortinto mi tuj klopodas orientiĝi, kiun version mi uzos (tio signifas: kiom da mono mi prenos). Ĉar jam post la unua rigardo, kiam mi vidas meblojn en la loĝejo, la veston de tiu mortinto, la kvaliton de lia ĉerko (ĉar nun estas vendataj eĉ la kartonaj ĉerkoj, kaj mortinto povas elfali facile, antaŭ ol li kuŝos en la tombo) – mi povas taksi la ekonomian situacion de la familio. Kaj mi – depende de tio, kion mi vidis – proponas version pli longan aŭ pli mallongan. Mi nur diros, ke per tri nekrologoj kun pli longa versio mi pagas la monatan fakturon pri uzado de mia poŝtelefono. Jes, mia kara, sufiĉas, ke iu mortu. La morto estis kaj estos. Nu, gloron al Dio! Kaj mi devas ekscii pri ĉiu forpaso kiel eble plej rapide kaj prezenti al la familio mian proponon de konvena nekrologo.

– Sed kiel vi estas informita, kiu forpasis kaj kie loĝas la familio de la mortinto? – mi demandis scivoleme.

– De amikoj, de la familio mem, el kadavrejo, sepulitejo, hospitaloj – de ĉie, kie eblas! Ĝuste tial mi aĉetis poŝtelefonon. Ĉar se mi ne scias, kiel gardema vi estas, se vi ne havas la propran reton da informantoj, vi ne kaptos okazon eĉ por unu nekrologo semajne. Komence mi kuradis al hospitaloj. Sed iam malsanulo kun nemaligna tumoru en la cerbo divenis la veran celon de miaj vizitoj, kaj de tiam mi ne starigis piedon en tiu hospitalo (mi ne forgesos lian rigardon, plenan je malamo, kaj mi deziras tutkore, ke la ulo kun tumoru en la cerbo forpasadu malrapide kaj suferegu, revante pri la morto kiel pri savo). Nun mi kolektas informojn de aliaj personoj. Per mia poŝtelefono. En ĉiu hospitala fako, grava por mi: ĥirurgio,

kardiologio, onkologio (kiu estas la plej granda liveranto) mi havas flegistinon. Ili antaŭsciigas min pri forpaso okazantaj pli frue aŭ pli malfrue, ili diras: „paciento Iks kun la adreso... kuŝas en komato, pretigu vin jam baldaŭ” – kaj mi kompreneble motivigas ilin per mono. Bedaŭrinde, neniam estas la plena certeco. Ofte flegistinoj – pro granda monavido – ne parolas la veron, kaj la naturo mem aranĝas miraklojn. Okazas, ke malsanuloj kun nemaligna tumoru subite kaj silente mortas noktomeze, aŭ inverse, tiuj, kies forpaso estas atendata ĉiun tagon, por mirego de la tuta familio ne povas ellasi dum monatoj sian lastan spiron (kompreneble en tia okazo miaj flegistinoj perdas la gajnitan monon kaj konfidon). Ĉiuokaze, amiko, en tia laboro oni ne povas malzorgi informon, eĉ se ĝi estus – mi ne scias, kiel banala. Gravas nur mono. Ekzemple antaŭ kelka tempo, mi vizitis mortintinon, por proponi al la familio konvenan nekrologon, mi aŭdis, ke ŝi batalis en la naci-liberiga milito. Do, mi tuj prezentis la version: *Forpasis veteranino de la Naci-Liberiga Milito, lasante nekonsoleble sian familion kaj la ceterajn veteranojn en la tuta lando* – nu, kaj okazis glate: la proksimuloj sen grumbleto konsentis pri la dezirata sumo. De tiu okazaĵo ĉiam, antaŭ ol mi prezentos la oferton, mi petas la proksimulojn de mortinto pri jenaj indikoj: 1. Ĉu li/ŝi batalis en la partizana movado? 2. Ĉu li/ŝi ricevis ŝtatajn premiojn kaj distingojn? 3. Ĉu al li/ŝi ricevis internaciajn premiojn? 4. Se jes, do kiujn distingojn kaj honorajn titolojn? 5. Kie estas kamaradoj el la batalkampo? 6. Kiu institucio donis premion aŭ medalon? Ĉio tio donas ŝancon pligrandigi la nombron da vortoj. Lastatempe mi ankaŭ eksciis, ke multaj albanoj ricevas internaciajn titolojn: „Eminenta Persono de la Terglobo”, „Eminenta Persono de la Jarcento”. Ĉi titoloj estas donataj amase en Oksfordo, Kembriĝo kaj nur Dio scias, kie ankoraŭ, kaj se plu okazados tiel, ni havos Eminentan Personon de la Terglobo en ĉiu ŝtuparejo. Ho, Dio, kion mi aŭskultas en la tempo de la ŝanĝoj, Yllo! Tio kompreneble tuj donas al mi la eblecon de novaj versioj de miaj nekrologoj. De tiam mi aperigis dufoje la vortojn: *Forlasis nin Eminentan Personon de la Jarcento, dronigante sian familion kaj samlandanojn en malĝojon kaj malesperon*. Certe baldaŭ aperos denove tiaj favoraj okazaĵoj, kaj mi ne cedos.

– Tion mi ne dubas – mi konfirmis.

– Pri ĉio mi eksciis hazarde, kiam mi iris legi tomboplatojn kaj vidis ies enterigon.

– Vi legis tomboplatojn? Kiucele?

– Por vidi, kio estas surskribita. La nacio scias, kiel la forpason de siaj proksimuloj priplori kun doloro kaj malespero tiel dolĉa, ke neniu poeto en la mondo povus elpensi tion. Kiam vortoj mankas al vi, kaj vi komencas ripetadi la antaŭajn frazojn, ne malutilos enprofundiĝi en popolajn fontojn. La popolo skribas elkore kaj gravuras tion en ŝtonon. Ho, kia magio de vortoj! Por mi ĉiam estas la fonto de inspiro, ĉar

mia laboro ja estas – mi povus diri – „enkonduko al tomboŝtonoj”. Nu, pri kio mi finis? – demandis la poeto.

– Pri internaciaj titoloj! – mi respondis.

– Ĝuste! – li daŭrigis – kiel mi jam diris, serĉante inspiron en tomboplatoj mi partoprenis ies enterigon. En iu momento proksimulo de la mortinto komencis sian funebran omaĝon per la vortoj, kiuj pensigis min: „Gesinjoroj, forlasis nin la Eminentia Persono de la Jarcento, por ĉiam forpasis nia kompatinda Sotiraq”. – Kiel Sotiraq fariĝis la Eminentia Persono de la Jarcento – la poeto ne ĉesis paroli – mi eksciis de apude staranta amiko de la mortinto. Jen li ricevis el Oksfordo blanketon kun stampaĵo kaj dediĉo: *Al Sotiraq R., Eminentia Persono de la Jarcento*. Estis aldonita la fakturo je 500 dolaroj. Nia mortinto kun granda peno (dum la tuta vivo li laboris kiel librotenisto en agrokultura entrepreno) kolektis la necesan sumon, sed bedaŭrinde li ne povis ĝojigi sin per la medalo – li ellasis sian lastan spiron du tagojn antaŭ ol venis la sendaĵo.

Post momento la poeto suspiris:

– Sed estas bonuloj kaj fiuloj, Yllo. Mi renkontas familiojn tiel malavarajn, ke ili sovaĝe kverelas pri ĉiu aldonita vorto. Tiel okazis, kiam mi malkovris, ke iu mortintino estis veteranino kaj mi proponis la version: *Mortis veteranino de la Naci-Liberiga Milito, lasante en funebro sian familion kaj la ceterajn veteranojn*. Kiam ili nur eksciis, kiom multe kostos ĉiu aldonita vorto, sencere monie ili mallongigis la nekrologon: *Mortis veteranino de NLM. La familio kaj veteranoj de M.*

– Kaj okazas ankaŭ pli malbone – en tiu momento la vizaĝo de la poeto esprimis senliman malĝojon. – Kompreneble ĉiu laboro, ankaŭ la mia, povas esti danĝera. Ĉu vi vidas ĝin? – li demandis, montrante per fingro la cikatron super la okulo.

– Jes – mi respondis.

– Ĝi atestas, kiel sovaĝa popolo ni estas. Por diri la veron, mi faris eraron kiel la unua, sed tiajn arogantecon kaj agresemon de proksimuloj de tiu mortinto kontraŭ mi pravigas nenio. Nenio!

– Cetere tio okazis al mi nur unufoje – daŭrigis la poeto. – Kulpas la distrita kaj mortebria estro de la kadavrejo. Ĉar kiam li telefonis al mi kaj elbalbutis: „Finiĝis Nuri el la onkologio, ĵus alportita”, estis klare, ke mi trovis lin viro. Kun la familio mi decidis telefone pli longan version, mi aperigis la nekrologon: *Mortis Nuri P.O., kial vi vundis al ni la animon, ho Nuri, ho edzo, ho frato, ho patro? Kial? La familio P., kaj la sekvan tagon montriĝis, ke mortis virino kaj ŝi havis la nomon Nuria, kaj ne Nuri.*

– Tuj poste, kiam mi eksciis, tutkore mi petis la familion pri la pardono kaj klopodis ĉion mildigi promesante la novan nekrologon kun la versio por virinoj (*Ho, kial vi vundis al ni la animon, ho Nuria, ho edzino, ho fratino, ho patrino? Kial?*),

kaj poste, kiam ili ne deziris tion, proponante la ĝustigon: *Petante la pardonon de la familio de la mortinto ni informas, ke la hieraŭa nekrologo n-ro... estu legata kun jenaj ŝanĝoj: la vorton „edzo”, anstataŭigi per „edzino”, la vorton „frato” per „fratino”, la vorton „patro” per „patrino”. La ceteraj vortoj restas neŝanĝitaj* (mi estis certa, ke tio ne nur redonos la bonan nomon al la familio, sed ankaŭ ne subfosos la konfidon al la gazeto). Tamen la proksimuloj de Nuria, kiuj antaŭe minacis al mi, ke ili mortigos min „pro la ridindigo kaj humiligigo de la digno de ilia familio”, ekhavis atakon de furiozo. „Kion ankoraŭ deziras ĉi tiu fuŝulo! Li ridindigis nin kaj volas, ke ni estu mokataj ĝis la vivofino?!”

– Nu kaj bum! – kun pugnoj ili atakis min.

– Kaj pro tio vi havas la cikatron.

Nun la poeto finis sian malgajan historion pri tiu miskompreno kaj eksilentis, montrante ke li jam havas nenion por aldoni.

Ankaŭ mi silentiĝis.

Venis la momento por adiaŭi, – Ĝis revido – mi diris – mi iom frostas.

– Ĝis revido! – diris la poeto – proksimiĝas vintro, estos pli kaj pli multe da laboro ...

Ĝoje li kunfrotis siajn manojn kaj foriris per la dignaj paŝoj de poeto.



elalbanigis **Bardhyl Selimi** (Albanio)

## Guy de Maupassant (1850-1893)



### Du amikoj

Parizo estis sieĝita, malsatinta kaj ĝeminta. La surtegmentaj paseroj fariĝis tre raraj. La ratoj en la kloako estis ne troveblaj plu. Oni manĝis kion ajn ili trovis.

S-ro Morissot profesiis kiel horloĝisto kaj okaze militservis en la nacia armeo de sindefendo. En serena mateno de januaro, ĝuste kiam li triste laŭ ekstera bulvarado estis promenanta, kun malplena

*aŭtoro, Guy de Maupassant*

ventro, kaj kun du manoj en pantalonpoŝoj de uniformo, li subite ĉesis siajn paŝojn antaŭ k-do, kiun li rekonis kiel amikon. Jen estis S-ro Sauvage, konato konatiĝinta ĉe la bordo de rivero.

Ĉiudimanche, antaŭ la milito, Morissot frumatene eliris, preninte fiŝkanon el bambuo per la mano kaj preninte surdorse skatolon el blanka fero. Li veturis al Argenteuil en vagonaro kaj elvagonariĝis je la stacidomo Colombes, poste li piediris al la insulo Marante. Li komencis fiŝhoki, tuj post alveno al ĉi tiu loko de sia revo. Li fiŝhokis ĝis vesperigo.

Ĉiudimanche, li ĉiam tie renkontis dikan kaj gajan malgrandulon, S-ro Sauvage. Li estis merceristo sur la strato Nia Damo de Lorette, ankaŭ li estis fanatika fiŝhokulo. Kaptinte fiŝkanon per sia mano, kun du piedoj pendinte malsupren en la fluo, ili ofte pasis duontagon ŝultro ĉe ŝultro; tiel inter ili estiĝis amikeco.

Iuj tagoj, ili ne parolis. Iutempe, ili babilis. Kvankam ili nenion parolis, tamen ili admirende akordiĝis, ĉar ili havis similajn gustojn kaj identajn sentojn.

Matene de printempo, ĉirkaŭ la deka horo, kiam la rejuniĝa suno faris ŝvebi sur la trankvila rivero nebuleton fluintan kun akvo, sunlumo verŝis sur la dorson de du fanatikaj fiŝhokuloj kaj sentigis al ili varmecon de nova sezono. Morissot iutempe diris al sia najbaro: “Ha! Kia komforto!” kaj s-ro Sauvage respondis: “Estas nenio pli bona ol tio.” Kaj tio sufiĉas por interkompreniĝi kaj reciproke respekti.

En aŭtuno, ĉe la krepusko, kiam la subiranta suno ruĝigas la ĉielon, ĵetis en akvon respogulon de skarлата nubo, la tuta rivero estis purpurigita, ekflamigis la horizonton, ruĝigis la du amikojn kiel fajro kaj jam origis la folifalantajn arbojn, kiu susure tremis de frosta vento. S-ro Sauvage rigardis kun rideto al Morissot kaj diris: “Kia

pejzaĝo!” Kaj, kun du okuloj fiksrigardantaj sian flosilon, Morissot mirplene respondis: “Tio estas multe pli bona ol la avenuo, ĉu ne?”

Tuj kiam ili konatiĝis unu kun alia, ili energie premis la manon. Ili ekstreme emociiĝis pro renkontiĝo en tiel malsamaj cirkonstancoj. S-ro Sauvage ekĝemis kaj murmuris: “Vere estas eventplena aŭtuno!”. Morissot estis tre morna kaj ĝemis: “Kia vetero! Hodiaŭ estas la unua bona tago de la kuranta jaro.”

La ĉielo ja estis tute lazura kaj pleniĝis de sunlumo.

Ili pensoplene kaj triste marŝis ŝultro ĉe ŝultro. Morissot daŭrigis: “Fiŝhoki? Ho! kiel bona rememoro!”

S-ro Sauvage demandis: “Kiam ni reiros?”

Ili eniris en kafejeton kaj kune trinkis absinton, kaj poste ili promenis sur la trotuaroj.

Morissot subite haltis kaj diris: “Nu, ĉu ni trinkos alian glason da absinto?” S-ro Sauvage konsentis pri tio: “Laŭ via bontrovo.” Kaj ili eniris en alian drinkejon.

Elirante, ili estis forte kapturna, konfuza kiel homoj, kiuj estis plena de alkoholaĵo je malplena stomako. Estis komforte. Venteto estis juke karesanta ilian vizaĝon.

S-ro Sauvage estis ebriiĝita de milda vento kaj haltis: “Ni iras tien, ĉu bone?”

— Kien?

— Iru fiŝhoki do.

— Sed kien?

— Al nia insulo. La avangardaj taĉmentoj francaj estas najbare de Colombes.

Mi konas la kolonelon Dumoulin; oni lasos nin facile pasi.”

Morissot tremis de deziro kaj diris: “Konsentite. Mi certe venos.” Kaj ili disiĝis por preni ilian fiŝhokilon.

Post unu horo, ili ŝultro ĉe ŝultro marŝis sur la vojo. Poste ili venis en la vilaon, kiun la kolonelo okupis. Li iom ridis pri ilia peto kaj konsentis ilian fantazion. Portante paspermeson, ili ree ekmarŝis.

Baldaŭ ili trapasis la avangardajn taĉmentojn, transiris dezertan Colombes, kaj troviĝis ĉe la bordo de vinberkampetoj, kiu oblikvis al Seine. Tiam estis ĉirkaŭ la dekunua horo.

En kontraŭa flanko, la vilaĝo Argenteuil ŝajnis mortinta. La altaĵoj al Orgemont kaj Sannois rigardis malsupren al la tuta regiono. La granda ebenaĵo, kiu rekte etendiĝis ĝis la Nanterre estis malplena, tute malplena, kun nudaj ĉerizujoj kaj ĝia griza grundo.

Montrante per fingro la montpintojn, s-ro Sauvage murmuris: “La prusoj estas tie supre!” Du amikoj maltrankviliĝis kaj paraliziĝis antaŭ ĉi tiu dezerta loko.

“La prusoj!” Ili neniam vidis la prusojn, sed de pluraj monatoj ili sentis, ke prusoj estis tie, ĉirkaŭ Parizo, ruinigis Francion, rabinte, masakrinte, kaj malsatiginte. Tiuj

ĉi homoj estis nevideblaj kaj ĉiopovaj. Kaj specon da superstiĉa teruro ili aldonis al la malamo, kiun ili jam havis kontraŭ ĉi tiu nacio nekonata kaj venka.

Morissot balbutis: “Ha! Se ni renkontas prusojn, kion fari?”

S-ro Sauvage respondis kun tia tono pariza ŝerceme ĉiaokaze: “Ni oferas al ili frititan fiŝon.”

Sed ili, timigita per la silento de ĉirkaŭaĵo, hezitante, ne kuraĝis fari aventuron sur la kampo.

Fine, s-ro Sauvage decidis: “Iru, ekiru! Sed iru zorgeme.” Sekve ili malsupreniris sur la kampo de vinbero, kliniĝinte kaj rampinte, utiliginte arbetojn kiel ŝirmadon, per okuloj maltrankvile rigardante ĉirkaŭen, streĉante la orelojn.

Nun nur transirinte pecon da tero nuda ili povis alveni al la bordo de la rivero. Ili ekkuris; kurinte al la kruta bordo, ili tuj kaŭris en la sekan fragmitaron.

Morissot gluis sian oreleon sur la tero por aŭskulti ĉu iuj marŝis en la ĉirkaŭo. Li nenion aŭdis. En la ĉirkaŭo estis neniu alia krom ili ambaŭ.

Trankvilaj, ili ekfiŝokis.

En ilia kontraŭa flanko la forlasita insulo Marante kovris la rigardon. La dometo de la restoracio estis fermita, kiu ŝajnis forlasita dum pluraj jaroj.

S-ro Sauvage prenis la unuan gobion, Morissot kaptis la duan, kaj ili de tempo al tempo levis iliajn fiŝkanojn kun arĝenthela skuinta besteto sur la fino de la fiŝfadeno: vera fiŝhokaĵo mirakla.

Ili delikate enmetis fiŝojn en retsakon, kun tre kompaktaj maŝoj, kiu estis trempita en akvon sub iliaj piedoj. Kaj plezurega ĝojo penetris en ilian koron, ĉi tiu estis ĝoja animstato, kiun oni kaptis kiam oni retrovis plezuron, kiun oni estis forpreninta de ili delonge.

La varmeta suno sunumis iliajn ŝultrojn komferte varma; ili nenion plu aŭskultis; ili ne pensis plu pri io ajn; ili ignoris ĉiujn aliajn aferojn en la mondo; ili sciis nur fiŝhoki.

Sed subite, surdiga bruoj, kiu ŝajnis veni de subtero, tremigis teron. La kanono rekomencis sonori.

Morissot la kapon turnis malantaŭen, kaj rigardante de supro de la kruta bordo, li vidis tie, maldekstre, la grandan silueton de la monto Val ĉrien, kiu portis supre sur la monto tufon da blankaj egretoj, kiu tuj ŝprucis el faŭko de kanono pulvofumon.

Kaj sekve de tio troviĝis alia tufo da fumo, kiu ŝprucis el supre de la fortigaĵo; post momento nova rulado de detonacio.

Poste, konstante, kaj de tempo al tempo, la monto ĵetis sian haladzon de morto, blovetis sian vaporon, kiu malrapide leviĝis en la kvieta ĉielo, fariĝis nebulo supre sur ĝi.

S-ro Sauvage levis la ŝultrojn kaj diris: “Jen, ili ekagas denove.”

Morissot, kiu maltrankvile rigardis la plumon de sia flosilo profundigis malsupren unu post alia, la pacema homo abrupte koleris kontraŭ ĉi tiuj rabiuloj, kiuj tiel interbatigis, kaj li grumbliis: “Kiel stultaj ili estas por buĉi unu la alian.”

S-ro Sauvage ripetis: “Ili ja estas malpli bonaj ol brutoj.”

Morissot, kiu ĵus kaptis bramon, diris: “Pensu, ke ĉi tio estos por ĉiam tia, kondiĉe, ke ekzistas registaroj en la monto.”

S-ro Sauvage interrompis lin: “Se troviĝus la respubliko, ĝi ne povus deklari militon ...”

Morissot interrompis: “Havante la reĝojn, oni militas eksterlanden; havante la respublikon, oni militas en la lando.”

Ili paceme ekdiskutis, malkonfuzinte la grandajn problemojn politikajn kiel bonkoraj homoj kun sana racio kaj limigita povo; ili venis akorde al la konkludo, ke oni estos neniam liberaj. Kaj sur la monto Valerien kanonoj tondris senĉese, bombardis pere de bomboj la francajn domojn, frakasis la vivojn, detruis la estaĵojn, finis multe da revoj, ĝojoj kaj feliĉoj, kiujn oni atendis kun espero. Senfina sufero ankoraŭ trafis virinojn, filinojn kaj patrinojn en alia lando.

“Tio estas la vivo.” diris s-ro Sauvage.

“Tio estas nenio alia ol morto,” ridante diris Morissot.

Tiam ili tremis de timo pro la sento, ke iuj alpaŝis malantaŭ ilia dorso. Turninte la okulojn, ili trovis kvar homojn, kvar armitajn altkreskulojn barbajn, vestitajn kiel servistoj, portantajn livreojn kaj kaskedojn. Ili staris tuj ĉe iliaj ŝultroj, al ili celante la tubaperturojn de siaj pafiloj.

La du fiŝkanoj defalis de iliaj manoj kaj falis en la riveron.

Nelonge poste, ili estis kaptitaj, ligitaj, elportitaj, ĵetitaj en barkon kaj transportitaj sur la insulon.

Malantaŭ la domo kiun ili estis opiniinta forlasita, ili trovis ĉirkaŭ dudek germanajn soldatojn.

Haroza giganta ulo, kiu fumis grandan pipon el porcelano, rajdante sur seĝo, demandis per pura franclingvo: “Tre bone, sinjoroj, vi bone fiŝhokis?”

Tiam soldato metis ĉe la piedoj de oficiro retsakon plenan de fiŝoj, kiun li zorgeme reportis.

La pruso diris ridante: “He, he, mi vidas, ke tio iras ne malbone. Sed la problemo kuŝas en alia afero. Aŭskultu min kaj ne konfuzu.

Laŭ mi, vi estas du spionoj senditaj por gvati nin. Mi vin kaptas kaj mi vin pafmortigos. Vi ŝajnigas vin fiŝhoki por kaŝi viajn intencojn. Ĉar vi falas en miajn manojn, jen vi havas! Tio estas milito.”

“Sed ĉar vi estas eliri el la avangardaj taĉmentoj, vi certe havas la pasvorton por reveni. Vi ĝin diras al mi kaj mi pardonas al vi.”



Du amikoj, lividaj, silente staris ŝultro ĉe ŝultro, kaj kvar manoj iomete tremis pro tiko.

La oficiro plue diris: “Scios neniu pri tio, kaj vi povos pace reveni. La sekreto malaperos kun vi. Se vi rifuzas, tio estas nur vojo al morto, kaj vi tuj estas mortigota.. Elektu.”

Ili restis senmovaj, kaj ne malfermis la buŝon.

La pruso, ĉiam kvieta, diris montrinte la riveron per mano: “Pripensu, ke post kvin minutoj vi estos en fundo de la akvo. Post kvin minutoj! Vi certe havas gepatrojn kaj gefilojn?”

La kanonoj sur la monto Valérien tondris ĉiam.

Du fiŝhokuloj restis silentaj, starante. La germano donis ordonojn per sia lingvo. Poste li delokis sian seĝon por ne esti tro proksime de militkaptitoj; kaj dek du soldatoj venis kaj stariĝis dudek paŝojn fore de ili, kun pafiloj apogataj ĉe siaj piedoj.

La oficiro plue diris: “Mi donos al vi ankoraŭ unu minuton sen du sekundoj pli..”

Poste li abrupte leviĝis, aliris apud du francojn, prenis s-ron Morissot je la brako, tiris lin pli malproksimen, al li duonvoĉe diris: “Rapidu, kia estas ĉi tiu pasvorto? Via kamarado scios nenion, mi ŝajnage kompatos vin.”

Morissot respondis nenion.

Tiam, la pruso tiris s-ron Sauvage kaj metis la saman demandon al li.

S-ro Sauvage ne respondis.

Ili ree kune staris flanko ĉe flanko.

Kaj la oficiro komencis ordoni. La soldatoj levis siajn pafilojn.

Tiutempe la rigardo de Morissot hazarde falis sur la retsakon plenan de bramoj ankoraŭ en sovaĝherboj, je kelkaj paŝoj for de li..

Fasko da sunlumo igis brilantaj la amason da fiŝoj, kiuj ankoraŭ kapablis salteti. Kaj lin atakis sveneto. Kvankam li retenis laŭeble, en liaj okuloj tamen pleniĝis larmoj.

Li balbutis: “Adiaŭ, s-ro Sauvage.”

S-ro Sauvage respondis: “Adiaŭ, s-ro Morissot.”

Premante la manojn, ili pretervole senĉese tremis tra la tuta korpo.

La oficiro kriis: “ekpafu!”

Dek du pafiloj samtempe pafis.

S-ro Sauvage rigide falis vizaĝe alteren. Morissot, plialtstatura, ekskuinte, flankenfalas sur sian kamaradon, kun la vizaĝo al la ĉielo, dum multe da sango elfluis el la brusto de lia tuniko trapafita.

La germano donis novan ordonon.

Liaj soldatoj disiĝis, tuj poste revenis kun ŝnuroj kaj ŝtonpecoj, per kiuj ili alligis al la piedoj de du mortintoj; poste ili ree portis du mortintojn sur la krutan bordon.

La kanonoj sur la monto Val érien tondris senĉese, nun la monto Valérien kovriĝis per amaso da fumego.

Du soldatoj levis la kadavron de Morissot, unu je la kapo kaj alia je la gamboj; du aliaj soldatoj sammaniere levis s-ron Mauvage.

La kadavroj forte balanciĝis dum kelka tempo, kaj nelonge poste estis ĵetitaj malproksimen. La kadavroj, kvazaŭ en stara pozo, iris laŭ kurba linio en la aéro, kaj la piedoj alligitaj per ŝtonpecoj unue falis en la riveron.

La akvo de la rivero disŝpruciĝis, ondiĝis, kaj post momento kvietiĝis. Ondetoj disvastiĝis ĝis la bordoj de la rivero.

Iom da sango flosis sur la akvo.

La oficiro, ĉiam serena, duonvoĉe diris: “Estas vico de fiŝoj nun.”

Poste li revenis al la domo.

Subite li ekvidis la retsakon, kiu entenis bramojn en herboj. Li ĝin levis kaj pririgardis ĝin, kriis ridetinte: “Wilhelm!”

Unu soldato kun blanka antaŭtuko alkuris. Kaj la pruso ĵetis al li la fiŝojn kaptitajn de du ekzekutitaj homoj kaj ordonis al li: “Tuj fritu bone al mi ĉi tiujn bramojn, kiam ili estas ankoraŭ vivaj. Ĉi tio estos freŝa kaj bongusta.”

Post tio li refumis sian pipon.



elfrancigis **Leming Lin** (Ĉinio)

## Fratoj Grimm



*aŭtoroj, Fratoj Grimm*

„Aĥ, certe“, diris la knabino kun malgaja voĉo, „tion vi certe povas, sed mi ne konsilas tion al vi – ne eniru tien.“

„Kial mi ne eniru tien?“ demandis la reĝido.

La knabino ĝemis kaj respondis: „Mia duonpatrino entreprenas malicajn artojn, ŝi ne celas bonon al fremduloj.“

Jen li ja rimarkis, ke li venis al la domo de sorĉistino, sed ĉar estis tute malhele, kaj li ne plu povis daŭrigi la rajdadon kaj ankaŭ ne timemis, li enpaŝis. La maljunulino sidis sur apogseĝo apud la fajro kaj rigardis per siaj ruĝaj okuloj la fremdulojn.

„Bonan vesperon“, ŝi diris per knaranta voĉo kaj kondukis tute afable. „Sidiĝu kaj ripozu.“

Ŝi blovis sur la karbojn de la fajro, ĉe kiu ŝi kuiris ion en poteto. La filino avertis, ke ambaŭ estu atentemaj, ke ili ne manĝu aŭ trinku ion, ĉar la maljunulino miksas aĉajn trinkaĵojn.

Ili dormis trankvile ĝis la frua mateno. Kiam ili pretigis sin por la ekveturo kaj la reĝido jam sidis sur la ĉevalo, diris la maljunulino: „Atendu momenton“, mi volas transdoni ankoraŭ adiaŭan trinkaĵon al vi.“

Kiam ŝi alportis ĝin, la reĝido forrajdis, kaj la servisto, kiu ankoraŭ devis buki sian selon, ĉeestis ankoraŭ sola, kiam la malica sorĉistino donis al li la trinkaĵon.

## Enigma

Estis iam reĝido, kiu eksopiris vagadi en la mondo. Li kunprenis neniun krom sia fidela servisto. Iutage li hazarde retroviĝis en granda arbaro, kaj kiam vesperiĝis, li ne povis trovi tranoktejon kaj ne sciis, kie pasigi la nokton. Subite li vidis knabinon, kiu iris al dometo, kaj kiam li proksimiĝis, li vidis, ke la knabino estas juna kaj bela. Li parolis al ŝi: „Kara infano, ĉu mi kaj mia servisto povos trovi ĉi tie tranoktejon?“

„Tion portu al via mastro“, ŝi diris, sed en tiu momento ekkrevis la trinkglaso, kaj la veneno priŝprucis la ĉevalon kaj estis tiel mortiga, ke la besto tuj falis morta teren. La servisto postkuris lian mastron kaj rakontis al li, kio okazis. Sed li ne volis postlasi la selon kaj rekuris por kunpreni ĝin. Sed kiam li venis al la morta ĉevalo, jam sidis korvo sur ĝi kaj manĝis de ĝi. „Kiu sciu, ĉu ni hodiaŭ ankoraŭ trovos ion pli bongustan“, diris la servisto, mortigis la korvon kaj kunprenis ĝin. Tiam ili vagadis plu en la arbaro dum la tuta tago, sed ne povis eliri. Kiam ekvesperiĝis, ili trovis tavernon kaj iris en ĝin. La servisto donis la korvon al la tavernisto, por ke li pretigu ĝin por la vespermanĝo. Sed ili hazarde eniris murdistokaptilon kaj en la malhelo venis dek du murdistoj kaj volis mortigi la fremdulojn kaj prirabi ilin. Sed antaŭ ol ili faris tion, ili sidiĝis al la tablo kaj la tavernisto kaj la sorĉistino sidiĝis al ili kaj ili manĝis kune el pelvosupo, en kiu estis la hakita viando de la korvo.

Apenaŭ ili glutis kelkajn kulerplenojn, ili ĉiuj falis mortaj surplanken, ĉar en la korvo jam disvastiĝis la veneno de la ĉevala viando.

Estis nun neniu plu en la domo krom la filino de la tavernisto, kiu estis honesta al ili kaj ne partoprenis je la sendiaj aferoj. Ŝi malfermis al la fremduloj ĉiujn pordojn kaj montris al ili la amasigitajn trezorojn. Sed la reĝofilo diris, ke ŝi retenu ĉion, ke li ne volas havi ion de la trezoro. Kaj poste li forrajdis kun sia servisto.

Post kiam ili longe vagadis, ili venis al urbo, en kiu vivis bela, sed petola reĝidino. Ŝi heroldigis, ke tiu, kiu prezentos al ŝi enigmon, kiun ŝi ne povos solvi, fariĝos ŝia edzo. Sed, se ŝi solvos ĝin, oni lin senkapigos. Ŝi havis ĉiam tri tagojn por pripensi la respondon. Sed ŝi estis tiel inteligenta, ke ŝi ĉiam divenis la respondon de la enigmoj antaŭ la paso de la tempo. Jam naŭ edziĝemuloj mortis je tiu maniero, kiam la reĝido alvenis tien kaj blindigita de ŝia granda beleco, decidis riski sian vivon.

Li paŝis antaŭ ŝin kaj sciigis sian enigmon. „Kio estas tio“, li diris, „ĝi batis neniun kaj venkis tamen dek du.“ Ŝi ne sciis, kio ĝi estas, ŝi cerbumis kaj cerbumis, sed tamen ne trovis respondon. Ŝi malfermis siajn enigmolibrojn, sed ne estis skribita io pri tio. Koncize dirate, ŝia saĝeco finiĝis. Ĉar ŝi ne sciis, kiel helpi al si, ŝi komandis al sia servistino ŝteliri en la dormoĉambron de la sinjoro. Ŝi havis la taskon priaŭskulti liajn sonĝojn, ĉar la reĝidino pensis, ke li eble parolos en la dormo kaj elbabilos la enigmon. Sed la prudenta servisto sternis sin en la lito anstataŭ la mastro. Kaj kiam la servistino proksimiĝis, li forŝiris ŝian mantelon, en kiun ŝi vualis sin kaj elpelis ŝin per vipo.

En la dua punkto la reĝidino sendis sian ĉambristinon, kiu havis la taskon priaŭskulti lin pli sukcese. Sed la servisto ankaŭ de ŝi forprenis la mantelon kaj elpelis ŝin per vipo.

Nun la reĝido supozis, ke li sekuras en la tria punkto kaj tial li denove kuŝigis sin mem en la liton. Jen la reĝidino venis mem, ŝi surhavis nebule grizan mantelon kaj

sidiĝis apud li. Kaj kiam ŝi pensis, ke li dormas kaj songas, ŝi parolis kaj esperis, ke li respondos en songo, kiel tion faras multaj. Sed li ne dormis kaj aŭdis kaj komprenis ĉion tre bone.

Jen ŝi demandis: „Iu batis neniun.' Kio estas tio?“

Li respondis: „Korvo, kiu manĝis de morta kaj venenigita ĉevalo kaj mortis pro tio.“

Ŝi demandis plu: „Kaj venkis tamen dek du'. Kio estas tio?“

„Estas dek du murdistoj, kiuj manĝis la korvon kaj mortis pro tio.“

Kiam ŝi konis la solvon de la enigmo, ŝi volis forŝteligi, sed li firmtenis ŝian mantelon, tiel, ke ŝi devis postlasi ĝin.



Je la alia mateno sciigis la reĝidino, ke ŝi solvis la enigmon. Ŝi ordonis alveni la dek du juĝistojn kaj sciigis la solvon de la enigmo.

Sed la junulo petis pri tio, ke oni aŭskultu lin. Kaj li diris: „Ŝi nokte ŝteliris al mi kaj pridemandis min, ĉar alie ŝi ne estus trovinta la solvon.“

La juĝistoj diris: „Alportu pruvon pri tio.“

Tial la servisto alportis la tri mantelojn, kaj kiam la juĝistoj vidis tiun nebule grizan, kiun kutime surhavis la reĝidino, ili diris: „Ordonu ornami la mantelon per oro kaj arĝento, por ke ĝi fariĝu via nuptomantelo.“


*Originalo: Das Rätsel*

*Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj, Eldono lastmana, eldonejo Reclam*

## Pri museto, birdeto kaj rostkolbaso

Estis iam museto, birdeto kaj rostkolbaso, kiuj ekloĝis en komuna mastrumado. Longan tempon ili vivis bone kaj tre agrable en paco, kaj prosperis pli kaj pli bonstate. La laboro de la birdeto estis flugi ĉiutage en la arbaron kaj alporti lignon. La muso alportis la akvon, hejtis kaj kovris la tablon. La kolbaso havis la taskon kuir.

Tiu, kiu tro bonfartas, ĉiam sopiras novajn aĵojn! Do, iutage la birdeto renkontis survoje alian birdon, al kiu ĝi rakontis pri sia bonstateco kaj gloris ĝin. Sed la alia birdo insulte diris al ĝi, ke ĝi estas ŝtipkapa kompatindulo, kiu devas multe labori, dum la du aliaj hejme havas plaĉajn tagojn. Ĉar tiam, kiam la muso ekbruligis la fajron kaj portis la akvon en la domon, ĝi iris en sian ĉambreton por ripozi, ĝis oni alvokis ĝin kovri la tablon. La kolbaseto restis en la kuirejo, observis, ke la manĝo bone kuiriĝu, kaj kiam manĝotempo proksimis, ĝi moviĝis unufoje turniĝante per ĉiuj kruroj tra la kaĉo aŭ la legomo, kaj tiel la manĝo estis grasigita, salita kaj preparita. Kiam poste revenis la birdeto kaj demetis sian ŝarĝon, ili sidis ĉe la tablo kaj post la manĝo ili dormis ĉiuj siamaniere ĝis la alia mateno. Kaj tio estis grandioza vivo.



Je la sekva tago la birdeto pro ribeliga incito ne plu volis eliri por alporti la lignon, dirante, ke ĝi estis dum sufiĉe longa tempo servutisto kaj samtempe ilia pajaco, ke do foje necesas ŝanĝo kaj elprovo de alia maniero. Kaj kvankam la muso kaj ankaŭ la rostkolbaso tute rifuzis tion, la birdeto restis la gajninto; oni devis riski lotumadon kaj la loto falis sur la rostkolbason por alporti la lignon, la muso fariĝis kuiristo kaj

la birdo devis alporti la akvon.

Kio okazis? La rostkolbaseto foriris por la ligno, la birdeto ekbruligis fajron, la muso metis la poton sur ĝin kaj ili atendis ambaŭ, ĝis kiam la rostkolbaseto revenos hejmen kaj alportos la lignon por la sekva tago. Sed la kolbaseto restis tiom longe survoje, ke ili ambaŭ divenis malbonan, kaj la birdeto flugis iom sur la vojo renkonte al ĝi. Sed proksime ĝi trovis survoje hundon, kiu rigardis la kompatindan rostkolbaseton kvazaŭ liberan predon, kaj kiu kaptis kaj voris ĝin. La birdeto akuzis la hundon pro evidenta rabado, sed helpis neniu diro, ĉar la hundo asertis, ke li trovis falsigitajn leterojn ĉe la rostkolbaso, tial ĝi devis pagi per sia vivo.

La malgaja birdeto levis la lignon, flugis hejmen kaj rakontis, kion ĝi vidis kaj aŭskultis. Ili tre afliktiĝis, sed certigis sin reciproke resti societo. Tial la birdeto kovris la tablon kaj la muso antaŭpreparis la manĝon kaj volis surtabligi ĝin, tiel, kiel antaŭe la kolbaseto. Ĝi provis serpentumi kaj gliti per la piedoj tra la legomo por grasigi ĝin, sed antaŭ ol ĝi atingis la mezon de la poto, ĝi devis halti kaj lasi la haŭton kun la felo kaj samtempe la vivon.

Kiam la birdeto venis hejmen kaj intencis surtabligi la manĝon, ne plu ĉeestis la kuiristo. La birdeto ĵetis konsternite la lignon tien kaj tien, vokis kaj serĉis la museton, sed ne plu trovis la kuiriston. Pro neatentemo la fajro tuŝis la lignon, tiel, ke ekestis brulo; la birdeto rapidis por alporti akvon, sed la sitelo falis en la puton kaj la birdeto kun ĝi, ĝi ne plu povis rekapti fortojn kaj dronis tie.

*Originalo: Von dem Mäuschen, Vögelchen und der Bratwurst*

*Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj, Eldono lastmana, eldonejo Reclam*

## SinJORINO Holle

Vidvino havis du filinojn, unu el ili estis bela kaj diligenta, kaj la alia malbela kaj maldiligenta. Sed ŝi multe pli amis la malbelan kaj maldiligentan, ĉar ŝi estis ŝia propra filino. Kaj la alia devis fari ĉiujn laborojn kaj estis la cindrulino en la domo. La kompatinda knabino devis sidiĝi ĉiutage sur la granda vojo apud la puto kaj ŝpini tiom multe, ke la sango fluis el ŝiaj fingroj. Iam okazis, ke la spindelo estis tute sanga. Tial ŝi kliniĝis en la puton kaj volis lavi ĝin. Sed la spindelo saltis el ŝia mano kaj falis malsupren. Ŝi ekploris, kuris al la duonpatrino kaj rakontis al ŝi pri la malfeliĉo.

La maljunulino riproĉis la knabinon tiel insulte kaj senkompatate, ke ŝi diris: „Ĉar vi lasis fali la spindelon en la puton, ankaŭ reportu ĝin de tie.“

La knabino reiris al la puto kaj ne sciis, kion fari; kaj pro sia ankora timo ŝi saltis en la puton por reporti la spindelon. Ŝi malkonsciiĝis kaj kiam ŝi rekonsciigis, ŝi troviĝis sur bela herbejo, kie brilis la suno kaj videblis multaj miloj da floroj. Sur tiu herbejo ŝi iris plu kaj venis al bakforno, kiu estis plena de panoj. Kaj la panoj vokis: „Aĥ, eltiru min, eltiru min, alie ni forbrulos. Ni estas jam de longa tempo elbakitaj.“

Jen ŝi alpaŝis la fornon kaj eltiris per panŝovelilo iom post iom ĉiujn panbulojn.

Poste ŝi iris plu kaj venis al fruktarbo, kiu estis plena de pomoj, kaj vokis la knabinon: „Aĥ, skuu min, skuu min, miaj pomoj ĉiuj estas maturaj.“

Ŝi skuis la arbon tiel, ke la pomoj tiel falis kvazaŭ pluvus. Ŝi skuadis, ĝis kiam neniu pomo plu pendis supre; kaj kiam ŝi kunkolektis ĉiujn kaj kunmetis ilin, ŝi iris plu. Fine ŝi atingis malnovan domon, el kiu rigardis maljunulino. Sed ĉar la maljunulino havis tre grandajn dentojn, ŝi ektimis kaj volis forkuri. Sed la maljunulino postvokis ŝin: „Kial vi timas, kara infano, restadu ĉe mi. Se vi faros ĉiujn laborojn en la domo laŭorde, vi fartos bone. Vi devos atenti nur, ke vi laŭorde pretigu mian litaĵon kaj diligente skuadu ĝin, por ke la lanugoj flugu, tiuokaze neĝos en la mondo; mi estas sinjorino Holle.“

Ĉar la maljunulino tiel trankvilige parolis al ŝi, la knabino ekkuraĝiĝis, konsentis kaj komencis sian servadon. Ŝi efektive ĉion plenumis kontentige kaj ĉiam skuadis la liton tiom fortege, ke la lanugoj flugadis kiel neĝaj flokoj tien kaj tien; tial ŝi ankaŭ bone vivis sen aŭdi fian vorton, kaj ĉiutage ŝi manĝis boligitan kaj rostitan manĝon. Kiam ŝi estis jam dum kelke da tempo ĉe sinjorino Holle, la knabino fariĝis malgaja, kaj komence mem ne sciis, kio mankas al ŝi, fine ŝi ekkomprenis, ke temas pri hejmsopiro; kvankam ŝi fartis tie miloble pli bone ol hejme, ŝi tamen sopiris hejmen. Fine ŝi diris al la maljunulino: „Mi havas mizeran senton pro hejmsopiro, kaj eĉ, se mi fartus ĉi tie kiel ajn bone, mi tamen ne povus resti pli longan tempon, mi devos reiri al miaj hejmuloj.“

Sinjorino Holle diris: „Plaĉas al mi, ke vi havas hejmsopiron, kaj ĉar vi servis tiel fidele al mi, mi mem kondukos vin reen.“

Ŝi prenis ŝin ĉemane kaj kondukis ŝin al granda pordego. La pordego malfermiĝis, kaj kiam la knabino ĝuste staris sub ĝi, falis torenta oropluvo. Kaj la oro kroĉiĝis al ŝi tiel, ke ŝi baldaŭ estis tute kovrita de ĝi.

„Tion vi ricevas, ĉar vi estis tiel diligenta“, diris sinjorino Holle kaj redonis al ŝi la spindelon, kiu falis en la puton. Poste la pordego fermiĝis kaj la knabino troviĝis supre en la mondo, ne malproksime de la domo de la duonpatrino, kaj kiam ŝi aperis en la korto, sidis la koko sur la puto kaj kriis:

„Kikeriki,

*nia orknabino denove estas tie ĉie.“*

Ŝi eniris al sia duonpatrino, kaj ĉar ŝi estis tute kovrita per oro, ŝi estis bone akceptita de ŝi kaj de la duonfratino.

La knabino rakontis ĉion, kio okazis al ŝi; kaj kiam la patrino aŭskultis, kiel tiu granda riĉo ekestis, ŝi volis havigi al la alia malbela kaj maldiligenta filino la saman feliĉon. Ŝi devis sidiĝi al la puto kaj ŝpini. Por ke la spindelo fariĝu sanga, ŝi pikis en fingron kaj forte puŝis manon en dornoheĝon. Poste ŝi ĵetis la spindelon en la puton kaj saltis mem en ĝin. Ŝi alvenis, kiel la alia, sur belan herbejon kaj iris plu sur la sama vojo. Kiam ŝi atingis la bakforon, kriis la panoj denove: „Aĥ, eltiru nin, eltiru nin, alie ni forbrulos, ni estas jam de longa tempo elbakitaj.“



Sed la maldiligentulino respondis: „Kia propono, mi ne avidas malpurigi min.“

Foririnte, ŝi baldaŭ atingis la pomarbon, kiu vokis: „Aĥ, skuu min, skuu min, miaj pomoj ĉiuj estas maturaj.“



Sed ŝi respondis: „Tio plaĉus al vi, ĉu? Por ke pomo falu sur mian kapon, ĉu?“

Ŝi iris plu. Kiam ŝi atingis la domon de sinjorino Holle, ŝi ne timis, ĉar ŝi jam aŭdis pri ŝiaj grandaj dentoj kaj ŝi tuj dungigis sin. Je la unua tago ŝi kvazaŭ penis perforte. Ŝi estis diligenta kaj obeis sinjorinon Holle, kiam tiu ion diris al ŝi, ĉar ŝi pensis pri la oramaso, kiun ŝi donacos al ŝi; sed je la dua tago ŝi jam komencis esti maldiligenta, kaj je la tria eĉ pli, poste ŝi eĉ ne volis ellitiĝi matene. Ŝi ankaŭ ne pretigis la litajon tiel, kiel decas, kaj ŝi ne skuis ĝin, tial la lanugoj ne flugadis kiel neĝaj flokoj. Sinjorinon Holle tio baldaŭ tedis kaj ŝi maldungis ŝin. La maldiligentulino estis tute kontenta pri tio kaj opiniis, ke nun tuj sekvos la oropluvo. Sinjorino Holle kondukis ankaŭ ŝin al la pordego, sed kiam ŝi staris sub ĝi, verŝiĝis el granda kaldrono anstataŭ la oro peĉo.

„Jen la rekompenco por via servado“, diris sinjorino Holle kaj fermis la pordegon. Kiam la maldiligentulino venis hejmen, ŝi estis tute kovrita per peĉo kaj la koko sur la puto kriis:

„Kikeriki,  
nia malpura knabino denove estas tie ĉi.“

Sed la peĉo kroĉiĝis al ŝi, kaj tiom longe, kiom ŝi vivis, ĝi ne lasis forigi sin de ŝi.  
*Originalo: Frau Holle*

*Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj, Eldono lastmana, eldonejo Reclam*



elgermanigis **Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser** (Germanio)

kontrolis **Vladimir Türk**

## Pearl S. Buck (1892 – 1973)



*aŭtorino, Pearl S. Buck*

### Vento orienta – Vento okcidenta (1)

#### Antaŭparolo

*Pri la aŭtorino kaj ŝia verko*

Kvankam la gepatra lingvo de Pearl S. Buck estis la usona angla, sed ŝia denaska lingvo estis ankaŭ la ĉina. La gepatroj, loĝinte multajn jarojn en Ĉinio, revenis al Usono por naski bebon, kaj kiam la infano aĝis 5 monatojn ili reiris al Ĉinio. La infano havis flegistinin, kiu parolis nur la ĉinan. La

aŭtorino skribas, ke kiam ŝi ludis kun la infanoj en sia kvartalo ŝi sentis sin tute ĉina. La patrino instruis al ŝi la anglan kaj venigis instruiston por instrui al ŝi la klasikan ĉinan.

Pro ŝia klereco ŝi estis do en bona pozicio por kompreni la du kulturojn, kiuj reprezentas la fonon de ŝiaj rakontoj. La tempo de la romano estas la fino de la 19-a jarcento kiam Ĉinio malfermiĝis al la Okcidento. La premo de la ŝanĝanta mondo kaj la malemo de ĉinaj junuloj edukitaj en Okcidento submeti sin al arkaikaj farmanieroj kaŭzas kulturkonflikton. La protagonistoj spertas la streĉon inter tradicia obeemo al familio kaj klano, kaj la nove trovita vojo de scienco kaj memevoluo.

En siaj verkoj, Pearl S. Buck volas klarigi la Orienton al okcidentuloj kaj inverse. La genio de Buck estas, ke ŝi skribas el la vidpunkto de ĉinino, kio kapabligas al okcidenta leganto ekzameni sian propran kulturon kvazaŭ fremdan.

#### Antaŭparolo de la tradukisto

En la angla originalo la vortelektio estas ofte nekutima. En la buŝon de kampanano, la verkistino metas vortojn, kiujn anglalingva leganto devas serĉi en la vortaro. Ŝi iam notis, ke ĉina analfabeta kampanano havas pli grandan vortostokon ol usona studento. Kiam Buck uzas esprimon, kiu estas tro nekutima en la angla, mi priserĉis

tion, kaj multfoje trovis, ke ĝi estas laŭvorta traduko el la ĉina. En tiu okazo ankaŭ mi tradukis laŭvorte kaj metis piednoton kun aldona informo.

Komunaj vortoj uzataj kiel titolo estas skribitaj majuskle: Unua Sinjorino, Etedzino ktp. Same kun abstraktaĵoj kaj imagitaj lokoj: Flava Fonto = lando de la mortintoj.

En ĉi tiu romano la aŭtorino uzas ĉinajn ekkriajn vortetojn kies uzo estas subtila kaj komplika. Ili restas netradukitaj en aliaj tradukoj naciaj, kaj tial mi decidis fari same por la esperanta versio. Mi volas danki al Benjamin Irwin kiun mi konsultis pri tio.

## VENTO ORIENTA – VENTO OKCIDENTA

### Ĉapitro 1

#### Ĉina virino parolas

Pri tiuj aferoj mi kapablas paroli al vi, Fratinjo. Mi ne povis tiel paroli eĉ al iu el mia propra popolo, ĉar ŝi ne povus kompreni la forajn landojn, kie mia edzo loĝis dum dek du jaroj. Mi nek povis libere paroli al unu el la fremdlandaj virinoj, kiuj ne konas mian popolon kaj la vivstilon kiujn ni havis ekde la tempo de la malnova empirio. Sed vi? Dum via tuta vivo vi loĝis inter ni. Kvankam vi apartenas al tiuj aliaj landoj, kie mia edzo studis siajn okcidentajn librojn, vi komprenos. Mi parolas la veron. Mi nomis vin Fratinjo. Mi diros al vi ĉion.

Vi scias, ke dum kvincent jaroj miaj adorataj prapatroj vivis en ĉi tiu malnovega urbo de la Meza Regno. Ne eĉ unu el la respektinduloj estis moderna, kaj ne havis deziron ŝanĝi sin. Ili ĉiuj vivis kviete kaj digne, memfidaj pri sia morala pravenco. Tial miaj gepatroj edukis min pri ĉiuj la honorataj tradicioj. Eĉ ne en sonĝo mi povus deziri esti alie. Sen pensi pri la afero, ŝajnis al mi, ke kiel estis mi, tiel estis ankaŭ ĉiuj veraj homoj. Se mi aŭdis mallaŭte, kvazaŭ el la malproksimo ekster la kortaj muroj, pri virinoj malkiel mi, virinoj kiuj venis kaj iris libere kiel viroj, mi ne konsideris ilin. Mi kondutis, kiel oni instruis min, laŭ la manieroj de miaj prauloj. Nenio el la ekstera mondo iam tuŝis min. Mi deziris nenion. Sed nun la tago estas alveninta, kiam mi avide rigardas tiujn strangajn kreitaĵojn, tiujn modernajn virinojn, kaj mi serĉas kiel mi povas fariĝi kiel ili. Ne pro mi mem, Fratinjo, sed pro mia edzo. Li ne konsideras min bela! Tio estas ĉar li transvojaĝis la Kvar Marojn<sup>1</sup> al la aliaj

---

<sup>1</sup> La Kvar Maroj (ĉine: 四海; pinjine: Sìhǎi) estas kvar korpoj de akvo, kiuj metafore konsistigas la limojn de antikva Ĉinio; nur du rilatas al veraj lokoj. “Tero inter la kvar maroj” estas literatura nomo por Ĉinio. el Vikipedio

kaj eksteraj landoj, kaj en tiuj foraj lokoj li lernis ami novajn aferojn kaj novajn kutimojn.

Mia patrino estas saĝa virino. Kiam dekjaraĝa mi ĉesis esti infano kaj fariĝis fraŭlineto, ŝi diris ĉi tiujn vortojn al mi, “En la ĉeesto de viroj, virino devas konservi florecan silenton kaj devas modeste retiriĝi, laŭ eble plej frue, sen kaŭzi konfuzon.”

Memorante kion ŝi diris, mi staris antaŭ mia edzo kun klinita kapo kaj metis la du manojn antaŭ mi. Kiam li alparolis min, mi respondis nenion. Sed ve, mi timas, ke li trovas mian silenton teda!

Kiam mi ekzamenas mian menson serĉante ion por interesi lin, ĝi estas subite senfrukta kiel la rizkampo post la rikolto. Kiam mi estas sola ĉe mia brodaĵo, mi elpensas multajn delikate belajn vortojn por diri al li. Mi diros al li kiel mi lin amas. Sed ne, notu bone, per la senhontaj vortoj kopiitaj de la rabema Okcidento, sed en kaŝitaj vortoj kiel tiuj:

“Mia sinjoro, ĉu vi rimarkis ĉi tiun tagon, kiel la krepusko komenciĝis? Ĝi estis kvazaŭ la malbrila tero saltis renkonte al la suno. Mallumis. Poste aperis faskoj da forta lumo, kiel subita eksono de muziko! Mia kara sinjoro, mi estas via malbrila tero, atendanta.”

Aŭ ĉi tiel, kiam li navigas sur la Lotusa Lago en la vespero:

“Kio okazus, se la pala akvo neniam sentus la lunon altiri ĝin? Kio okazus, se la ondo neniam plu estus vivigita per ĝia lumo? Ho, mia sinjoro, gardu vin, kaj revenu al mi sekure, tiel ke mi ne fariĝu tiu pala, febla aĵo sen vi!”

Sed kiam li eniras, portante la strangan fremdlandan veston, mi ne kapablas eldiri tiujn aferojn. Ĉu tio signifas ke mi estas edzino de fremdlandano? Liaj vortoj estas malmultaj kaj senzorge elparolataj, kaj liaj okuloj glitas tro haste super mi, kvankam mi portas mian persikokoloran satenon kaj havas perlojn en mia freŝe frizita hararo.

Tio estas mia malfeliĉo. Mi estas edzino dum apenaŭ unu monato, kaj mi ne estas bela en liaj okuloj.

Dum tri tagoj mi nun cerbumas, Fratinjo. Mi devas esti ruza kaj trovi manieron, por ke mia edzo rigardu min. Ĉu mi ne venas el multaj generacioj de virinoj, kiuj trovis favoron en la okuloj de siaj sinjoroj? Neniu el ili malhavis belecon dum cent jaroj, krom unu, kaj al tiu, Kŭej-mej en la epoko de Song<sup>2</sup>, variolo difektis la haŭton je la aĝo de tri. Tamen estas skribite, ke eĉ ŝi havis okulojn kiel nigrajn juvelojn kaj voĉon kiu tremetigis virajn korojn kiel la printempa vento en la bambuaro. Ŝi estis tiel kara al sia edzo, ke kvankam li posedis ses konkubinojn, kio estis konvena al lia riĉeco kaj rango, li amis neniun el ili kiel li amis ŝin. Kaj mia praulino, Jang Kŭej-fej, kiu portis sur la pojno blankan birdon, tenis la tutan empiron en siaj parfumitaj

---

<sup>2</sup> Dinastio Song: 960 -1279

manplatoj, ĉar la imperiestro, la Filo de la Ĉielo<sup>3</sup>, frenezis pri ŝia beleco. Tial mi, la plej malinda el tiuj honorindulinoj, devas ankoraŭ havi ilian sangon en mia sango, kaj iliaj ostoj estas miaj ostoj.

Mi ekzamenis min en mia bronza spegulo. Ne estas pro mi, sed pro li, kiam mi diras al vi, ke mi konstatas ke aliaj estas malpli belaj ol mi. Mi vidas ke miaj okuloj estas klare difinitaj, la blanko disde la nigro; mi vidas ke miaj oreloj estas malgrandaj, kaj delikate premitaj al mia kapo, tiel ke la ringoj de jado kaj oro pendas proksime; mi vidas ke mia buŝo ankaŭ malgrandas kaj desegnas la aprobitan kurbon en la ovalo de mia vizaĝo. Mi deziras nur ke mi ne estu tiom pala, kaj ke la linio de la brovoj estu okono da colo pli longa, pli proksime al la tempioj. Mi korektas mian palecon per iom da vermiljono frotita per la manplato kontraŭ la vangoj. Broso trempita en nigra koloro perfektigas miajn brovojn.

Mi estas do sufiĉe bela, kaj preparita por li. Sed tuj kiam li rigardas min, mi perceptas ke li observas nenion, nek lipojn nek brovojn. Liaj pensoj vagas trans la teron, trans la maron, ĉie krom kie mi atendas lin!

Kiam la geomanciisto<sup>4</sup> determinis la tagon de mia nupto, kiam la ruĝe lakitaj skatoloj estis plenplenaj, kiam la satenaj peplomoj<sup>5</sup> kun ruĝaj floroj estis alte stakigitaj sur la tablojn, kaj la nuptokukoj altaj kiel pagodoj, mia patrino petis min veni al sia ĉambro. Mi lavis la manojn, glatigis mian hararon kaj eniris ŝian loĝejon. Sidante en skulptita, nigra seĝo ŝi sorbis sian teon. Ŝia longa arĝente bindita bambupipo estis apogita kontraŭ la muro apud ŝi. Mi staris antaŭ ŝi kun mallevita kapo kaj ne aŭdacis malmodeste rigardi en ŝiajn okulojn. Tamen mi sentis ŝian rigardon kovri mian vizaĝon, mian korpon, miajn piedojn. Ĝia akra varmeco penetris mian koron tra la silento. Fine ŝi petis min sidi. Ŝi ludetis kun la akvomelonaĵ semoj en bovlo sur la tablo apud ŝi; ŝia vizaĝo estis kvieta en sia kutima esprimo de nepenetrebla tristeco. Mia patrino estis saĝa.

“Kŭej-lan, mia filino”, ŝi diris, “vi estas edziniĝonta al viro al kiu vi estis fianĉinigita antaŭ via naskiĝo. Via kaj lia patroj estis frat-amikoj. Ili ĵuris unuiĝi per siaj infanoj. Via fianĉo estis tiam sesjaraĝa. Vi naskiĝis en tiu sama jaro. Jen vi estis destinita por li. Oni edukis vin por tiu celo.

“Dum tiuj dek sep jaroj de via vivo, tiu horo de via edziniĝo estis en la fundo de mia menso. En ĉio, kion mi instruis al vi, mi konsideris du personojn, la patrinon de

---

<sup>3</sup> Filo de la Ĉielo, (ĉine: 天子; pinjine: Tiānzǐ) estis titolo de la ĉina imperiestro.

<sup>4</sup> Geomancio estas aŭgura arto aŭ tekniko, konsistanta en divenado per interpretado de la figuroj, estigitaj de manpleno da polvo, sablo ks, ĵetita sur tablon. el Vikipedio

<sup>5</sup> peplom/o. Trastebita vata aŭ pluma litkovrilo. PIV

via edzo kaj vian edzon. Pro ŝi mi instruis al vi kiel prepari kaj prezenti teon al pliaĝulo; kiel stari en la ĉeesto de pliaĝulo; kiel aŭskulti silente dum pliaĝulo parolas, ĉu laŭde aŭ mallaŭde; en ĉiuj aferoj mi instruis al vi submeti vin kiel floro submetas sin al la suno kaj la pluvo egalanime.

“Por via edzo mi instruis al vi kiel ornami vin, kiel paroli al li per okuloj kaj mieno sed sen vortoj, kiel – sed tiuj aferoj vi komprenos je la alveninta horo kiam vi estos sola kun li.

“Tial vi estas bone edukita pri ĉiuj devoj de grandsinjorino. La preparadon de dolĉaĵoj kaj de delikataj manĝaĵoj vi komprenas, tiel ke vi povas tenti la apetiton de via edzo kaj pensigi lin pri via valoro. Neniaĵo ĉesu ĉarmi lin per via krea potenco rilate al la diverseco de pladoj.

“La moroj kaj etiketo de aristokrata vivo – kiel eniri kaj foriri en la ĉeesto de viaj superuloj, kiel paroli al viaj subuloj, kiel eniri vian portoseĝon, kiel saluti lian patrinon en la ĉeesto de aliaj – pri tiuj aferoj vi estas informitaj. La konduto de gastigantino, la subtileco de ridetoj, la arto de harar-dekorado kun juveloj kaj floroj, la kolorado de viaj lipoj kaj ungoj, via persona uzo de parfumoj, la efiko de ŝuoj sur viaj piedetoj – ho, tiuj piedoj viaj, kiom da larmoj ili kostis! Sed, laŭ mia scio, neniu en via generacio havas piedojn tiel malgrandajn. Miaj propraj piedoj estis apenaŭ pli malgranda je via aĝo.

“Mi ja esperas ke la familio de Li atentis al mia mesaĝo kaj vindadis same tiel forte la piedojn de sia filino, la fianĉino de via frato, mia filo. Sed mi maltrankviliĝas pro tio, ĉar mi aŭdis, ke ŝi estas klera pri la Kvar Libroj<sup>6</sup>, kaj klareco neniam akompanis belecon en virinoj. Mi devas komuniki refoje kun la svatisto pri tiu afero.

“Kio koncernas vin, mia infano, se mia bofilino egalas al vi, mi ne tro plendos. Oni instruis al vi ludi la antikvan harpon, kies kordoj estis tuŝitaj de generacioj de niaj virinoj por feliĉigi siajn sinjorojn. Viaj fingroj estas lertaj, kaj viaj ungoj estas longaj. Oni instruis al vi la plej famajn strofojn de la malnovaj poetoj, kaj vi scipovas kanti ilin dolĉe akompane de via harpo. Mi ne antaŭvidas, kiel eĉ via bopatrino povus trovi mankojn en mia klopodo. Krom se vi ne naskus filon! Sed mi iros al la templo kaj prezentos oferon al la diino, se pasas la unua jaro sen koncipado.”

La sango leviĝis al mia vizaĝo. Mi ne memoras kiam mi ne sciis pri nasko kaj patrineco. La deziro al filoj en domanaro kiel nia, kie mia patro havis tri konkubinojn, kies ununura intereso estis la koncipado kaj nasko de infanoj, estis tro ĉiutaga por

---

<sup>6</sup> La Kvar Libroj (Ĉine: 四书; pinjine: Sishū) estas ĉinaj klasikaj tekstoj pri la fundamentaj valoroj kaj kredoj de konfuceismo, nome: La Granda Lernado, La Doktrino pri Mezo, Analektoj de Kunfuceo, kaj Menzio. Vikipedio -en, Ĉina Antologio 1919-1949 piednoto, p.93

enhavi misteron. Tamen la penso pri tio rilate al mi – sed mia patrino eĉ ne vidis miajn varmajn vangojn. Ŝi sidis dronanta en meditado kaj ree ludetis kun la akvometonaj semoj.

“Nu, ankoraŭ unu afero estas konsiderinda”, ŝi diris fine, “li estis en fremdaj landoj. Li eĉ studis alilandan medicinon. Mi ne scias – sed sufiĉas! Tempo rivelos ĉion. Vi rajtas iri.”

## Ĉapitro 2

Mi ne povas memori okazon en kiu mia patrino parolis tiom da vortoj, Fratinjo. Certe, ŝi malofte parolis, krom por korekti aŭ ordoni. Tio estis justa kaj ĝusta, ĉar neniu en nia virinloĝejo estis egalranga en pozicio aŭ natura kapablo al ŝi, la Unua Sinjorino. Vi certe vidis mian patrinon, ĉu ne, Fratinjo? Ŝi estas tre maldika, vi memoros, kaj ŝia vizaĝo ŝajnas esti skulptita el eburo pro ĝia paleco kaj trankvilo. Mi aŭdis rakontojn, ke en sia junaĝo, antaŭ ol edziniĝi, ŝi posedis grandan belecon pro brovoj delikataj kiel la flugiloj de noktopapilio kaj lipoj sublimaj kiel la koralkoloraj burĝonoj de la cidoniarbo. Tamen ŝia vizaĝo, kvankam magra, konservas la klaran ovalon videblan en la pentraĵoj de la antikvaj virinoj. Pri ŝiaj okuloj, la Kvara Sinjorino iam per lerta lango diris:

“La okuloj de la Unua Sinjorino estas malĝojaj juveloj, nigraj perloj, mortantaj pro troa tristeco.”

Ho, mia patrino!

Neniu estis egala al ŝi en mia infanaĝo. Ŝi komprenis multajn aferojn kaj moviĝis kun kutima, kvieta digno pro kio la konkubinoj kaj iliaj infanoj ĉiuj restis timemaj en ŝia ĉeesto. Sed la servistoj kaj admiris kaj malŝatis ŝin. Mi aŭdadis ilin grumbli ĉar ili ne povis ŝteli eĉ peceton da restaĵoj en la kuirejo sen ke ŝi rimarku tion. Tamen ŝi neniam riproĉis ilin laŭte kiel la konkubinoj kiam ili koleris. Kiam mia patrino vidis ion, kio ne plaĉis al ŝi, malmultaj vortoj falis de ŝiaj lipoj; sed tiuj vortoj, akre pintaj per malestimo, falis sur la kulpulon kiel tranĉpova glacio sur karnon.

Al mia frato kaj al mi ŝi estis afabla, tamen formala kaj malkaresema, kio kompreneble estis la justa konduto por iu en ŝia pozicio en la familio. El ŝiaj ses infanoj, kvar estis forprenitaj frue pro la krueleco de la dioj, kaj tial ŝi valoris sian solan filon, mian fraton. Pro tio ke ŝi estis doninta unu vivantan filon al mia patro, li havis nenian leĝan bazon por plendi kontraŭ ŝi.

Aldone, ŝi estis sekrete fiera pri sia filo pro liaj propraj meritoj.

Ĉu vi vidis mian fraton? Li estas kiel mia patrino, korpe svelta, oste delikata, alta kaj rekta kiel bambuo. Kiel infanoj ni estis ĉiam kune, kaj estis li, kiu unue instruis al mi tiri la penikon sur la lingvosignojn skizitajn en mia legolibro. Sed li estis knabo kaj mi nur knabino, kaj kiam li estis naŭjaraĝa kaj mi havis ses jarojn, oni

translokigis lin el la loĝejo de la virinoj al tiu de mia patro. Ni tiam malofte renkontiĝis, ĉar kiam li fariĝis pli aĝa li hontis viziti lokon frekventitan de virinoj; kaj krome mia patrino ne kuraĝigis tion.

Kompreneble oni malpermesis al mi eniri la korton de la viroj. Kiam ili unue apartigis mian fraton de la virinoj, mi unufoje ŝtelpaŝis dum la vespera krepusko al la ronda lun-pordego, kiu kondukis al la virloĝejoj; kaj apogante min al la kontraŭa muro, mi ŝtelrigardis en la malantaŭajn kortojn kun la espero eble vidi mian fraton en la ĝardeno. Sed mi vidis nur virservistojn, kiuj hastis tien kaj reen kun bovloj da vaporanta mangĉaĵo. Kiam ili malfermis la pordojn kiuj kondukis al la halo de mia patro, elfluis laŭta ridado miksitita kun leĝera kaj alta kantado de virina voĉo. Kiam la pezaj pordoj fermiĝis, restis nur silento tra la ĝardeno.

Mi staris dum longa tempo aŭskultante la ridadon de la festantoj, sopire scivolema, ĉu mia frato estis tiam en la mezo de tiu feliĉo, kiam subite iu akre tiris mian brakon. Tiu estis Ŭang Da Ma, la ĉefservistino de mia patrino, kaj ŝi kriis:

“Nu, mi diros al via patrino se mi iam vidis tion refoje. Kiu iam vidis tian malmodestan knabinon kiu ŝtelrigardas virojn!”

Pro honto mi ne aŭdacis diri pli ol flustritan senkulpigon.

“Mi nur serĉis mian fraton.”

Sed ŝi firme respondis:

“Ankaŭ via frato estas nun viro.”

Tial mi malofte vidis lin ekde tiam.

Sed mi aŭdis, ke li amis studadon kaj tre frue fariĝis kapabla pri la Kvar Libroj kaj la Kvin Klasikaĵoj<sup>7</sup>, tiel ke mia patro finfine respondis al lia petego kaj permesis al li iri al fremda lernejo en Pekino.

En la tempo de mia edziniĝo li studis ĉe la Nacia Universitato en Pekino, kaj en siaj leteroj hejmen li senĉese petis permeson iri al Usono. En la komenco miaj gepatroj preteratentis tiaĵon, kaj mia patrino neniam konsentis. Sed mia patro malŝatis konflikton, kaj mi povis antaŭvidi, ke mia frato sukcesos per petegado.

Dum la du ferioj, kiujn li pasigis hejme antaŭ ol foriri, li parolis multe pri libro, kiun li nomis “scienco”. Mia patrino opiniis tion bedaŭrinda, ĉar ŝi vidis nenian utilon por tiu Okcidenta scio en la vivo de ĉina ĝentlemano. La lastan fojon kiam li alvenis hejmen, li portis la veston de fremdulo, kio tre malplaĉis al mia patrino. Kiam li eniris la ĉambron, kun sombra kaj fremda aspekto, mia patrino frapis sian bastonon sur la plankon kaj kriis:

---

<sup>7</sup> La Kvin Klasikaĵoj estis parto de la konfucea kanono kaj fariĝis la bazo de la ekzameno por funkciuloj. el Vikipedio



“Kio estas tio? Kio estas tio? Ne aŭdacu prezenti vin al mi en tia absurda kostumo!”

Li estis do devigita vesti sin per siaj propraj vestaĵoj, kvankam li koleris kaj prokrastis dum du tagoj ĝis mia patro priridis kaj ordonis lin. Mia patrino pravis. En ĉinaj vestaĵoj mia frato aspektis majesta kaj klerula. Kun siaj kruroj videblaj en la fremda vestaĵo li havis nenian similecon al io aŭ iu iam vidita aŭ aŭdita en nia familio.

Sed eĉ dum tiuj du vizitoj li malofte parolis kun mi. Mi scias nenion pri la libroj, kiujn li amis, ĉar mi ne havis la tempon plue studi la klasikaĵojn pro la multaj farenaĵoj antaŭ mia edziniĝo.

Pri lia propra edziĝo ni kompreneble neniam parolis. Tio ne estus konvena inter junaj viro kaj virino. Tamen mi sciis per subaŭskultantaj servistoj, ke li ribelis kontraŭ tio kaj rifuzis edziĝi, malgraŭ ke mia patrino provis trifoje fiksi la daton por la nupto. Ĉiufoje li persvadis mian patron prokrasti la aferon ĝis li estos progresinta pli en siaj studoj. Kaj kompreneble mi sciis, ke li estis fianĉigita al la dua filino de la domo de Li-familio bone establita en la urbo rilate al riĉeco kaj socia pozicio. Tri generacioj antaŭ ni la ĉefo de la domo de Li kaj la ĉefo de nia domo regis kiel guberniestroj en apudaj gubernioj de la sama provinco.

Kompreneble ni neniam vidis lian fianĉinon. La afero jam estis aranĝita de mia patro antaŭ ol mia frato havis unu jaron. Tial ne estus konvena por niaj familioj interrilati antaŭ la edziĝo de mia frato. Fakte oni neniam eĉ parolis pri la fianĉino krom unufoje kiam mi aŭdis Ŝang Da Ma klaĉi al la aliaj servistoj tiel:

“Estas domaĝe, ke la filino de Li estas tri jarojn pli aĝa ol nia juna sinjoro. Edzo devus superi edzinon eĉ en jaroj. Sed la familio estas malnova kaj riĉa kaj – ” Tiam ŝi vidis min kaj silentis daŭrigante la laboron.

Mi povis kompreni kial mia frato rifuzis edziĝi. La unua konkubino ridis, kiam ŝi aŭdis pri tio kaj ekkriis:

“En Pekino li verŝajne trovis belan manĉurinon!”

Sed mi ne kredis, ke mia frato amis ion krom siaj libroj. Mi tial kreskis sola en la kortoj de la virinoj.

Ĉeestis kompreneble la infanoj de la konkubinoj; sed mi sciis, ke mia patrino konsideris ilin nur kiel tiom da nutrendaj buŝoj kiam ŝi disdonis la ĉiutagan manĝopordon de rizo kaj oleo kaj ne priatentis ilin, krom ke ŝi mendis la necesajn jardojn da simpla, blua, kotona ŝtofo por iliaj vestaĵoj. Rilate al la konkubinoj, ili estis facilanimaj, sensciaj virinoj, ĉiam kverelantaj kaj ĉiu morte ĵaluza pri sia rango laŭ korinklino de mia patro. Ilia plaĉa aspekto unue kaptis la atenton de mia patro, sed tio paliĝis kiel floro plukita dum printempo kaj la favoroj de mia patro ĉesis kun la malapero de ilia mallongdaŭra beleco. Sed ili ŝajnis neniam kompreni, ke ili ne plu estas belaj, kaj dum tagoj antaŭ lia alveno ili okupiĝis per purigado kaj

renovigado de siaj juveloj kaj roboj. Mia patro donis al ili monon je festotagoj kaj kiam ajn li estis bonŝanca pri vetludoj, sed ili elspezis ĝin malsaĝe por bombonoj kaj vinoj, kiujn ili amis; kaj tiam, sen plia mono antaŭ lia alveno, ili pruntis monon de la servistoj por aĉeti novajn ŝuojn kaj har-ornamaĵojn. La servistoj montris malestimon kiam ili vidis, ke la konkubinoj estis perdintaj la favoron de mia patro, kaj feroce marĉandis kun ili.

La plej aĝa konkubino, grasa, malalta kreitaĵo, kies etaj trajtoj sinkis sub ŝiaj montecaj vangoj havis nenion notindan krom ŝiaj malgrandaj kaj belaj manoj, pri kiuj ŝi treege fieris. Ŝi lavis ilin en oleoj kaj kolorigis la manplatojn roze-ruĝe, kaj la glatajn, ovalajn ungojn ŝi farbis vermiljone. Poste ŝi aplikis pezan magnolian parfumon.

Foje mia patrino tediĝis de la vanteco de tiu virino kaj iom malbonvole petis ŝin fari malfajnan lavadon aŭ kudradon. La grasa Dua Sinjorino ne aŭdacis malobei, sed ŝi ploretis kaj plendis sekrete al la aliaj konkubinoj, dirante ke mia patrino estas jaluza de ŝi kaj deziras difekti ŝian belecon en la okuloj de mia patro. Tion ŝi diris flegante siajn manojn kaj ekzamenante ilin tre zorge por vidi ĉu la delikata haŭto estis eĉ iomete kontuzita aŭ dikiĝinta. Mi ne povis toleri tuŝi ŝiajn manojn; ili estis varmaj kaj molaj kaj fandiĝis en ies preno.

La korinklino de mia patro al tiu virino jam delonge ĉesis, sed por kvietigi ŝin, li donis al ŝi monon, kiam li tranoktis kun ŝi en ŝia loĝejo, tiel ke ŝi ne laŭte incitetu kaj riproĉu lin en la kortoj.

Pro tio ke ŝi havis du filojn ŝi rajtis ricevi iom da atento.

Ŝiaj filoj estis grasaj kaj similis ekzakte al sia patrino, kaj kiam mi pensas pri ili, mi imagas ilin nur daŭre trinkantajn kaj manĝantajn. Ili manĝis ĝissate ĉe la tablo kun la aliaj, tamen poste ili kutimis ŝtelpaŝi en la korton de la servistoj kaj kvereli kun ili pri la restaĵoj. Ili ĉiam kondukis tre ruze, pro timo al mia patrino, kiu malamamis antaŭ ĉio manĝavidon. Ŝi mem neniam manĝis pli ol bovlon da seka rizo kun iom da salita fiŝo aŭ minca tranĉo da frida kortbirdo kaj glutaja da parfumita teo.

Mi ne memoras pli pri la Dua Sinjorino, krom ke ŝi ĉiam tre timis morti. Ŝi manĝis multajn dolĉajn oleajn sezamkukojn, kaj kiam ŝi malsaniĝis ŝi kuŝis ĝemante pro terura timo. Ŝi kutimis venigi budhanajn sacerdotojn kaj promesis donaci siajn perlajn harornaĵojn al la templo se la dioj sanigus ŝin. Sed kiam ŝi resaniĝis, ŝi daŭrigis manĝi kukojn kaj ŝajnis forgesi la promeson.

La dua konkubino, la Tria Sinjorino, estis malsprita virino, kiu malofte parolis kaj malmulte interesiĝis pri la familia vivo. Ŝi havis kvin infanojn, ĉiuj knabinoj krom la plej juna; kaj tio malvigligis ŝian spiriton kaj malesperigis ŝin. La knabinojn ŝi tute ne ŝatis. Ili estis neglektitaj kaj ne taksitaj pli alte ol la sklavo, kiujn ni aĉetis por labori. Ŝi pasis sian tempon en suna angulo de la korto mamnutrante sian filon,

pezan, palan infanon, trijaraĝan kaj ankoraŭ nekapabla paroli aŭ marŝi. Li ofte ploris kaj ne ĉesis suĉi ŝian longan molaĉan mamon.

La konkubino kiun mi plej ŝatis estis la tria, dancistino el Suĝoŭo<sup>8</sup>, ŝia naskiĝnomo estis La Mei kaj ŝi mem estis tiel bela kiel tiu samnoma floro<sup>9</sup>, kiu burĝonas el senfoliaj branĉoj en la frua printempo. Kiel ili, ŝi estis malgranda, pala, kaj ora. Ŝi uzis nenian farbon sur sian vangon kiel faris la aliaj, sed nur nigre emfazis la mallarĝajn brovojn kaj metis iom da vermiljono sur la malsupra lipo. Ni unue vidis ŝin tre malofte, ĉar mia patro fieris pri ŝia beleco tiom, ke li kunvenigis ŝin ĉien.

Dum la lasta jaro antaŭ mia edziniĝo ŝi estis hejme, tamen atendante la naskon de sia filo. Li estis aminda knabo, diketa kaj bela, kaj ŝi prenis lin kaj metis lin en la brakojn de lia patro. Tiel ŝi repagis kion li estis doninta al ŝi en juveloj kaj korinklino.

Antaŭ la naskiĝo de la infano la Kvara Sinjorino estis en daŭra humoro de alta eksciteco kaj tintanta ridado. Oni laŭdis ŝin ĉie pro ŝia beleco, kiun fakte neniu superis. Ŝi portis jade verdan satenon kaj nigran veluron kun jado en siaj delikataj oreloj, kaj ŝi malestimis nin ĉiujn iomete malgraŭ ŝia senzorga malavaro rigarde la kukojn kaj bombonojn donitajn al ŝi dum la ĉiunoktaj festoj kun mia patro. Ŝi mem ŝajnis manĝi preskaŭ nenion: sezamkukon en la mateno, post foriro de mia patro, kaj je tagmezo duonan bovlon da rizo kun peco da bambua ŝoso aŭ minca tranĉaĵo da salita anaso. Ŝi amegis fremdajn vinojn kaj kajolis mian patron aĉeti palan flavan likvon enhavantan arĝentajn vezikojn kiuj saltis supren el la fundo. Tio ridigis ŝin kaj ŝi fariĝis tre parolema kaj ŝiaj okuloj brilis kiel nigra kristalo.

Tiam ŝi amuzegis mian patron, kaj li kutimis peti ŝin danci kaj kanti por li.

Sed kiam mia patro festis, mia patrino sidis en sia propra loĝejo legante la majestajn diraĵojn de Konfuceo<sup>10</sup>. Koncerne min, kiam mi estis juna knabino mi ofte scivolis pri tiuj festaj noktoj kaj deziris kaŝrigardi inter la skulptitaj fendoj de la lunpordego en la virloĝejon, kiel mi iam faris kiam mi serĉis mian fraton. Sed mi sciis, ke mia patrino neniam permesus tion, kaj mi hontis trompi ŝin.

Tamen en unu nokto – mi nun hontas pro mia malobservo de fila obeemo – mi sekrete ŝteliris tra la nigraĵo de senluna somera nokto kaj okulumis refoje tra la pordo kaj rigardis en la loĝejon de mia patro. Mi ne scias kial, sed mi ne plu pensis pri mia

---

<sup>8</sup> Suĝoŭo aŭ Suzhou (ĉine: 苏州; pinjine Sūzhōu) estas universitata urbo en Ĉina Popola Respubliko en provinco Ĝjangsuo, kiu famas pri ŝtonopontoj, pagodoj, kaj ĝardenoj. el Vikipedio

<sup>9</sup> Falfolia arbusto kun parfumitaj floroj el la familio de kalikantacoj. (ĉine: 腊梅; pinjine: làn méi) el Vikipedio

<sup>10</sup> Konfuceo – Ĉina filozofo, politikulo k edukisto (541-479 a.K.) PIV

frato. Plenumita de ia stranga, malklara deziro, mi fariĝis maltrankvila dum la longa, varma tago, kaj kiam noktiĝis, la ombroj, la varmeĉo kaj la peza parfumo de lotusfloroj donis al la trankvilaj virinĉambroj la atmosferon de la morto mem. Mia koro batis forte dum mi rigardis.

La pordegoj staris vaste malfermaj kaj la lumo de cent lanternoj eliĝis en la varman, senmovan aeron. Ene mi vidis, ĉe kvadrataj tabloj, virojn sidantajn, kiuj manĝis kaj trinkis, kaj servistoj, kiuj hastis tien kaj reen kun manĝaĵo. Malantaŭ la seĝo de ĉiu viro staris knabino svelta kiel vito. Sed ĉe la flanko de mia patro sidis la ununura virino ĉe la tablo; tiu estis La Mei; mi povis vidi ŝin tre klare kaj ŝia vizaĝo ridetis iomete kaj brilis kiel vakspetala floro kiam ŝi turnis al mia patro. Ŝi diris ion en malalta voĉo, apenaŭ movante la lipojn, kaj la viro laŭte ekridis. Ŝia rideto subtila ne ŝanĝis kaj ŝi ne ridis.

Ĉifoje mia patrino mem malkovris min. Ŝi malofte forlasis la domon, eĉ ne por promeni en la kortoj, sed la varmeĉo de la nokto pelis ŝin el la domo, kaj ŝiaj akraj okuloj tuj perceptis min. Ŝi ordonis min tuj reiri al mia ĉambro kien ŝi sekvis min, kaj tie ŝi forte frapis mian manplaton per sia faldita bambua ventumilo kaj demandis min malestime, ĉu mi deziris vidi putinojn laborantajn. Mi hontis kaj ploris.

La sekvantan tagon ŝi ordonis ke oni metu netravedeblan latison sur la lunpordegon kaj mi neniam plu travidis ĝin.

Malgraŭ ĉio mia patrino estis afabla al la Kvara Sinjorino. La servistoj laŭdis ŝin laŭte por ŝia indulgo, kvankam mi opinias ke la aliaj konkubinoj ĝojus vidi ŝin kruela, kio ofte okazas en rilato inter la unua edzino kaj la ceteraj. Eble mia patrino antaŭsciis kio okazos.

Post la naskiĝo de la bebo, la Kvara Sinjorino pensis ke kompreneble mia patro ree kunvenigus ŝin en siaj vojaĝoj. Ŝi ne mem mamnutris la infanon por ne difektisian belecon. Anstataŭe ŝi donis lin al fortika sklavino, kies propran infanon, knabinon, oni kompreneble ne permesis vivi. La sklavino estis dikkorpa virino kun kruda esprimmaniero, sed la eta knabo dormis en ŝia sino la tutan nokton kaj estis portata en ŝiaj brakoj la tutan tagon. Lia propra patrino malmulte atentis lin, krom por vesti lin ruĝe je festotagoj, kaj meti ŝuojn kun etaj katvizaĝoj sur liajn piedojn kaj ludi kun li dum iom da tempo. Kiam li komencis plori, ŝi bruske remetis lin en la brakojn de la sklavino.

Sed la filo ne donis al ŝi sufiĉan potencon super la patro. Kvankam laŭleĝe ŝi repagis lin, ŝi devis ĉiutage eltrovi ruzajn rimedojn por kapti liajn sensojn, kiel virinoj ĉiam devis fari. Sed eĉ ŝiaj ruzadoj ne sufiĉis. Ŝi ne plu estis tiel bela kiel antaŭ la naskiĝo de la infano. Ŝia glata, perla vizaĝeto iomete velke pendetis malsupren nur sufiĉe por forpreni ŝian delikatan junecon. Ŝi vestiĝis per sia jade verda robo, surmetis pendantajn orelingojn, kaj ellasis etan tintan ridon. Mia patro

ŝajnis esti kontenta kun ŝi kiel antaŭe, sed la sekvan fojon kiam li forvojaĝis li ne kunvenigis ŝin.

Vidi ŝian konsterniĝon kaj koleron estis teruriga. La aliaj konkubinoj estis sekrete kontentaj kaj multe ridetis dum ili ŝajnis konsoli ŝin. Mia patrino estis iomete pli afabla ol kutime. Mi aŭdis kiam Ŭang Da Ma grumblis kolere:

“Ho jes, nun ni baldaŭ devos nutri alian nelaborantan virinon. Li jam lacas pri ĉi tiu!”

Ekde tiu tago la Kvara Sinjorino paŭtis. Ŝia malkontenteco evidentiĝis per atakoj de kolereto kaj profunda laceco pro la rutina ekzisto en la virina korto. Ŝi estis alktumigiĝinta al festado kaj al admiro de viroj. Ŝi fariĝis tre melankolia, kaj poste eĉ provis sinmortigi. Sed tio okazis post mia edziniĝo. Oni ne konkludu de ĉi tio ke nia vivo hejme estis malgaja. Ĝi vere estis ĝoja, kaj multaj el niaj najbaroj enviis mian patrinon. Mia patro neniam ĉesis respekti ŝin pro ŝia intelekto kaj ŝia kapablo regi liajn aferojn. Ŝi neniam riproĉis lin pro io. Ili do vivis digne kaj pace.

Ho mia amata hejmo! Mia infaneco pasas antaŭ mi en bildoj lumigitaj kvazaŭ per fajro. Mi vidas la kortojn, kie mi rigardis la lotusajn burĝonojn ekflori en la baseno je matena krepusko, kaj la peoniojn florantajn en siaj terasoj; la familiajn ĉambrojn kie la infanoj kapriolis sur la kahela planko, kaj kie la kandeloj flagris antaŭ la domdioj; la ĉambron de mia patrino kie mi vidas ŝian seriozan, delikatan profilon kurbitan sur libro, kun la baldakena lito en la fono.

La pli karmemora ĉambro el ĉiuj estas la gastohalo, kun siaj pezaj, nigraj, tektonaj sofoj kaj seĝoj, la longa skulptita tablo kaj la skarlataj, satenaj kurtenoj ĉe la pordejoj. Super la tablo pendas pentraĵo de la unua Ming-a<sup>11</sup> imperiestro – necedema vizaĝo kun mentono kiel ŝtona klifo kaj je ĉiu flanko de la pentraĵo pendas la mallarĝaj oraj kartuŝoj. Tra la tuta sudflanko de la halo troviĝas skulptitaj fenestraj kadroj kun rizpajperato. Tiu papero disdonas molan lunŝtonan lumon super la ombra digno de la ĉambro eĉ ĝis la pezaj plafonaj traboj kaj prilumas la vermiljonon kaj oron de iliaj farbitaj randoj. Sidi kviete en tiu halo de miaj prauloj kaj observi la duonlumon en la silento de la sintruda krepusko ĉiam estis por mi kiel muziko.

Je la dua tago de la Nova Jaro, kiu estas la tago en kiu grandaj sinjorinoj vizitetas unu la alian, la halo estas delikate gaja. Antaŭe sombra pro aĝo, ĝi nun gastigas aron da brile vestitaj sinjorinoj; estas lumo kaj ridado kaj eroj da formala konversacio, kaj la sklavoj servas kuketojn en ruĝe lakitaj bombonpletoj. Mia patrino prezidas ĉion kun serioza afableco. La oldaj traboj observis tiun saman scenon dum centoj da jaroj vidante nigrajn kapojn, malhelajn okulojn, ĉielarkajn silkojn kaj satenojn, harornamaĵojn el jado, perlo kaj rubeno, sveltajn manojn ornamitajn de oro kaj turkiso. Jen mia amata hejmo, ho mia kara hejmo!

---

<sup>11</sup> Ming-dinastio 1368 -1644

Mi vidas min, etan solenan figuron, al kroĉigantan al la mano de mia frato, starantan apud la fajro en la korto, kie la dioj de la kuirejo estas bruligotaj. Oni metis mielon sur iliajn paperajn lipojn, tiel ke ili ascendu ĉielon kun dolĉaj vortoj kaj forgesu rilati pri la okazoj kiam la servistoj kverelis kaj kiam ili ŝtelis manĝaĵon el la bovloj. Ni estas plenumitaj de respekto je la penso pri la mesaĝistoj al la distanca nekonatejo. Ni ne parolas.

Mi vidas min ĉe la Drakofestivalo, kun mia plej bona festotaga rozkolora silka robo brodita kun prunfloroj, kaj mi apenaŭ povas atendi la vesperon kiam mia frato prenos min kun si por vidi la drakoboaton sur la rivero.

Mi vidas la movigantan lotuslanternon, kiun mia maljuna vartistino alportis al mi je la Lanterna Festo<sup>12</sup> kaj ŝian ridadon pri mia eksciteco kiam je noktigo mi rajtis lumigi la fumruĝan kandelon en ĝi.

Mi vidas min lante promenante apud mia patrino en la grandan templon. Mi rigardas ŝin kiel ŝi metas la incenson en la urnon. Mi solene genuiĝas kun ŝi antaŭ la dio, kaj timo fridigas min.

Mi demandas al vi Fratinjo: kun jaroj de tia edukado, kiel oni preparis min por tia viro kia mia edzo? Ĉiuj miaj lertaĵoj senutilas; mi sekrete planas, ke mi portos la bluan silkan mantelon kun nigraj butonoj arte ellaboritaj de arĝento. Mi metos jasmemon en mian hararon, kaj sur miaj piedoj mi portas pintiĝintajn, nigrajn, satenajn ŝuojn broditajn blue. Mi salutos lin, kiam li eniros. Sed finfine liaj okuloj rapide eskapas al aliaj aferoj - la leteroj sur la tablo, lia libro. Mi estas forgesita.

Angoro premas mian koron. Mi memoras tiun tagon antaŭ mia edziniĝo. Estis tago en kiu mia patrino rapide skribis du leterojn per sia propra mano, unu al mia patro, kaj unu al mia estonta bopatrino, kaj ŝi haste sendis ilin pere de la maljuna pordisto. Mi neniam vidis ŝin tiel konsternitan. Je tiu tago mi aŭdis la servistojn flustri, ke mia fianĉo volis rompi nian edziĝpromeson, ĉar mi estis malklera kaj havis binditajn piedojn. Mi ekploris kaj la servistoj ektimiĝis kaj ĵuris ke ili ne parolis pri mi, sed pri la dika dua filino de Sinjorino Tao.

Nun mi memoras tion kaj cerbumas pri tio en stato de agitiĝo. Ĉu eble ili parolis pri mi? Servistoj ĉiam mensogas! Tamen mi ne estas neinstruita. Oni trejnigis min pri ĉiuj mastrumaj aferoj kaj la flego de mia propra persono. Koncerne miajn piedojn neniu povus preferi grandegajn, vulgareajn piedojn kiel tiuj de la filino de la ventumilisto. Ne estis mi; ne povis esti mi pri kiu ili parolis. (*daŭrigota*)



elangligis *Detlef Karthaus* (Kanado)

---

<sup>12</sup> Lanterna Festo estas la lasta tago de la tradicia ĉina novjarfesto. el Vikipedio

## Chen Xuanyou\*(aŭtoro en Tang-dinastio)

### Animo disiĝanta de la korpo

En la tria jaro de Tianshou-erao (692 p.K.) Zhang Yi de Qinghe funkciis kiel oficisto en Hengzhou kaj tie loĝis. Li estis homo kvieta, kun malmulte da amikoj. Al li naskiĝis ne filo, sed nur du filinoj, el kiuj la pli aĝa mortis jam infanaĝe kaj la pli juna Qianniang elkreskis senkompare ĉarma kaj bonvirta fraŭlino.

Zhang Yi havis nevon Wang Zhou de Taiyuan, kiu montris sin inteligenta kaj bela jam de infanaĝo.

Zhang Yi taksis sian nevon tre kara kaj ofte diris: “Mi certe edzinigos Qianniang al li.” Poste, ambaŭ elkreskis gefraŭloj kaj profunde amis en sia koro unu la alian, sed tion la gepatroj sciis neniom. Hazarde iu eminenta el la suboficistoj petis de Yi la manon de Qianniang kaj Yi konsentis ties svatigon. Informiĝinte pri tio la fraŭlino ege ĉagreniĝis, ankaŭ Wang Zhou suferis de malkontenta indigno. Pretekste ke li devas veturi al la ĉefurbo por la ŝtata ekzameno, li petis de Yi forpermeson. Ne povante deteni la nevon, Zhang Yi forsendis lin kun abundaj donacoj.

Kun kaŝita turmento en la koro, Wang Zhou faris adiaŭon kaj sidiĝis en boato. Vespere, la boato veturis sufiĉe malproksimen kaj atingis bordon ĉe monto. Noktmeze, kiam Wang Zhou neniel povis endormiĝi, li aŭdis subite de la bordo trotajn paŝojn kaj iu rapide alproksimiĝis. Ekrigardante, li trovis ke estas Qianniang alkuranta kun nudaj piedoj. Zhou estis ravita de la neatendita feliĉo.

Premante la manojn de la knabino li demandis kial ŝi alvenis.

“Mi ne povas vin forgesi eĉ en sonĝo!” diris la fraŭlino lamente. “Nun oni devigos min edziniĝi al alia homo kontraŭ mia volo, sed mi kortuŝiĝis de via neŝanĝebla profunda amo al mi, tial mi decidis reciproki vin kaj alkuris spite ĉion for de miaj gepatroj.” Pro la neatendita feliĉo Wang Zhou ekstazis neordinare. Li kaŝis la knabinon en la boaton kaj rapidigis senprokraste. Zhou tagnokte spronis la boaton kaj post kelkaj monatoj li atingis Sichuan-provincon.

En daŭro de kvin jaroj Qianniang naskis du filojn. Ŝi ne korespondis kun siaj gepatroj, sed ĉiam sopiris ilin. Foje, plorante ŝi diris al la edzo:

“Mi venis al vi ĉion spitante. Dum kvin jaroj min informis nenio pri miaj gepatroj. Ĉu restas do loko en la mondo por tiel malĝentila filino kiel mi?”

“Ne ĉagreniĝu, ni vizitu ilin!” respondis la edzo kortuŝite de ŝia turmentiĝo kaj ili kune veturis al Hengzhou.

Atinginte Hengzhou, Wang Zhou vizitis la domon de Zhang Yi la unua kaj rakontis ĉion okazintan.

“Kia babilo!” mirigite diris Zhang Yi. “Dum tiuj jaroj Qianniang ja restadis ĉiam malsana en ŝia buduaro!”

“Tamen nun ŝi troviĝas en la boato!” persistis Wang Zhou.

Kun pliigita surprizo Zhang Yi sendis serviston al la bordo por konstati. En la boato efektive sidas Qianniang, flora kaj vigla, ŝi demandis al la servisto:

“Kiel fartas miaj gepatroj?”

Ege mirigite la servisto rapidis al Zhang Yi kaj raportis kion li vidis propraokule. Kiam la malsana fraŭlino kuŝanta en la buduaro informiĝis pri tio, ŝi ellitiĝis, sin ornamis kaj ŝanĝis al si vestaĵojn, ridete, tamen tute senvorte. Ŝi eliris renkonte al la alia Qianniang kaj antaŭ ĉies okuloj la du fraŭlinoj kuniĝis en unu korpon kaj duobliĝis iliaj vestoj unu super la alia. Tiun okazintaĵon la familio de Zhang Yi opiniis ne normala kaj sekve tenis ĝin ĉiam sekreta. Pri tio subsciis nur ne malmulte da parencoj. La geedzoj portis post 40 jaroj kaj iliaj du filoj ambaŭ sukcesis en ŝtataj ekzamenoj kaj funkciis kiel asistanto de guberniestro aŭ kapitano pri publika sekureco.

Mi, Xuanyou, multfoje aŭdis tiun historion dum mia junaĝo. Kelkaj rakontis ĝin kun nesamaj detaloj, kiuj iuj aŭskultantoj opiniis ĝin elpensita. Dum la lastaj jaroj de Dali-erao(766-779) mi renkontiĝis kun s-ro Zhang Zhongxian, la guberniestro de Laiwu, kiu detale rakontis al mi tiun historion. Ĉar genealogie Zhang Yi estis onklo de la guberniestro, li sciis tre bone tiun kuriozan okazintaĵon, kiun nun mi verkis en tiu ĉi rakonto.

*\* La aŭtoro vivis en jaroj dum regado de la imperiestro Tang Taizong (762-779). Mankas aliaj informoj pri lia vivo.*



*elĉinigi* **Guozhu** (Ĉinio)



# Anonimulo

## Kantvoĉo

En oktobro de 1920, sur la maro proksime al okcidenta bordo de Stranraer de Britio okazis karambolo de ŝipoj sub la peĉe nokta vualo. La eta Vaporŝipo Lova koliziigis kun pasaĝerŝipo, kiu estis granda pli dekoble ol la vaporŝipo. El 104 homoj sur la ŝipoj, 11 stevaroj kaj 14 pasaĝeroj malaperis senspure.

Franko Makine, la inspektoro de Ellison Internacia Asekurkompanio, estis ĵetita el sub la ŝipo kaj baraktadis en nigraj ondoj. Kial la savboato ankoraŭ ne alvenas nun? Li sentis sin agonianta.

Iom post iom helpkroj kaj plorvoĉoj malfortiĝis ĉirkaŭ li, kvazaŭ ĉiaj estaĵoj estus vorita de ondoj. Morta silento etendiĝis ĉirkaŭen. Ĝuste en la terura silento, subite — neatendite, albloviĝis melodia kantvoĉo, ina kantvoĉo sen ajna detoniĝo kaj sen ajna tremiĝo. Ŝajnis, ke la kantanto aplombe donas prezentadon antaŭ granda spektantaro.

Makine tenis sin trankvila por aŭskulti kaj baldaŭ absorbiĝis en la kantado. Neniu psalmado en preĝejoj estas tiel elegantaj nek famaj solistoj povas kanti tiel melodie. Malvarmo kaj laco tuj foriris el lia korpo kaj lia animstato tute revenis al trankvileco.

Li naĝis laŭ la direkto de la kantvoĉo. Kiam li alproksimiĝis, li vidis grandan rondan ŝtipon flosanta tie, kiu eble elĵetiĝis kiam la vaporŝipo sinkis. Ĝin alkrōis kelkaj virinoj, el kiuj tre juna fraŭlino kantis. Kvankam ondegoj frapis sur ilin, ŝi senĉese kantadis aplombe. Dum ili atendis la alvenon de savŝipo, ŝi pliigis al aliaj spiriton kaj forton, por ke la virinoj ne perdu sian forton nek delasu la rondan ŝtipon pro malvarmo kaj malatento.

Samkiel Makine alnaĝis tien pere de la kantvoĉo de la fraŭlino, ŝipo, ankaŭ pere de la bela kantvoĉo kiel navigilo, alproksimiĝis tra mallumo. Fine saviĝis Makine, kantistino kaj aliaj virinoj.

La sekvantan tagon aperis en ĵurnalo la artikolo titolita je *Aventuro de Makine*. Tamen la bedaŭrindaĵo estis, ke oni ne scias la nomon de la kantanta junulino. Sed, eĉ se oni ne scias ŝian nomon, ĉu ŝia bela kantvoĉo ankoraŭ reeĥas ĉe niaj oreloj? La kantvoĉoj en koncerto tuj elvaporigās sur la scenejo, dum ŝia kantvoĉo neniam malaperis.

*elĉinigiŝ Kanglong (Ĉinio)*

## Anonimulo

### Du almozuloj

S-ro Vilson estis legenda figuro en la komerca rondo. Je la aĝo de kvardek jaroj, li estis sengroŝa, sed en malpli ol tri jaroj li fariĝis miliardulo. Kvankam saĝa kaj kapabla, li tamen kondutis strange. Ĉio, kion li faris laŭ siaj bontrovo kaj originala elpenso, troviĝis ĉiam ekster oniaj atendo kaj kompreno. Ĵurnaloj aperigis liajn amuzajn novaĵojn preskaŭ ĉiutage. Tiutage li sentis grandan ĝojon, ĉar li jus sukcesis subskribi mendilon je la valoro de cent milionoj da usonaj dolaroj. Lia ĝojego kondukis lin al stranga ideo. Meze en la celebrado pri la sukcesa negocado, li ŝtele evitis sin de siaj sekvantoj kaj sola iris sencele surstrate. Subite li trovis almozulon staranta sub arbo kaj almozpeti de pasantoj per mantenata difektita ĉapelo senkoloriĝinta. S-ro Vilson tuj naskis strangan ideon: se oni havigos al la almozulo milionon da dolaroj, kia li fariĝos? Tiu kuraĝa kaj stimula ideo faligis lin en grandan ekscitiĝon. Li tuj elpoŝigis oran karton valorantan je miliono da dolaroj kaj, surskribinte la kodnumeron, ĵetis ĝin en lian difektitan ĉapelon. Post tio, li foriris kvazaŭ nenio estus okazinta. Ĉirkaŭirinte la stratangulon, s-ro Vilson ankoraŭ dronis en ĝoja orgasmo pro sia kreado de milionulo en palpebruma tempo. Subite li preskaŭ stumblis de io sur la tero. Turninte sian kapon, li vidis dekunu-aŭ-dekdu-jaran almozuleton sidanta ĉe leterkesto, kun malbonodoraj kruroj etenditaj laŭlonge, kiuj preskaŭ faligis lin. Sur lia maldekstra vango cikatro kuris oblikve de la frunto ĝis la mentono, impresante terure. S-ro Vilson tuj sentis senliman kompaton kaj decidis doni al li helpon. Tamen li forgesis, ke li neniam kunportas konstantan monon kun si. Traserĉinte ĉiujn poŝojn, li trovis nur unu moneron de dolaro. Singene li diris, "Pardonon! Mi havas nur tiun moneron. Se vi volas, venu al mi je ajna tempo!" Dirante, li ĵetis sian nomkarton kaj tiun moneron en la difektitan bovlon de la almozuleto. Dudek jaroj flugis. Iun tagon, junulo nomita Henriko sin turnis al la oficejo de s-ro Vilson, insistante, ke li interparolos pri negocado nur kun tiu mem, kaj ke li forlasos la negocadon, se tiu ne venos persone. Tiam s-ro Vilson jam transdonis ĉiujn komercajn aferojn al sia filo por administri, kaj krom se grava afero bezonis lian zorgon, li ne estis aperonta ĉe negocado. La nefaman vizitanton, kiel Henrikon, li ne devus persone akcepti, sed ties stranga konduto venis ĝuste en akordo kun lia plaĉo. Li decidis intervidiĝi persone kun tiu neatendita vizitanto. Malaltstatura, Henriko surportis simplan kaj senĝenan vestaĵon. Tre okulfrapa montriĝis la cikatro oblikve kuranta sur lia vango, la cikatro, kiu donis al s-ro Vilson impreson de konateco. Ekster lia atendo, Henriko kunportis profitdonan negocon je

valoro de pli ol cent milionoj da dolaroj, kaj s-ro Vilson komencis koncentri sian atenton sur la negoco, antaŭ ol pripensi en detaloj. Oni ne atendis, ke la intertraktado iris glate. La kondiĉoj, kiujn s-ro Vilson elmetis, estis akceptataj preskaŭ sen marĉandado. Kvankam mense preta, s-ro Vilson ŝtoniĝis kaj aŭtomate ekis okule ekzameni Henrikon denove. Tiam Henriko ekparolis, ridetante, “Estimata s-ro Vilson, ĉu vi ankoraŭ rememoras pri la amozuleto, kiun vi helpis dudek jarojn antaŭe? Mi atendas dudek jarojn. Hodiaŭ mi speciale venas por esprimi al vi mian respekton, kaj redonas ion al vi.” Dirante, li eligis aĵon el sia interna poŝo kaj respektplene ĝin prezentis al s-ro Vilson. Ĵetinte ekrigardon al ĝi, li trovis, ke ĝi estas unu el speco de nomkartoj, kiun li uzis antaŭ dudek jaroj, kaj ke pro longa tempo ĝi jam estas flaviĝinta. Henriko daŭrigis, “Mi pensas, ke probable mi estas la unua kaj ununura amozuleto, kiu ricevis nomkarton dum almozpetaĵo. Mi vere estas bonsorta! Dum dudek jaroj, mi ĉiam admonis al mi mem, ke mi ne devu vaniigi la bonŝancon. Jen mi realigas mian deziron!” Ĝuste nun ĉio spertita revenis en la memoron de s-ro Vilson. Kun granda ĝojo, li alkuris, brakumis Henrikon kaj turnadis sin runde kiel infano. Ŝajnis, ke li sentis multe pli da ĝojo ol ili sukcesis en negocado. Subite li kvazaŭe ekpensis pri io urĝa, kaj lasinte Henrikon, hastis for eĉ sen diri unu vorton. Henriko ŝultrolevis, montrante neniom da surprizo. S-ro Vilson iris al la loko, kie li fordonis milionon da dolaroj. Kun forpaso de tempo, la strato ne aspektis homplena kaj prospera kiel antaŭe, kaj la folioj de tiu arbo pendis dense kiel baldakeno. Li surprizite trovis, ke sub la arbo staras eĉ la almozulo kun difektita ĉapelo en manoj por peti de pasantoj. Jen la sama sceno kiel antaŭ dudek jaroj! Retenante sian ekscitiĝon, s-ro Vilson alpaŝis al la almozulo. “Ĉu vi ĉiam almozpetas ĉi tie, s-ro?” “Jes.” La almozulo eĉ ne movetis sian palpebron. “Kial vi ne ŝanĝas ĉi tiun lokon por alia homplena loko?” “Kial ŝanĝi? Ĉi tie estas mia benita loko! Iu donis al mi eĉ milionon da dolaroj!” Radiis liaj okuloj, kiam li parolis, kvazaŭ li fanfaronus pri sia pasinta gloro. S-ro Vilson sentis subitan perdiĝon kaj, sin turninte, foriris silente.

*elĉinigis **Soneto** (Ĉinio) el: [www.wxwx.cn](http://www.wxwx.cn)*

# Song Guoren

## Letero el Dio

Kun tremegaj saltoj, La flugmaŝino sin pafis el sur la tero. Kelkajn minutojn poste, stevardino ekparolis per mikrofono, “Bonvenon al vi veturi per aviadilo de Norda Aerkompanio. Ni jam forlasis...” El la dorspoŝo de la antaŭa seĝo, Ŝjaofej eligis magazenon kaj foliumis. Senkonscie li trovis blankan koverton inter paĝoj. Sur la koverto gluita troviĝis nek la nomo de ricevanto nek la adreso de sendanto. Li levis ĝin por vidi kontraŭ lumo. Jen la desegno decent-juana monbileto svage reveliĝis tra la maldika kovertpapero. Kun ekĝojo, li, pririgardinte ĝin jen frontflanke jen dorsflanke kelkfoje, certigis, ke ĝi vere enhavas kelkajn cent-juanajn monbiletojn. Tuj kiam li ekŝiris la koverton, li vidis linion da duonklaraj kaj malgrandaj vortoj skribitaj per krajono: “TAKE IT HOME, MY SON!” Li konis anglan lingvon kaj komprenis ĝian sencon: “Alportu ĝin hejmen, mia filo!” Li konjektis, ke ĝi estas la letero de patro al lia filo. La pasaĝero en najbara seĝo estis ripozanta kun fermitaj okuloj, kaj neniu atentis pri la letero kun monbiletoj en ŝia mano. Ĉu ĝin doni al stevardino? Post kelka pensado, ŝi, kun brue batanta koro, metis la koverton en sian mansaketon. Tamen ŝi tuj eligis ĝin, konsciante, ke tia faro ne decas. Momenton poste, ŝi ree ĝin ensakigis. Tiamaniere ŝi faris la samon kvin-ses-foje, ne sciante, kion fari. Feliĉe, restis ankoraŭ proksimume du horoj por elaviadiliĝi, kaj ŝi havis sufiĉan tempon por konsideri, ĉu ŝi devas ĝin liveri al stevardino aŭ ne. Ŝi havigis al si unuafojon veturi per aviadilo dum ŝia tuta vivo, ĉar, en la “Marto la Oka”-pokala konkurso de eseoj ŝi gajnis specialan premion — bileton por veturi per aviadilo al metropolo en la sudo. Bonŝancoj ĉiam venas duope. Hodiaŭ ŝi neatendite trovis la monon — almenaŭ kvincent juanojn en la dika koverto laŭ ŝia permana mezurado. Samkiel multaj homoj, kiuj revas, kiel elspezi la monon trovitan de si mem, ŝi ankaŭ faris provon imagi kiel ĝin elspezi. Nature la mono estis granda sumo por ŝi. Ekde tiam, kiam ili pruntis monon por aĉeti domon, la vivnivelo de ŝia familio komencis malaltiĝi ĝis almenaŭ antaŭ dek du jaroj. Ili devis elspezi zorgeme. Delonge ili ne aĉetis novajn vestojn, nek manĝis en restoracioj, nek faris ekskursojn, nek... Por ne paroli pri la peza premo de la mono pruntita de la registaro, ŝia avnjo jam elĉerpis la tuton de la familia vivsubtena ŝparmono pro sia enhospitaliĝo. Pri la eduka planado de sia infano ŝi tute ne havas konsideron. Malgraŭ ĉio, la infano estas la floro de la patrolando. Se ĝi velkiĝus, tio ne tute kulpigus ĝiajn gepatrojn. Kompreneble tio estas plendoj. La infano estas karnpeco elŝirita el la korpo de la patrino, kiu neniel ne flegas ĝin zorgeme. Delonge ŝi volus aĉeti por sia avnjo iom plidikan veston el

Kaj dum unu el la vojaĝoj, Bujan kaj lia taĉmento grimpis tiel malproksimen en la orienton, ke neniu el la taĉmentanoj povis vere kompreni kien ili venis. Dum la tago ili rajdis tra malferma kampo, kaj estis nenio ĉe la horizonto, kio povus altiri ilian atenton. Sed kiam mallumiĝis, ili rimarkis, ke ili alproksimiĝas al la marĉoj. Sub la hufoj de la ĉevaloj komencis ŝmaci marĉa koto, kaj fetoro pendis en la aero. Ili decidis ĉirkaŭiri la marĉon dekstre. Necesis halti por la nokto, sed ili ne volis fari ĉi tion proksime de la marĉo. Unue, pro la terura fetoro, kaj due, pro la moskitoj kaj aliaj insektoj kiuj estis ĉi tie en grandega nombro. Kaj kiel ajn foriris la taĉmento, ili ne povis foriri de la marĉoj dekstren. Ne estis junaj aŭ nespertaj militistoj inter la partoprenantoj en la kampanjo. Ĉiu el ili spertis batalojn kaj kampanjojn, kaj ne necesis diri, ke ili ne sciis kiel navigi sur terenoj. Sed restis la fakto, ke ili ne povis eliri el la marĉoj. La akvo jam atingis la pasternojn de la ĉevaloj, sed ankoraŭ ne estis signo de tero. Necesis fari fajrojn, alie estis risko, ke la ĉevaloj restu sen okuloj pro moskitoj, sed eĉ ne estis peco da seka tero.

Nesciate, kiom longe la taĉmento vagis sub la hufa ŝmacado. Kaj jen, kiam ekestis malespero en la animoj de la rajdantoj, ĉiuj klare kaptis la odoron de fumo. La ĉevaloj ekhenis kaj, kvazaŭ laŭ ordono, staris fiksiĝintaj sur la loko. En ajnaj tempoj la longe atendita fajro povus alporti ne nur savon, sed ankaŭ morton. Bujan sendis du skoltojn antaŭen. La resto de la taĉmento, fiksinte sian kirason, prepariĝis por ĉiufanka defendo, tiom kiom tio estas, kompreneble, ebla en malfermitaj areoj. La skoltoj sufiĉe rapide revenis. Ili raportis, ke tre proksime estis insuleto, sur kiu staris nur malgranda traba domo. Fajro finbrulas proksime de la domo. Ne estis videbla lumo en la sola fenestro, la riglilo estis verŝajne fermita, decidis la skoltoj. Ili ne trovis spurojn de la ĉeesto de granda nombro da homoj.

Estis decidite eliri malkaŝe. La taĉmento alproksimiĝis al la insuleto. Bujan kriis plurfoje al tiuj, kiuj eble estos en la kabano. Post longa silento, la malalta pordo

malfermiĝis kun laŭta knaro. La figuro de viro aperis en la lumo de la mortanta fajro. Laŭ ĉiuj aspektoj ĝi estis maljunulo. Tre kaduka maljunulo. Li estis tute nigre vestita, en lia mano estis grandega bastono, pli alta ol la maljunulo mem, kaj korvo sidis sur la ŝultro de la posedanto de la insulo. Kaj frostoj trakuris la dorsojn de la spertaj militistoj, kiam ili renkontis la rigardon de la maljunulo kaj lia nekutima birdo.

"Kiu vi estas? Kion vi volas?" - diris la maljunulo laŭtvoĉe. La forto de lia voĉo ne kongruis kun lia kurba figuro.

"Ni venas kun paco, patro!" - Bujan respondis kiel eble plej amike.

"Kun paco? Tion mi vidas, ili estas pendigitaj per armiloj de la kapo ĝis la piedoj!" - respondis la maljunulo.

"Nu, eniru trankvile!" - invitis la posedanto. "Estas ŝedo malantaŭ la domo, tie estas brulligno kaj fojno, mi enlasos nur unu homon en la domon!" - diris la maljunulo kaj eniris la kabanon sen ŝlosi la pordon post si.

Bujan forlasis la taĉmenton por starigi tendaron, kaj li, venkante timon, paŝis en la mallumon de la kabano. Estis multe pli da spaco interne ol ĝi ŝajnis de ekstere. La maljunulo sidis ĉe granda kverka tablo kaj legis kelkajn skribulaĵojn.

"Kion vi serĉas, tiom malproksime de la hejmo, Bujan?" — akre demandis la maljunulo, kio ege timigis la enirinton. Sen permesi al li rekonsciiĝi, la maljunulo daŭrigis: "Ne timu, mi ĉion scias pri ĉiuj, kaj kio vin rongas, ankaŭ mi scias!" Bujan ne rimarkis, kiel li trovis sin sur la benko kontraŭ la posedanto.

"Ĉio, kion vi bezonas, realiĝos. Estas nur unu kondiĉo!" — daŭrigis la maljunulo.

"Kia?" - Bujan apenaŭ elpremis el si.

"Venigu al mi vian duonfilinon!" - respondis la maljunulo.

"Kiel?" - Bujan diris preskaŭ flustre.

"Kiel? Bone, ke vi demandis. Venigu tiel, ke ŝi mem volu veni ĉi tien. Kaj ne simple veni – kuru!" - la maljunulo respondis ridante.

"Sed kiel?" - murmuris Bujan.

"Jen, kiel, kiel, balbutas! Tre simple! Diru al ŝi, ke atendas ŝin kara patro!" — la maljunulo prezentis sin en stranga maniero.

"Do vi estas Sur, la patro de Bajana?" - Bujan apenaŭ elpremis.

"Hmm, ŝajnas, ke moskitoj vin multe mordis!" - Sur mokis la gaston.

"Ne estas via afero, kiu estas ŝia patro! Estas via afero konduki ŝin ĉi tien! Nun dormu, kaj matene mi klarigos ĉion detale!"

Matene Sur donis al Bujan kompletan, por tiel diri, instrukcion. Sed estis ankaŭ multaj enigmoj kaj preterlasoj en tiu instrukcio, kiuj igis la kapon de Bujan vertiĝi. Kaj antaŭ ol foriri li kuraĝis peti al Sur almenaŭ kelkajn garantiojn: "Mi komprenas, ke mi devas venigi mian duonfilinon! Sed kion mi faru kun miaj aferoj? Kiel subigi Beljana-n? Kiel komenci la militon?"

"Estos milito por vi! Ne dubu pri tio! Sed kiel akiri virinon, mem ne maltrafu la momenton! Duonfilinon venigu ne pli malfrue ol ŝi iĝos dek-sep-jara! - respondis la maljunulo impertinente.

Tagmeze la sekvantan tagon la taĉmento trankvile forlasis la marĉojn. La vojo hejmen estis rapide trovita.

Nun Bujan havis planon. Estis espero, ke ĉio rezultigos, sed estis ankaŭ timo. Ĉar lia duonfilino kun jaroj iĝis pli kaj pli malsama ol aliaj homoj. Kaj ŝajnis al li, ke ŝi scias ĉion, kion li pensis. Jen kio malrapidigis lin. Li, kompreneble, povintus ŝovi ŝin en sakon kaj porti ŝin al Sur perforte, sed tiu strikte malpermesis al li fari tion. Do pensu pri kiel trompi homon, kiu travidas vin?

### Magia nokto

La festo estis en sia pinto. Ĉe la fino de la tablo plej malproksima de Jaga, iu komencis kanti. La kutimo, cetere, estis ankaŭ prenita de homoj. Iu dividiĝis en grupojn kaj havis konversaciojn pri tio kaj tio. Disputoj aŭdiĝis ie, sed ili iris mallaŭte kaj amike. Jaga volis vidi la spiriton de la subteraj riveroj Alajo-n, sed li ne aperis jam dum cent jaroj. Sed ĉi-jare almenaŭ estis novaĵo pri li. Li estis kreanta ion novan, preparante vican artefakton. Ĉi tio estis la signifo de lia vivo. Li ŝatis krei novajn kaj novajn artefaktojn, kaj poste trankvile ĵeti ilin al homoj por ke ili povu strebi al la alta kaj bela. Alaj kredis je homoj, kaj li verŝajne estis la sola, krom Jaga, kompreneble, kiu ankoraŭ ne perdis fidon al la homaro. La ceteraj spiritoj: la Supera, Maljunulo kaj aliaj, jaron post jaro, jarcenton post jarcento, perdis la respekton al homoj, ĉesis esperi, ke homoj memoros, ke ili ankaŭ estas parto de la naturo. Alaj ja daŭre kredis, daŭre helpis homojn, sincere esperante, ke la homaro revenos al la kompreno, ke ankaŭ la Tero vivas kaj ĝi havas finitan paciencon. Per siaj kreaĵoj, Alaj provis peri al modernaj homoj ke ili jam estas la kvina civilizacio de inteligentaj estaĵoj loĝantaj sur la Tero. Kaj ĉiufoje kiam la pacienco de nia planedo atingis sian limon, la orgojla civilizacio detruis sin. Kaj poste okazis nova revoluo de evoluo, nova inteligenta vivo, novaj esperoj. Tiu ĉi civilizacio estis la plej amata por Alaj, ĉar nur en tiu ĉi kvina civilizacio naskiĝis infano de homoj kaj spiritoj. Temas, kompreneble, pri Jaga.

Noktomezo, sankta por ĉiuj sur la Tero, alproksimiĝis, kiam eĉ spiritoj povas plenumi siajn dezirojn. Ĉiuj antaŭĝojis la nun tradician prezenton de akvoŝeinoj. Kelkajn minutojn antaŭ noktomezo, ĉiuj spiritoj, kiuj ĉeestis en la festo, kuniĝis per manoj kaj staris ronde. Se iu estus sufiĉe bonŝanca por observi tion de la flanko, oni vidus, ke brilo aperis en la centro de la cirklo kaj poste soris en la ĉielon en akre hela kolono, trapikante la ĉielan karnon kaj foriranta en la spacon. Ĉiuj starantaj frostiĝis kun la okuloj fermitaj. La lumkolono komencis akiri pli helan brilon de supre ĝis malsupre, kvazaŭ la potenco de la universo revenus kaj kunfalus kun la potenco de la Tero, trapasante ĉiun partoprenanton de la magia rondo.

La plej potenca rito de la jaro finiĝis, kaj ĉiuj iris al la bordo de la mirinda lago. La feinoj montris sian dancon jaron post jaro, kaj ŝajnis, ke ĝi neniam ripetiĝis, ke ĉiufoje aperas ia nova elemento. Por ĉi tiu agado, Vodjanoj permesis al ili kolekti la plej ŝatatajn de Jaga liliojn. Kaj ĝi valoris tion. Florkronoj kun brulantaj kandeloj floris sur la lago. La niksinoj dancis, naĝante inter la lumoj, kaj super ili, formante bizarajn figurojn, ŝvebis helaj lampiroj, kiuj estis propre trejnitaj de Leŝij mem. Kaj en tiu momento la malnovaj rivaloj ĉesis disputi kaj pruvi, kiu estas pli kruda. Sirenoj kreis magion en la akvo, kaj lampiroj en la aero. Neniu el la spektantoj distriĝis aŭ parolis. Ĉiuj rigardis fascinite. Ĉiuj vidis ion malsaman en ĉi tiu danco: iuj vidis la pasintecon, iuj la nuntempon, kaj iuj la estontecon. Eĉ la maltrankvila Skor staris kaj rigardis silente. Antaŭ la prezentado, li pensis pri novaj ŝercoj pri homoj, sed li komencis rigardi la magian dancon kaj forgesis pri ĉio. Jaga rememoris la junecon de tiuj, kiuj estis parto de ŝia vivo, kiuj, havante mallongan homan vivon, por ĉiam fariĝis nur parto de ŝia memoro.

La feinoj finis la dancon, sed la gastoj staris longe kaj ne disiris. Vodjanoj, kiel ĉiam, preskaŭ krevis pro fiero. Estis tia sento, kvazaŭ li mem estis la koreografo de tiu spektaklo. La festo daŭris, medo fluis kiel rivero, sonis kantoj kaj aŭdiĝis ridado. Skor, trinkinte tro da medo, komencis ĉikani siajn najbarojn ĉe la tablo. Ĉio finiĝis per banala deviga naĝado en la lago. De kie lia amata niksino Leia helpis lin eliri.

Jaga, Leŝij kaj Vodjanoj parolis pri la bezono urĝe fari ion rilate al la modernaj homoj. Ilia teknika evoluo denove atingis nivelon, kie homoj ĉesis taksi la vivon de la planedo. Ili bedaŭris, ke denove ne estis fidela amiko kaj instruisto de Jaga - Alaj. La fakto estas, ke homoj periode komencis veni al la okcidentaj limoj de la sorĉita arbaro. Kaj ĉi tio ĉiam signifis unu aferon: sekvante la progresintajn taĉmentojn estis grandaj grupoj armitaj per modernaj teknikajtoj. Ili estis venantaj por detruo la arbaron. Ĉar ĝi ne povus esti nomita provizado. Tio estis la detruo de la vivanta naturo kaj pura barbareco. En kazo de granda danĝero, estis decidite doni plenan rajton al Skor kaj lia teamo. Kaj li, se ne estas retenita, li povas fari ĉi la aferojn, nur li ne troigu. Murdo estis kontraŭa al la naturo de la spiritoj de la Tero. Kvankam la homo perdis kontakton kun la naturo, spiritoj neniam prenis lian vivon (kun maloftaj esceptoj, nur tiuj kiuj estis inklinaj al malico). (*daŭrigota*)



elrusigis **Sergei Isakov** (Rusio)



## Chiung Yao (1938-2024)



*aŭtorino, Chiung Yao*

### En profunda korto (14)

En profunda nokto, Bai Peiwen rapide veturis per sia aŭto sur la montvojo al Wulai. La vento el la monto blovis renkonte al li kaj penetris en lian kolumon. Sur la zigzaga montvojo troviĝis nek alia piediranto nek alia aŭto. En tiom kvietata, malvarma kaj profunda nokto, knarado de la aŭtradoj sur la vojo

disrompis la silentan noktan pejzaĝon de la monto. Ekde kiam li eliris el la ĉambro de Hanyan, li sencele stiris sian aŭton tiamaniere tien kaj reen en la urbo kaj ĉirkaŭurbo. Sen preni manĝon, li ne sentis malsaton. Lia konscio ĉiam dronis en dolora malespero. Kun vertiĝo kaj konfuzita menso, li sentis sian koron jen kaj jen konvulsii kaj ĉiun nervon premita. Nun, li veturigis la aŭton al la supro de Monto Wulai, ne klare sciante, kion li faros tie, kaj nur sentante, ke li devas trovi kvietan lokon por trankviliĝi por siaj febre varma kapo kaj kirlanta doloro en la koro. Proksime al la montsupro, li haltigis la aŭton kaj malfunkciigis la motoron. Elaŭtiĝinte, li staris en apudvojaj herboj kaj rigardis malklaran kaj ondantan montvalon sub la lunlumo. La vento spiraliĝis el la valo sible kaj murmure, kun etoso de tristeco kaj soleco, kaj resonis kaj vibris tra la monta spaco. La lunarko jen aperis jen malaperis inter flosantaj nuboj, kaj montetoj en la valo variis sub ŝanĝiganta lunlumo: klaraj, malklaraj, helaj kaj malhelaj. Apogante sin kontraŭ eŭkalipt-arbo, li bruligis cigaredon kaj ŝprucante cigared-fumon, li kontemplis la montvalon. Lian menson ankoraŭ okupis ŝiaj vizaĝo kaj okuloj songeĉaj, plendemaj kaj tristaj. Li ne povis retiri sin el la battoj de ŝia vera kaj honesta monologo. Ekde sia aĝo de dek du jaroj, li havis kontaktojn kun multe da junulinoj, en kiuj ne mankis filinoj de distingitaj kaj nobelaj familioj, sed li ĉiam konsideris la amon kaj serioza kaj sankta, kaj pro tio li preferis prokrasti geedziĝon tagon post tago ol plenumi geedziĝon senpripense. Liaj gepatroj, pro lia obstineco, koleriĝis multfoje. Post la morto de lia patro, lia patrino des pli entuziasme zorgis pri lia edziĝo. Kiel aliaj maljunulinoj, kiuj havis la tradician ideon de daŭrigo de familia linio, lia patrino rigore demandis al sia solfilo Peiwen pli ol cent fojojn, “Vi elektas tiun kaj ĉi tiun, sed kian finfine vi elektas je via kontentiĝo?”

“La plej purkoran, la plej supervulgaran kaj la plej perfektan,” li respondis mediteme. En lia cerbo pentriĝis la feino, kiun oni neniel povis eltrovi en la homa mondo, kaj por serĉi tiun li ne volis edziĝi tiel frue. Ĉu la idolo en liaj okuloj povus deveni de la vulgara mondo? Li preskaŭ perdis sian esperon. Maljuna sinjorino Bai aranĝis serion da rendezuoj kaj prezentis al li sennombrajn famajn belulinojn, sed li trovis en ili nur pimpajn tualetojn kaj afektadon. Li lamente diris al sia patrino, “Tiun kun feina allogo, panjo! Mi volas tiun kun feina allogo!”

“Kio estas la feina allogo?” kolere diris la patrino, “Laŭ mi, vi volas tiun kun vulpaodoro!” De sia infaneco, li kondutis obeeme al sia patrino kaj neniam iris kontraŭ ŝia volo, sed pro ĉi tiu afero la patrino travivis multe da malĝojo. Obstine li atendis kaj atendis la ŝancon neatingeblan, kaj fine li renkontiĝis kun Hanyan. Kiel granda ĝojo lin trafis! Kiom da tagoj li pasigis sen dormo kaj kun tagnokta sopiremo! Tagnokte en lia menso alkröciĝis ŝiaj figuro, brova kuntiriĝo kaj rido, softaj paroloj, timideco kaj mildeco, malforteco kaj aminda ĉarmeco. Li nereteneble sekvis ŝin ĉiumomente kaj avidis akiri ŝin. Lia avido bruligis lin kiel fajro kaj turmentis lin konstante. Hanyan, Hanyan, Hanyan... Li tuttage maĉadis tiun nomon, kiu jam fariĝis reenkarigi de diino kaj la anstataŭanto de ĉio la plej perfekta, la plej purkora, la plej animtuŝa kaj la plej supervulgara! Tiu Cindrulino! Li jam volis hasteme ornamu ŝin per tiu reĝina krono, sed hodiaŭa konversacio kun ŝi jam frakasis lian perfektan revon pri ŝi, kiu havis mankon kiel makuleto en diamanto, kaj li eĉ dubis, ĉu la makuleto povas esti forigita. Hanyan! Li amare direktis sian rigardon al la ĉielo. Kial vi devus diri al mi tion? Kial vi devus? Vi jam detruis kaj frakasis ĉion belan, Hanyan! La nokto pli kaj pli profundiĝis. La vento en profundaj montoj blovis friske kaj fride, kaj mallaua murmurado de pinoj kaj bambuoj vekis tiom da tristeco kaj izoliteco. Malproksime en la arbaro senĉese pepadis sennoma birdo, ŝajne sola de sia aro. Tiel li staris tie malgraŭ blovado de montvento, malsekigo de nokta roso, subirado de la luno kaj dismoviĝo de la steloj.... ĝis kiam li jam finfumis la tutan pakon da cigaredoj kaj liaj piedoj sentiĝis kaj rigidiĝis. Forĵetinte la lastan cigaredstumpon, li enŝovis sin en la aŭton. Li devis reiri hejmen. Kvankam li jam estis tri-dek-jara, li ankoraŭ ne povis malobservis la regulojn difinitajn de sia patrino nek volis, ke ŝi maltrankviliĝu. Startiginte la aŭton, li parolis al si mem, “Estas tiel. Mi prenu ĉi tiun aferon kiel inkubsonĝon! Ŝi antaŭe servis kiel kundancistino kaj poste kiel laboristino. La virino kun tia socia pozicio ne konvenas al mi kiel edzino. Imagu, kiel mia patrino diros. Lasu do! Ne pensu pri tio! Mi prenu tion kiel inkubsonĝon kaj kiel epizodon en mia vivo. Ĉio jam finiĝis.”

Li stiris la aŭton sur la revena vojo. Lia decido donis disŝiran doloron al sia koro. Li sciis, ke la doloro daŭros longan tempon, kaj li ne povos dummomente liberiĝi de la figuro de Hanyan. La aŭto rapide glitis en nokta mallumo, transkuris la ponton

“Pinoj kaj Bambuoj”, kaj proksimiĝis al la pordo de la domo.

La domo estis nove konstruita inter te-plantejoj. Li dezajnis ĝin, ĉar li lernis en arkitektura fakultato en universitato. Delonge li volis doni elegantan nomon al la domo, sed li ne sukcesis elpensi la konvenan. Li parkis la aŭton ĉe la pordo, kaj timante, ke li surprize vekas la patrinojn, li ne vokis maljunan Zhang per hupado por malfermi la pordon, kaj li mem malfermis ĝin per ŝlosilo kaj eniris.

La lampo en salono ankoraŭ lumis. Li surpriziĝis. Certe Gao Lide ankoraŭ ne enlitiĝis! Pensante, li puŝmalfermis la pordon de la salono kaj ekvidis sian patrinojn sidi rekte en la sofo kun senpalpebruma rigardo al li.

“Ho, panjo, ĉu vi ankoraŭ ne enlitiĝis?” li demandis surprizite.

“Kioman horon vi scias?” ŝi demandis.

“Jes, mi revenas malfrue,” li respondis iom maltrankvile, irante al la ŝranko por verŝi al si glason da akvo.

“Kio okazis?” la maljuna sinjorino akre rigardis lin.

“Nenio. Estis sociema aranĝo,” li malklare respondis.

“Sociema aranĝo?” ŝi fikse rigardis lin. “Eldiru honeste. Vi neniam kaŝas ion de mi! Kio okazis lastatempe? Tuttage vi montriĝas distriĝema. Vi enamiĝas, ĉu ne?” Denove li surpriziĝis, rigardante ŝin. Li sciis, ke li ne povas kaŝi ajnan sekreton de ŝi, ĉar la maljuna sinjorino estis inteligenta, saĝa kaj decidema tipo. Kiam ŝi estis juna, ŝi estis belulino de distingita familio. La dumviva afero de lia patro prosperis dank’ al ŝiaj helpo kaj apogo. Tial, en la familio la maljuna sinjoro Bai tenis aŭtoritatecon. Lia patro kaj li ambaŭ respektis, timis, amis kaj obeis ŝin. Kiel solfido, li restis ĉe ŝi pli longan tempon kaj nutris preskaŭan adoremajn al ŝi, ĉar ŝi estis nobla, serioza, decidema kaj aŭtoritata.

“Enamiĝi?” Li turnis la glason en la mano. “Ne ĝis tiel serioza grado!”

“Kia junulino ŝi estas?”

“Ne menciu ŝin. Tio jam forpasis,” li mallaŭte diris, rigardante la glason en la mano, kaj li sentis, ke la disŝira doloro en lia koro pliiĝas.

“Ho,” ŝi fikse rigardis lin sen ignori la mizeron esprimitan ĉe liaj brovoj kaj en liaj okuloj. “Kio do? Ĉu vi jam perdis la amon?”

“Ne,” li tuj reagis.

“Do, certe la junulino ne estas sufiĉe bona!”

“Jes!” li diris kun pli granda rapideco, kiu mirigis lin mem. “Ŝi estas tre bona! Ŝi estas la plej bona el la junulinoj, kiujn mi iam vidis.

“Ho?” ŝi silente kaj enpenseme rigardis la vizaĝon okupitan de ĉagreno. “Ĉu vi konatiĝis kun ŝi en la okazo de sociema aranĝo?” ŝi demandis zorgeme.

“Ne.”

“Kian okupon ŝia patro prenas? Komercisto?”

“Ne, ne,” li aldonis. Li demetis la glason, el kiu li ne trinkis eĉ unu buŝplenon. “Ne demandu, panjo. Mi jam diris, ke ĉi tiu afero jam forpasis. Mi estas laca,” li ĵetis ekrigardon al la ŝtuparo. “Ĉu vi ankoraŭ ne enlitiĝu?”

“Vi iru enlitiĝi!” diris la maljunulino, rigardante lian dorsfiguron kaj okule sekvante liajn pezajn, lacajn kaj senfortajn paŝojn supren laŭ la ŝtuparo. Stariĝinte, ŝi iris al la fenestro kaj ĵetis la rigardon al la floroj en malhelo plenaj en la ĝardeno. Ŝi, ekbalancinte la kapon, murmure parolis al si, “Forpasis? Finiĝis? Ne, ĉi tiu afero ankoraŭ ne forpasis nek finiĝis. Li vere enamiĝas.”

Jes, la afero ne forpasis nek finiĝis. La sekvantan tagon kiam li iris al la oficejo, li ĉiam prikalkulis, kiel li diros, kiam li vidos Hanyan, kaj kion li diros por ne vundi ŝian koron kaj komprenigi al ŝi, ke ĉio jam finiĝis. Kompreneble ŝi ne povos esti restigita en la fabriko. Li povos donaci al ŝi sumon da mono kaj skribi leteron por rekomendi ŝin labori en aliaj lokoj. Dank’ al sia socia pozicio, li tre facile trovi taŭgan laboron por ŝi. Ĉiuokaze ŝi ne faris grandan kulpon. Eĉ se la afero finiĝis inter ili, li ne toleras, ke ŝi ree reduktiĝos al kundancistino aŭ laboristino, kaj devas bone aranĝi ĉion por ŝi. Stirante la aŭton, li al kroĉiĝis al la problemo survoje. Li kredis, ke li jam kalmiĝis. Sed, ju pli lia aŭto proksimiĝis al la fabriko, des pli forte lia koro batis, kaj des pli rapide lia sango trafluis. Kaj krome, en sia subkonscio, li komencis atendi la momenton vidi ŝin. Ree ŝia vizaĝo flosis antaŭ liaj okuloj. Kaj li ŝajne vidis la paron da ŝiaj tristaj okuloj, kiuj gape fiksiĝis sur li. Eliginte elspiron, li aŭtomate akcelis la aŭton.

Enirinte la fabrikon, li impetis en sian oficejon. Hodiaŭ li malfruiĝis, pensante, ke Hanyan certe jam troviĝas en la oficejo. Sed, enirinte la pordon, li surpriziĝis, ĉar vaka estis la sidloko de Hanyan. Tio, kio renkontis lin, estis plenĉambra kvieto. Ŝi tute ne alvenis. Li staris ĉe la pordo kelkajn sekundojn senmove. Sekve de tio forta kaj malespera ondo sin ĵetis al li kaj englutis lin. Post longa tempo, li iris malantaŭ sian tablon kaj peze sidiĝis sur la seĝon. Apogante sian kapon per la mano, li fermis siajn okulojn kaj falis profunde en solecon kaj frustrigon.

Iu frapis je la pordo. Li levis la kapon, kaj dummomente sango sin ĵetis en lian kapon. Ŝi alvenas, li pensis, kaj li preskaŭ nerveze fiksrigardis la pordon. La pordo malfermiĝis kaj envenis laborestro Cai. Li eligis longan elspiron. La laciga kaj senfortiga sento tuj ekvolvis lin. Li malĝoje demandis, “Kian aferon vi havas?”

“Yan Lili donis ĉi tiun leteron al mi kaj volis, ke mi transdonu ĝin al vi. Estas fraŭlino Zhang, kiu konfidis ĝin al Yan por transdoni al vi.”

“Fraŭlino Zhang?” li surpriziĝis kaj ekkomprenis, ke fraŭlino Zhang estas Hanyan. Transpreninte ĝin, li refoje ne povis bridi la frenezajn korbatojn. Retiriĝante el la ĉambro, Cai scivolvis rigardis lin. Ferminte la pordo, li sidiĝis en sofion kaj senprokraste ŝirmalfermis la koverton. Kiam li eltiris la leterpaperon, la delikataj kaj

belaj skribaĵoj de Hanyan prezentiĝis antaŭ liaj okuloj, “Sinjoro Bai...”

Tia titolado dolore pikis lin, tiel ke li forte ekmordis siajn lipojn. Post tio, li dekomence legis plu. La letero estis skribita simple kaj mallonge:

“Sinjoro Bai,

Mi tre bedaŭras, ke mi alportis multe da ĝenaĵoj, kaj ankaŭ mi dankas al vi, ke vi donis al mi multflankajn zorgojn dum ĉi tiuj monatoj. Mi pensas, ke, en nuna cirkonstanco, ne plu estas oportune por mi labori en via oficejo de la fabriko, tial mi eksiĝis. Mi kredas, ke post nelonge, vi povos dungi alian por anstataŭi min.

Ne zorgu pri mi. Mi estas nur refoje priludita de la sorto. Mi neniam plendas pri mia malbona sorto kaj mizera vivo. Ekde nun mi flosas en la maro de homoj. Mi bondeziras al vi profunde! Mi deziras al vi trovi viajn feliĉon kaj ĝojon!

Hanyan

skribis en lamplumo”

Demetinte la leterpaperon, li ekhavis la senton plenan je amareco kaj acideco en la koro. Ŝi eĉ ne atendis lian permeson kaj eltiriĝis memvole. Tio devus solvi lian malfacilan problemon, sed male li kovis neeldireblajn melankolion kaj ĉagrenon. Preninte la leterpaperon, li legis ripetfoje. Hanyan, vi malpravas, li pensis. Vi nenecese flosas en la maro de homoj, kaj mi donos al vi bonan aranĝon. Stariĝinte, li paŝis tien kaj ĉi tien de unu flanko al la alia de la ĉambro, almenaŭ pli ol centfoje. Post tio, li residiĝis ĉe la tablo. Elpreninte koverton, li metis monbiletojn de kvin mil dolarojn en ĝin kaj skribis letereton:

“Hanyan,

Bonvole akceptu ĉi tiujn kvin mil dolarojn por via vivteno. En sekvaj tagoj mi faros alian aranĝon por vi. Atendu, kaj neniel rifuzu mian favoron. Unuvorte, vi estas la plej bona el la junulinoj, kiujn mi iam renkontis. Mi neniam forgesos kaj neniel povos forgesi vin. Tial ne rifuzu mian amikecon al vi.

Ĉion bonan!

Peiwen”

Sigelinte la koverton kun monbiletoj, li voke venigis Cai Jinhua kaj sendis tiun al la loĝejo de Hanyan por transdoni ĝin al ŝi. Cai surprizite rigardis lin, kaj foriris obeante lian ordonon. Post du horoj, ŝi revenis al li kaj metis sur lian skribtablon la monbiletojn de kvin mil dolaroj, la samajn kiujn li sendis antaŭe. Gapante al la monbiletoj, li kuntiris siajn brovojn kaj demandis, ”Ĉu ŝi ne akceptis?”

“Ne.”

“Kion ŝi diris?”

“Nenion ŝi diris. Ŝi petis al mi resendi ilin al vi.”

“Ĉu ŝi ne skribis ion?”

“Ne, nenion.” Rigardante lin, Cai iom hezitis, ŝajne volante diri ion, sed retenis

sian parolon, kaj nur gapis al li.

“Kio?” li demandis, “Kion vi volas diri?”

“Ĉu vi jam maldungis fraŭlinon Zhang, sinjoro Bai?” ŝi fine demandis.

“Nu,” li diris malklare. “Estas ŝi, kiu ne volas plu dungigi ĉi tie.”

“Ho,” ŝi mallevis la kapon. “Mi pensas, ke ŝi volas labori ĉi tie, alie ŝi ne faligis larmojn, vizaĝe al via letero.”

Li ekstremis. “Ĉu vi diris, ke ŝi ploras?” li demandis maltrankvile.

“Ŝi ploris tre amare, sinjoro!”

Li firme kunpremis siajn dentojn, kvazaŭ lia koro kuntiriĝus en bulon. Post kiam Cai eliris el la ĉambro, li sidis tie senmove kaj gapis al la monbiletoj sur la tablo. Dummomente li ekhavis la impulson, ke li volis veturigi la aŭton al la hejmo de Hanyan, kunportante la monon. Sed li regis sin. Se li farus tion, kio estus la rezulto? Krom se li ankoraŭ pretas akcepti ŝin... Ne, ne, li ne povas fari tion! Post kiam li sciigis pri tiu peco de ŝia historio, ĉio devas veni al la fino, ĉar li ne povas ignori tiun fakton. Li kovris sian vizaĝon per manoj kaj mizere skuadis sian kapon sur la manplatoj. Li ne povas preterlasi la fakton! Li ne povas!

Li ne iris al la hejmo de Hanyan, nek la sekvantan tagon nek la trian tagon. Sed li fariĝis malpacienca kaj kolerema, maltrankvila kaj marasma. Li rifuzis negocadon, multe koleris kontraŭ siaj dungitoj, ne povis labori trankvile kaj malvolontis eniri sian oficejon por ne vidi la vakajn sidlokon forlasitan de Hanyan... La kvaran tagon li iris al la fabriko tre frue kaj sidis malantaŭ la skribtablo, tenante sin eksterordinare silenta. La tutan tagon li ne diris unu vorton nek traktis ofican aferon nek eliris por tagmanĝo, sed nur stulte kontemplis vizaĝe al ŝia sidloko. Kiam vesperiĝis, li subite eksaltis kaj eliris grandpaŝe el la fabriko en la direkto al sia aŭto. Malferminte ĝian pordon, li rapide ŝovis sin en ĝin kaj startigis ĝin senprokraste. Post unutaga pripenso, li ekhavis klaran komprenon, li fine ekhavis klaran komprenon! Elturninte sin el la tradicia ideo pri “virgulino”, li vokis la nomon de Hanyan per ĉiuj siaj animo, volo kaj sentoj. Hanyan! Kiel stulta mi estas! Li kriis en la fundo de sia koro. Kiel tio povus damaĝi vian perfektecon? Vi estas tiel vera, tiel korpura, tiel bonkora, tiel leĝera kaj tiel alta super aliaj, kiel blanka nuboj... Kio povus damaĝi vian perfektecon? Miaflanke mi eĉ makulas vin per la socia malbonvirto! Kiel stulta mi estas, Hanyan! Mi estas la plej granda malsaĝulo en la mondo, malsaĝulo la plej stulta, la plej nepardonebla, la plej kruela kaj la plej vulgara! Mi eĉ pedante stultiĝas doni grandan atenton al “virgulino”! Ho, Hanyan! Mi vane elspezis tutajn tri tagojn, dum ni ambaŭ enabismiĝas en mizero. Mi estas malsaĝulo! Mi estas la plej granda malsaĝulo en la mondo!

La aŭto rapidis tra stratoj kaj stratetoj en la direkto al ŝia loĝejo. Lia koro tamburadis pli forte ol la aŭta motoro. Li volis plifrupe vidi ŝin, plej plifrupe! Ĉe la

fino de la strateto, li haltigis la aŭton. Salte elirinte el la aŭto, li impetis en la strateton. Li senĉese preĝis en la koro: Ne eliru, Hanyan. Vi devas resti en la hejmo! Mi havas mil vortojn por diri al vi, kaj vi devas resti en la hejmo! Sed...li repensis: ne gravas, eĉ se vi forestas en la hejmo, kaj mi staras ĉe via pordo kaj atendas ĝis vi revenos. Mi nepre vidos vin hodiaŭ, nepre!

Ĉe ŝia pordo, kiam li pretis levi sian manon por frapi, li surprizite vidis afiŝon de ruĝa papero kun tri okulfrapaj vortoj “Bona Domo Luota”. Li tuj preĝis en la koro: Ne, ne, Hanyan, vi ne povu foriri, absolute ne! Li frapis je la pordo, sed morta silento regis en la ĉambro. Malbonaŭgura antaŭsento fridigis lian koron. Li refoje frapis je la pordo, kaj aŭdiĝis responda paŝbruo de lignosandaloj. Sekve de tio malfermiĝis la pordo, aperis ne Hanyan, sed maljunulino kun hartubero. “Ĉu vi volas lupreni la domon?” tiu demandis.

“Ne, mi volas vidi fraŭlinon, fraŭlinon Zhang,” li haste diris.

“Fraŭlino Zhang jam translokiĝis.”

“Translokiĝi?” Li eksentis sian kapon ŝvelanta kaj siajn membrojn malvarmaj. “Kiam ŝi translokiĝis?”

“Hieraaŭ vespere.” Ŝi turnis sin por fermi la pordon. Li tuj faris paŝon antaŭen kaj baris la fermadon de la pordo. “Ĉu vi scias, kien ŝi translokiĝis, mi petas?”

“Mi ne scias.”

“Ĉu vi scias, kie troviĝas la hejmo de ŝiaj adopto-gepatroj?” li ree demandis kun preskaŭa malespero en la koro.

“Mi ne scias, mi scias nenion,” ŝi respondis malpacience, volante fermi la pordon.

Elpoŝiginte monbileton de cent dolaroj, li enŝovis ĝin en ŝian manon kaj diris preskaŭ peteme, “Bonvole lasu min eniri por rigardi, ĉu bone?” En lia koro restis ankoraŭ strio da espero. Ĉar ŝi translokiĝis hieraaŭ, en la ĉambro restas pli aŭ malpli kelkaj aĵoj, kiaj adreso, nomo de parenco kaj alia indikaĵo. Li devas eltrovi ion, li devas elserĉi ŝin!

Kun mirego kaj ĝojo, la maljunulino tenis en la mano la monbileton. Cent dolaroj! Rento por duonmonato! Li certe estas riĉa frenezulo! Ŝi haste retirigis kaj larĝe flankenŝovis la pordon. Ŝi ripetade diris, “Rigardu, rigardu laŭ via plaĉo, rigardu tiel longe kiel vi volas!”

Li eniris kaj ĉirkaŭrigardis. En malplena ĉambro ĉio estis pura kaj bonorda. La lito kaj tablo, kiuj apartenis al la luiganto, ankoraŭ restis tie netrasmokigitaj. En la ĉambro ŝajne ŝvebis alkröĉigeme la bonodoro de la vestoj de Hanyan, kaj li viziis ŝin, kiu, ankoraŭ kun amemaj okuloj, iom kuntiris siajn brovojn, sidante sur la litrando. Li forte ekskuis sian kapon kaj, irinte al la tablo, tirmalfermis tirkeston. En ĝi troviĝis kelke da blankaj kovertoj neuzitaj kaj malgranda tablo-kalendaro. Li foliumis ĝiajn foliojn, esperante trovi ion de ŝi skribitan, sed nenion en ĝi. Kaj aliaj

tirkestoj estis tute malplenaj. Ĉirkaŭrigardinte, li ne trovis ŝian ajnan postsignon en la ĉambro. Kiam li mallevis la kapon, li trovis paperkorbon sub la tablo. Li klinis sin kaj eltiris ĝin. Vere en ĝi troviĝis multaj eluzitaj paperfolioj. Li pririgardis ilin unu post alia: fakturoj, eltondaĵoj de literaturaj verkoj, pakpapiroj... Poste li trovis ĉifitan paperbulon. Kiam li malvolvis ĝin, ĝi estis nenio alia ol la letereto skribita de li al ŝi, sur kiu ŝi markis per multaj krucoj per ruĝa kraĵono tiel forte, ke la paperfolio estis difektita. Ĉe malsupra marĝeno de la letereto, li vidis senkoherajn frazojn skribitajn de ŝi:

“Kiel kruela vi estas, Bai Peiwen! Kiel reala vi estas! Ne necesas por vi foririgi min per kvin mil dolaroj. Mi memvole foriros kaj ne ĝenos vin. Sed mi malamas vin!

“Ho, ne, ne, Peiwen, mi ne malamas vin. Se nur vi volantas veni, mi petas, ke vi venu, venu por savi min! Mi ne plu volas esti soleca, mi ne plu volas vagi tien kaj tien. Mi amas vin, Peiwen! Se nur vi volantas veni, se vi ignoras mian pasintecon, mi volas esti via sklavino rampanta ĉe viaj piedoj! Ĉu vi ne scias? Vi ne scias pri mia arda atendo de vi nek pri mia freneza amo al vi. Bai Peiwen! Bai Peiwen! Bai Peiwen! Bai Peiwen!... Savu min, Peiwen! Sed, kial vi ne alvenas? Jam du tagojn. Vi vere ne venos!

“Kiel ordinara vulgarulo, vi forĵetas, abomenas kaj malestimas min. Vi estas nobla sinjoro, dum mi malpura fiulino!

Kion alian mi povas esperi? Mi ne plu sonĝas. Kiel stulta mi estas! Mi vane pensas, ke vi ŝanĝas vian eraran opinion. Mi ne plu sonĝas, neniam! Ruiniĝon al mi! Enabismiĝon al mi! Degeneradon al mi! Mi edziniĝu al tiu idioto! Kio gravas? Hanyan, Hanyan, vi estas nur kotpeco sub aliulaj piedoj! Peiwen, mi malamas vin, malamas vin, malamas vin, malamas vin!...”

Sennombraj “mi malamas vin” plenigis la malsupran marĝenon de la paperfolio. Li tremete tenis ĝin en la mano, kun ŝvito eksudanta sur sia frunto. Nur ĝis la nuna momento, li eksciis, kion li faris al ŝi, kiel li humiligis kaj vundis ŝian fragilan animon kaj kiel pasie ŝi lin amas. Ŝi eldiris ĉion sian al li por ne trompi lin. Ŝi pensis, ke li povas doni pardonon al ŝi kaj ekkoni ŝian puran animon. Sed kaj li? Li eĉ liveris al ŝi kvin mil dolarojn kiel “la pagon de disiĝo”! Li ŝancele sidiĝis sur la seĝon antaŭ la skribtablo. Apogante sian kapon per ambaŭ manoj, li rerigardis ŝian skribaĵon. Lia koro kuntiriĝis kaj doloris, lia gorĝo sekiĝis krevonte, lia rigardo malklariĝis kaj lia animo tremetis. Li jam travidis la vojon indikitan sur la papero: ŝi iros al la infero. Nur Ĉielo scias, kiun vojon ŝi elektas, kiam ŝi troviĝas en despero! Nun li tre malamis sin mem. Kial li ne ekkomprenus unu tagon pli frue? Kial li ne venus ĉi tien hieraŭ nokte! Nun kie ŝi estas? Kie ŝi estas?

“Mi volas eltrovi vin, Hanyan! Mi volas eltrovi vin!” Li diris tra inter la premantaj dentoj, “Eĉ se vi troviĝas en la infero, mi elvenigus vin!” (*daŭrigota*)

*elĉinigis Vejdo (Ĉinio)*



## Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



*poeto, Mikaelo Bronŝtejn*

### Meditado

Naiva mensoget'  
 en la oreĵon falas.  
 Pri kio ĝi signalas,  
 mi ne scivolos, sed  
 de lundo ĝis merkred'  
 mi pensas nur pri tio.  
 Fortiĝas opinio,  
 ke devus mi kun kred',  
 se venis tiu pled'

pristudi, – eĉ se klaĉon, -  
 sed plaĉon, kaj malplaĉon  
 forŝovi al bufed'.  
 Deksepa cigared'  
 jam estas forfumita...  
 Mi estas informita,  
 do ne plu decas ced'.  
 Sufiĉas pensokned'!  
 Mi devas jam reagi,  
 al ofendintoj pagi  
 per sama agrimed',  
 ĉar ajna miskonced'  
 min povus kompromiti.  
 Ja eblas nur imiti,  
 ke ekis la proced',  
 sed poste, dum banked'  
 paciĝi, eble, toste,  
 manpremi - iom poste...  
 Aŭ ne?! Ja la obsed'  
 min daŭre perskutos,

se la ofendon glutos  
mi sen rebati... sed,  
pensante ĝis vendred',  
mi jam ne plu memoras,  
pro kiu blag' fervoras  
mi dum semajno! Ted'  
alvenas kun nekred',  
forfluas fiaj sentoj...  
Naiva mensoget' –  
sed kiom da turmentoj!

\*\*\*

Nu, ĉion ajn nun diru oni  
malantaŭ mia olda dorso,  
sed mi komencas fanfaroni  
nur en ebri' kaj kun rimorso,  
min admonanta pensi sobre  
eĉ en ne tute sobra stato.  
Alie, certe, falos sob re-  
levanta sin popola ŝato.

\*\*\*

Volis stulta car' de  
lando aĉhumora  
muziki mocarte.  
Do en iu horo  
vokis li flutiston  
faman en la mondo  
por el ties buŝo  
venu la respondo.

Al demando lia  
la ruzul' kun fluto  
diris: - Moŝto via,  
tamen ĉu en tuto  
umis vi almenaŭ,  
eble... kun gitaro?  
Kraĉis car': - Apenaŭ.  
Car' mi, aŭ ne caro?!

Ekde la prapatroj  
mi la landon regas,  
kaj dezirojn carajn  
dio mem ja flegas.  
Do, kiom da mono  
volas ci, fripono,  
por instrui arte  
min ludi mocarte?

La ruzul' gratetis  
sian krispan nukon,  
iom hezitetis:  
- Estas certa truk' en  
la instrua senco,  
postulanta penon.  
Mi por la komenco  
instruu azenon.

Se azeno via  
fluton ĉi ekludos,  
Senprobleme vi ja  
poste tion studos.  
Pri l'honorario:  
du sakoj da oro  
estu deca pago  
por mia laboro.

Ekde, – diris caro, -  
vi kun mia beno.  
Sed kiom da tempo  
lernos la azeno?  
La flutist' ŝultrumis:  
- Dankon pro l'konsento,  
sed tio dependas  
de ĝia talento...

## Rita Mkrtĉjan (Armenio)



*poetino, Rita Mkrtĉjan*

Ne memoras, kiu min instruis,  
Ĉu gepatroj, libroj, aŭ mem la viv',  
- Ne forgesu iam ion bonan,  
Kun animo pura ĉiam restos vi.

Se ofendis iu vin, mensogis,  
Pro malbona ag' doloras kor',  
Foliumu paĝon tiun nigran  
Kaj kolerajn pensojn ĵetu for.

Ne forgesu iam belajn vortojn,  
Helpon, agojn, manon de amik',  
Sciu, vortojn elradias koro  
Kiel flor' kreskanta el radik'.

Kaj ne ŝanĝu lumon kun mallumo,  
Lasu, ke ekflugu bona sent',  
Estu en animoj niaj suno,  
Eĉ se en la mond' - la ŝtorm' kaj vent'!

\*\*\*

Aŭtuna tag' sopiris koro,  
Sencela voj' kondukis min,  
Sub piedoj- flava foliario  
La pluv' senfina kaj la voj' sen fin'.

Sed, jen subite - la miraklo  
La rozo pala en folia "mur'",  
Ĉu songo aŭ la miraĝo,  
Aŭ de sorĉist' fabela tur'?

Sed kiel restis roz' mirinda  
sur voj', deŝiris ĝin neni',  
- Ne nur la dornoj estas en la vivo,  
La rozo flustris, kaj nenion pli.

# Marzena Wawrziczkoa (Pollando)

## triado

estas fermita cirklo de la egopozicio  
konstante ŝanĝante siajn guroojn  
rigardantaj aŭskultantaj robotoj  
kondiĉe ke ili volas kredi je sia kreinto

el la ok miliardoj ili forĵetos la grenventumaĵon  
ellasililo por stimulo de DNA  
datumaro estas kreita por kontrolo  
ombro de amasiĝo de densaj urboj

hierarkiaj ŝtupetaroj horizontala ludo  
al la flavaj veŝtoj mankas gvidanto  
akvogotoj en flako kunfandiĝas  
informoj estas kreitaj de subtera klano

kun la ŝanĝo de datoj, la programo ne faros ĝin  
antaŭ ol montri bluan trabon hologramon  
kanaligoj sur disko perdas sian brilon  
ni amuzu nin kaj lasu la teatron daŭri

\*\*\*

La Blanka Urbo plena de sonoj kaj gustoj  
lumigado de sentema animo  
polpo sur la kristnaska vespera menuo

lumiĝis en ĉi tiu decembra vespero  
muzika tono ĉe la rando de Eŭropo  
Siesta Tr ękowa fluas memore

la enigmo de Władysław el Varno  
solvi en geneologio  
la sorto de pola portugala reĝo

Alfama kaj Betlehemo ĉe la Tajdo

alia vojaĝo per flava tramo  
en Baixa kun la ligna lifto de Justyna

el la libro Nokta trajno al Lisbono  
koni la pasion de la gvidisto por la urbo  
fotosentemo sensualeco kaj festo

## **Pahana\***

sistema ilo por malsovaĝigi  
koleraĵoj sentas sin senesperaj  
profiloj sen monetigo daŭras  
kaptitaj el vortoj depresivaj statoj

zorgas pri kiu komuniki  
uzas timon por erarigi vin  
la procezo de detruo influas la kurson de la eventoj  
memoro en grafen-bazitaj ĉeloj

la sorto de robotaj organismoj  
ili revas apokalipsajn profetaĵojn  
ili alportas esperon al la alia ekstremo  
blankaj longaj haroj inter la hopiaj indianoj

*\*La Perdita Blanka Frato*

\*\*\*

kial konekti kun malhela energio  
la diablo donos ion ajn por igi vin pagi poste  
kiel facile timo kreas sklavojn  
kiam ĝi malrapidigas la ŝanĝojn sur la tero

nescio embuskas - kaptilo por la homaro  
maŝinado daŭre estas en progreso  
la nigra vojo malaperas

partoj de la matrico detruos la tuton

la programo havas sian propran antiviruson  
analizas neklarajn vojojn  
nombroj venas de statistiko  
rekonu kaj detruu ajnajn entrudulojn

vivas subtere - la avataro supre  
artefaritaj dividoj generitaj  
vi estas plena de energio - vi amuziĝas  
mi revas kiel Alico en Mirlando

## **armeo**

sen manipulado alligiteco daŭras  
al la surteraj plezuroj de mono kaj sekso  
raketo en la spacon timoj presitaj  
ĉeesto de iu alia dum meditado

kiam la radio kaj televido estis forĵetitaj  
ili serĉas majstron kiu montros la vojon  
ĉerpas sanktan energion el podkasto  
la lasta generacio kaptas la ŝipon

ĉesu ruli la hologramo malklariĝas  
la kalendaro rememoros la enkarniĝon de Mitra  
malhelaj lumaj tuneloj super vi  
vi estas via propra guroo jupitero

de altflugitaj esoteraj konceptoj  
memplenumaj profetaĵoj  
ili kreas pensojn el retejoj  
kaj de dronaj vidoj en la ĉina ĉielo

## **postbildo**

sen via energio la publiko malaperas  
detranĉi la finon de la piramidoj  
postlasitajn birdotimigilojn

ne trompiĝu pri reciklado

ne estas profito al aliulaj planoj  
la fonaj spiritoj estas mortigitaj de la abunda parazito  
rigardante identigon  
ignorante tion kion vi ne plu estas

sentas senliman konscion  
emocio nutras puran enhavon  
neŭtrala reto de novaj pensoj  
kreas rigardetojn de la templinio

## **civitana amo**

mi ne legos la poemon  
kaj voku vian animon  
mi ja ne estas la unua  
kiu estas memori vin

mi ne citos strofojn  
ĉar vi ne havas manieron defendi vin  
agiti por batali  
mi ne bezonas verŝi larmojn

mi ne estos nigra kaj blanka  
fotoj kaj respublikoj reviviĝas  
memstaraj tekstoj  
absolvu viajn farojn

mi ne serĉos spurojn  
sur la stratoj de Toruń  
kaj aŭskultu la bardojn  
en muzikaj, funebraj kordoj



## Laimundas Abromas (Litovio)



*poeto, Laimundas Abromas*

### Filino de Diablo

Similas strange ĉi fabelo l' veron,  
 Diablo vivis iam sur la Tero.  
 Delonge vidis li. Kaj pri edzino  
 memore restis ŝiaj tri filinoj.  
 Ankoraŭ kvara estis, tre afabla.  
 Bedaŭre malfidelis kaj Diablo...  
 Nevera estis tiu ĉi fratino,  
 filino de Diablo kaj Feino...  
 Kaj pasis multaj jaroj... Belaj iĝis  
 filinoj de Diablo, maturiĝis.  
 Kadukis tamen patro kaj rigidis,  
 filinojn edzinigi li rapidis.

Plej aĝan li invitas al palaco,  
 al ŝi parolas ame, sen prefaco:  
 „Arogantecon, kiel doton karan,  
 al vi mi atribuas senavare  
 kaj edzon mi elektis“. Do, sen miro  
 edzino iĝis ŝi de l' oficiro.  
 Filinon duan li al si invitas,  
 senliman monavidon dote kvitas.  
 Kaj edzon trovis por filino riĉan.  
 La negocisto faros ŝin feliĉan.  
 Bonvole kaj filino tria venis.  
 Por ŝi la ekscitiĝon patro tenis.  
 Kaj edzon al filino tria donis,  
 poeton bluokulan li disponis.  
 Filino kvara aŭdis tion, spite  
 ŝi venis al la patro seninvite.  
 „Neniom dotos vin, - Diablo diras,-  
 kaj edzon mem vi trovu, se deziras.  
 Patrino vokis vin per kant' feliĉa,  
 do, iru sole vi tra l' mond' senriĉa“...

Vespiris ŝi kaj la okulojn fermis...  
Subite sur la Tero l' nokto ĝermis.  
Kortuŝis tio patron... Sen akلامو  
li nomis ŝin per milda nomo Amo...  
Kaj iris forpuŝita ŝi sen vortoj,  
sentime, por renkonti ŝian sorton.  
Pli forta restis ŝi ol l' mort', malbeno,  
eterne juna, rava kaj bonvena.  
Senvorte ŝin komprenis koro ĉiu,  
konanta tiun senton kun pasio.

De tiam migras ŝi tra l' mondo tuta  
kaj portas florojn, sunon kaj saluton.  
Junece ŝi misteras kaj impetas,  
aŭ kiel maro – ŝtormas kaj koketas.  
Se foje ŝin ekkonos iu iam,  
forĝesos tiu ŝin neplu, neniam.  
Ĉu blonda estos ŝi aŭ nigrohara,  
rideto ŝia iĝos ĉiam kara.  
Konsolos iun milde ŝi, anĝele.  
Alian ŝi turmentos, eĉ kruise.  
Kaj nomos ŝin malsame ĉiuj homoj,  
ĉar l' amo havas multajn, multajn nomojn.  
Ĉu helos majo aŭ novembro mornos,  
sed spite frapos ŝi al ĉiu pordo,  
kaj venos, kiel la impeta ondo,  
alflugos pli silente ol la songo.  
Sendormos nokte ni, ĉar ŝin sopiros,  
sufero pro la duboj koron ŝiros.  
Destinis l' sort', ke Amon ni ekkonu,  
pli frue-malpli frue, sen admono.  
Ŝi venos invitita kaj senvoke,  
neatendita tute, senprovoke.  
Se Amon senpreferos iam iu,  
por tuta vivo malfeliĉos tiu.  
Kaj ne senkaŭze oni ja legendas,  
ke amosenton mem Diablo sendas.

## Elena Popova (Bulgario)



*poetino, Elena Popova*

### Ĉielarko por li

Se iu vin petas  
helpu al li kviete.  
Li – branĉet' rompita  
pro venteg' subita.  
Lia anim' ĝemas  
kaj vivi malemas...  
Kaj la birdo vundita  
al la homoj venas.  
Etendu al li manon,

donu akvon, panon!  
Donacon al li donu –  
ĉielarkon kaj vojon!  
Li kun fortoj novaj  
ekstaros denove.

### Ĉe sunsubiro

Vojo serpentumas tra la verdaj herbejoj ĝis rondetaj montetoj. Li ŝajnas malĝoja, soleca.

La ĉielo estas ekscitita, nigraj nuboj tranĉas la bluon, verŝajne pluvos ie. Ne estas homoj, bestoj kaj eĉ birdoj, ili kaŝiĝis en atendado. La suno ankoraŭ brilas, sed baldaŭ ĝi kaŝos sin malantaŭ la monteto por alporti lumon aliloken.

Ankoraŭ unu tago forlasas la kalendaron, kion ĝi alportis al la homoj, kion alportos morgaŭ? Paco estu!

### Aŭtuna bildo

Tri arboj sur la placo, kisitaj de la suno.

La unua arbo de paradizo, kun brilantaj oraj folioj sude kaj verdaj norde. La tuta arbo tremas: "Mi estas juna! Mi estas bela! Amu min!..."

La dua apud ĝi, kun folioj de malhela oro, ĉirkaŭita de bruna krono, kaj sur ĝia pinto- verda tufo krias: „Mi ne rezignas! Ne rezignas!..."

Kaj la tria en linio, kun malhelaj nuancoj de koloroj, humile flustras: "Ĉio estas pasema! Ĉio!..."

Tri arboj ĉirkaŭitaj de lumo.

Aŭtuno-pentristo ĝuas siajn kreaĵojn.

# Bedo de Ĉinesko

## Veĵdo (Ĉinio)



poeto, Veĵdo

*Jenaj poemoj estas skribitaj laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo, kies skemo konsistas el kvin verslinioj respektive kun 3, 5, 7, 7, 5 silaboj, kun rimarangô xaxaa (x = senrima).*

## Ankaŭ vi estas lupo

*rakonto pri Afanti*

Nobelo

ŝafon savis el

la buŝo de lupoj kaj

ĝi sekvis lin kun fidel'

al hejmo de l' nobel'.

Li hejmen

iris fiera.

Li preparis buĉi ĝin

per tranĉilo ŝtalfera

per man' kruela.

La ŝafoj

pro lia perfort'

blekadis ja senĉese

en lia malgranda kort'

evite de mort'.

La krio

Afanti-n vere

surprizis, kiu loĝis  
najbare, netolere  
iris kolere

al la kort'.  
Klare la nobel'  
diris: "Mi ĝin el lupo  
savis pro ĝia mizer'  
sub brutala pel'."

Afanti  
jen serioze  
ĉuis: "Kial ne dankas  
ĝi, sed blekas riproĉe  
kaj tre nervoze?"

Riproĉas  
ĝi mizere sub  
via mortiga pozo.  
Vi agas kun peza kulp',  
vi ja estas lup'!"

## Frenezulo

*rakonto pri Afanti*

Afanti  
post longa resto  
en urbo pro afero  
reiris al hejm-nesto  
por ripoz-festo.

Survoje  
en arbaron li  
misis kaj jen vidis  
nobelon ĉasanta ĉi  
kun granda pasi'.

Retenis  
lin tiu krie  
ĉuis: “De kie venas  
vi?” dirante defie,  
senemocie.

Afanti  
respondis klare:  
“De tiu urb’ nefora,”  
montrante senerare  
al l’ urb’ trans-vale,

kiu ja  
estas la hejmlok’  
de l’ nobelo kun luksa  
kastel’ sur fortika rok’  
kun granda allog’.

La nobel’  
jen demandis plu:  
“Kia la urbo estas?”  
“Bela kun bona situ’  
kaj kun viva ĝu’!”

“Nun diru:  
kiel la riĉaj  
homoj kondutas tie.”  
“Ĉiuj mon-superstiĉaj  
kaj perfortiĝaj.”

“Kiel pri  
la mandareno?”  
“Li estas tre tirana  
kiel stulta azeno  
kun kruelpeno.”

Ĉe tio  
ĉuis la nobel’:

“Ĉu vi vere konas min?”

Afanti respondis: “Ne,  
ne, ne, neniel.”

“Mi estas  
tiu mandaren’ .”

Do, Afanti demandis:

“Respektinda moŝto, jen,  
ĉu konas vi mem

min vere?”

“Ne, mi asertas!”

“Tiea frenezulo  
mi tute esti certas  
kaj mi avertas,

ke kvankam  
mia frenezo  
ne ĉiam min atakas,  
mi agas laŭ herezo  
ja sen komplezo.”

Afanti

aldonis plue:

“Mi ja benas vin sane  
kaj malsane mi brue  
diraĉas ĝue!

Hodiaŭ

en malsan-stato  
mi tamen diris al vi  
la veraĵon laŭ ŝato  
sed ne la flaton!”



## La surtutoj de bienuloj

*rakonto pri Afanti*

Por manĝi  
ŝafon senpage  
de Afanti komplotis  
bienuloj tromp-age  
jen iutage.

Alvenis  
ili al lia  
kaban' kaj ĥore kriis,  
“Venos, kara Afanti,  
mondfino fia!

Domaĝe!  
Perdiĝos vane  
la ŝaf' bredita de vi  
penege propramane  
kaj akompane.

Hodiaŭ  
venas bonkore  
ni helpi ĝin formanĝi!  
Ni klopodu fervore  
por ĝi labore!”

Dirinte,  
ili ĵetis sin  
sur la ŝafon feroce  
kaj kruise buĉis ĝin  
al peca ruin'.

Afanti  
diris nun, “Bone!  
Ĉar la mondfin' alvenos,  
mi bredas nebezone



ĝin furaĝ-done.

Surtutojn  
viajn bonvole  
demetu antaŭ ĉio  
por refreŝigi fole  
ne plu petole.

Lasu min  
prepari en ord'  
kaj kuiru l' ŝafaĵon  
por via palata mord'  
kun ĝu' en komfort'."

Post tio  
li por kuiru  
fari preparojn tuje  
laŭ ilia deziro  
ja sen suspiro.

Kaj fakte  
li jen kaŝis tuj  
la ŝafaĵon, bruligis  
la surtutojn sur fajruj'  
kun flama ĝojbru'.

Post kiam  
ili de ludad'  
revenis por la ŝafaj',  
ili trovis kun malsat'  
nenion sur plad',

sed nure  
cindron en fajrbrul'  
de iliaj surtutoj.  
La bienuloj kun hurl'  
en duba nebul'

ekkriis  
ĥore denove,  
“Afanti, kion faris  
vi kontraŭ ni ruzkove  
kaj stulte bove?”

Bruligis  
vi eĉ aŭdace  
niajn luksajn surtutojn!  
Kiel kruda minace!  
Kiel malplaĉe!”

Afanti  
diris sen anksi’,  
“Karaj, morgaŭ tuj venos  
mondfin’, ĉu vere ili  
utilos al vi?”



## Rovere Emanuele (Italio)



*poeto kaj tradukinto, Rovere Emanuele*

### Kisoj

*Esperantigo: Rovere Emanuele (Manŭel)*

*Muziko / vortoj: Bobby Darin*

Se vi iĝus mia korknabino,  
ĉiun horon vi ricevus kison,  
sed vi restas nur kun l' amininoj  
kaj sola neniam venas promeni kun mi.  
Se rigardas mi vizaĝon vian,  
mi ĉirkaŭbraki volas vin ĉebruste.  
Certe, ankaŭ vi deziras tion,  
sed sola neniam venas promeni kun mi.

Ĉiam mi volas viajn kisojn por mi,  
ilin mi redonos al vi,  
kara, feliĉa estu kun mi, ja jes!  
Ne plu diru "ne, ne, ne!"  
Kisojn kun amo donu, kisojn al mi ne ŝparu,  
la tutan vivon kaj unu tagon plu.

Nun vi estas mia korknabino,  
tamen multajn kisojn vi ne donas,  
kvankam ilin mi ege bezonas,  
kaj tiel soifa restas daŭre mi.  
Mi atendas kison tutan tagon,

sekva kiso venas post semajno.  
Se plu daŭros tia situacio,  
pro soifeg' je kisoj mortos mi.

Ĉiam mi volas viajn kisojn por mi,  
ilin mi redonos al vi,  
kara, feliĉa estu kun mi, ne plu diru "ne, ne ne!"  
Kisojn kun amo donu, kisojn al mi ne ŝparu,  
la tutan vivon kaj unu tagon plu.

## Brila kometo

*Esperantigo: Rovere Emanuele (Manŭel)*

*(laŭ populara muziko)*

*Vortoj: Emanuele Rovere (Manŭel)*

Brila kometo, en kristnaska ĉiel'.  
Vi memorigas min pri mia infanaĝo,  
kiam ŝajnis altegaj la kristnaskaj arboj al mi,  
cent revoj ekfloris en mia fantazi'.  
Arĝenta stelo, de supre vi gvidas min  
al la naskiĝa loko de Kristo Jesuo.  
Scenejo kortuŝa pri la plej grava event':  
ekis la historio de l' Nova Testament'.

Vin sekvante, mi trovas la vojon,  
kiu trafas la fonton de l'Amo,  
reakiras mi sentojn perditajn de Amo por la tuta homar'.

Bela steleto, varmas jam mia kor'.  
Vin rigardante sentas mi specialan ĝojon,  
kiu troviĝas nur en la Sankta Famili':  
venas el Betlehemo la vivekzemplo por ni.

Repaciĝas sub vi ĉiuj koroj,  
adorante la bebon Jesuo,  
dum la vicoj anĝelaj dissendas la gloran kanton en ĉiel'.

Brila komento, elkore mi dankas vin.

Rekte vi gvidis la tri Magojn al celloko.  
Konduku nin same al la plej granda trezoro,  
apud Kristo Jesuo: Li estas nia savo.  
Jen naskiĝis Jesuo,  
Savanto de l' homaro!

## Feliĉan naskiĝdatrevenon, bonŝancan novjaron

*Esperantigo: Rovere Emanuele (Manüel)*

*Muziko / vortoj: Emanuele Rovere*

Se vi foje ne povas plu kredi en l' estont',  
ĉar la vivo estas por vi de malĝoj' rakont',  
ne ĉesu kredi, ke venos por vi l' moment'  
post kiam vi vivos en granda kontent'.

Kaj, do, ne rezignu batali por tiu cel',  
laŭ la rekta voj' kondukanta al bon' kaj bel',  
ĉar nur por merito de via labor'  
atingos vi la veran feliĉon de l' kor'.

refreno: Feliĉan naskiĝdatrevenon, bonŝancan novjaron!  
Sanon, Amon, pacon, prosperon al vi!

Kaj, dum ni festenas en ĝoja, amika rond',  
ni tostu por la paco kaj por la prosper' de l' mond',  
por la realigo de l' granda esper':  
la tuta malaper' de malsat' kaj mizer'.

refreno: Feliĉan naskiĝdatrevenon, bonŝancan novjaron!  
Sanon, Amon, pacon, prosperon al vi!

## En blu' farbita de blu' (Flugadi)

*Esperantigo: Rovere Emanuele (Manüel)*

*Muziko / vortoj: Verde / Modugno*

Mi kredas, ke tia sonĝo ne revenos plu:  
la manojn kaj la vizaĝon mi farbis per blu'.

Poste, mi estis, subite, de l' vent' forrabita  
kaj, tra l' ĉielo senlima, ekflugis sorĉita.

Flugadi, ho-o kaj kanti ho-o-o-o,  
en blu' farbita de blu', feliĉa pro resti ĉi plu,  
kaj mi flugis, flugadis kun ĝojo  
pli alten ol suno kaj eĉ iom pli,  
dum la tero fariĝis lontana globeto sub mi,  
kaj la spaco ĉirkaŭa pleniĝis de dolĉa muzik'.  
Flugadi, ho-o kaj kanti ho-o-o-o,  
en blu' farbita de blu', feliĉa pro resti ĉi plu.

Sed vaporigas la songojn l'unua sunradi',  
la luno, je la subir', ilin portas kun si.  
Dum mia revo pludaŭras en viaj okuloj  
belbluaj kiel ĉielo punktita de steloj.

Flugadi, ho-o kaj kanti ho-o-o-o,  
en viaj okuloj de blu',  
feliĉa pro resti ĉi plu,  
kaj daŭrigas mi flugi feliĉe pli alten ol suno kaj eĉ iom pli,  
en la bluo de viaj okuloj, ho jes, dronas mi,  
via voĉo min ravas pli forte ol dolĉa muzik'.  
Flugadi, ho-o kaj kanti ho-o-o-o,  
en la blu' de viaj okuloj  
mi vidas ĉielon de steloj,  
en viaj okuloj de blu',  
feliĉa pro resti ĉi plu, kun vi!

## Se mi estus

*Esperantigo: Rovere Emanuele (Manŭel)*

*Muziko / vortoj: Emanuele Rovere (Manŭel) - 2016*

Se mi estus... se mi estus fajro, bruligus mi la tutan mondon  
kaj kovrus mi, per nigra, densa cindro, la tutan grundon.  
Se mi estus... se mi estus akvo, inundus mi la tutan teron,  
dronigus la homaron mi en putran, profundan maron.  
Se mi estus... se mi estus vento, mi disbategus ĉiujn florojn,

kaj svarmi lasus mi ne plu parfumojn, ne plu kolorojn.  
Se mi estus... se mi estus frosto, mi glaciigus ĉiujn korojn,  
por, ke neniu sentu plu la ĝojojn aŭ la dolorojn.

Ĉar malŝatas mi ĉi fian mondon  
kie mankas justeco, libero  
kaj pereas, ve!, ĉiun sekundon,  
virinoj, beboj pro malsato, mizero.  
Honesteco foriris el mondo  
kaj pri paco perdiĝis l'espero.  
De malamo altiĝas la ondo,  
ĝi etendiĝas jam sur la tutan teron  
kaj preskaŭ mankas Amo!

Se mi estus... se mi estus leĝo, forviŝus mi la dikajn kodojn  
kaj kiel devon lasus mi tutsimple la "dek ordonojn".\*  
Se mi estus... se mi estus lingvo, mi farus tuj, ke la vortaro  
de Esperanto iĝu l'komprenilo por la homaro.  
Se mi estus... se mi estus homo, mi volus vivi nur por Amo  
kaj vokus ĉiujn, kun frateca sento, "samideano".  
Jes mi estas... ja mi estas homo, la vivon donis al mi Dio  
nur por, ke mi kun ĉiuj kunestadu en harmonio.

Kaj mi strebas, ke la verda stelo  
iĝu la plej honora ornamo,  
estu la esperantista celo  
"la homaron kunligi per Amo".  
Ĉiuj ni volas, ke l' verda stelo  
iĝu la plej honora ornamo,  
ni batalu por la sankta celo  
"la homaron kunligi per Amo".  
Ĉar, fine, venkos Amo!

*\*La "dek ordonoj" estas la fundamenta leĝo de la Kristana Religio.*

## Du Mu (803-852)



*Du Mu, literatoro kaj poeto de la Tang-dinastio (618-907), Ĉinio*

*poeto, Du Mu*

### La printempo sude de la rivero Jangzio

En vastego ruĝa-verda trilas birdoj,  
En vilaĝoj kaj urbetoj flirtas vinvend-ŝildoj.  
Ho, el kvarcent okdek temploj tra la regno,  
Kiom vualigās svage en nebulaj bildoj?

### En gastejo

En la gastej' mi restas sen kompano  
Kaj en kontemplo de melankolio.  
La frida lamp' pensigas pri paseo,  
Ekvekas min sovaĝansera krio.  
Tra jaro l' hejmletero nun atingas  
Afliktas min matene nostalgio.  
Ekstere ĉe l' nebula riverbordo  
ligitas fiŝboat' de l' familio.

### Trinkado en soleco

Ekstere de l' fenestro sovaĝas neĝoŝtormo,  
El vinovazo ene mi trinkas ĉe l' hejtforno.



Ĉu ne pli bonus, se mi fiŝhokus en boat', aŭ  
Min lulus subtegmente, en pluv' aŭtuna, dormo?



tradukinto *Minosun* (Ĉinio)

## Aŭtuno en Chang'an

Tur' pli altas super prujn-frapita arbopinto,  
ne videblas nuba strio sur ĉielspegulo.  
Suda Monto klaras kaj imponas en aŭtuno,  
ĉu ĝi volus veti je la belo kun naturo?

## Survoje al Templo Yunzhi

Impetas rojo puŝe inter du ŝtonegoj,  
ĉevalon turnas mi al ponto en ŝancelo.  
Ĉe praa templ' tereno ludas vent' humida,  
krepuske sonorilo tintas en pluvpelo.  
Videblas tigra piedspuro sur sablejo,  
rojakvo ŝaŭme, glate fluas kun leĝero.  
mi daŭre serĉas sur la apudroja vojo,  
ne disponeblas pramo tamen pro akv-ŝvelo.

## Lamento pri floroj

Printempon serĉas mi malfrue, tre bedaŭre!  
Mi ne plendemu pri trofrua disflorado.  
Ventego jam forblovis ruĝajn florojn teren,  
elstaras verd-folioj, fruktoj en parado.

## Ĉe disiĝo

Kuniĝo montras ardan amon, sed disiĝ' neniom,  
drinkante mi ne povas ridmieni, se mi volas.  
Kandelo sur la tablo havas simpation por ni,  
per grasaj larmoj pro disiĝo ĝis tagiĝ' ĝi ploras.

## Aŭtuna tago

Mi laŭvole vivas la trankvilan vivon,  
ĝuas mi l' aŭtunan venton el la foro.  
Mi bambuojn plantas sur la montdeklivo,  
mi liutas al la gastoj kun bonvolo.  
Drogoherbojn mi kuiris ĉe vespero,  
en la kort' aŭdiĝas brua pist-laboro.  
Venas vera la natur' el paca dormo,  
splen' naskiĝas ree el pasinta koro.

## Rimorso

Dum mia iele-trapela viv' mi multe drinkis,  
diboĉis ĝue kun virinoj kun talio svelta.  
Dekjara vivo jen en Yangzhou krevis kiel songo,  
restas al mi nur nomo de putin-ĉasanto merda.

## Turo ĉe rivero

Mi trinkas la printempan arom-vinon,  
surgrimpas turon jam duonebria.  
Panike la sovaĝansera vico  
trarompas nubojn super fluo stria.

## Eta roko en Ok-pina korto

Pluvaj gutoj falas kreve kiel perloj brilaj,  
per la purpurverd' kovriĝas muskoplenta tero.  
Kiam oni povas vidi la imponan monton?  
Nur rigardu ĉi roketon kun fascina belo.

## En aŭtuna nokto

Ekranon aŭtun-nokt' fridigas en kandela lum'  
svingiĝas peli kulojn gaza ventumil' en zum'.

La ŝtupoj malvarmiĝas akve en vualo nokta  
ŝi kuŝe spektas la stelparon jen en amindum'\*.

*\*stelpar'—ĉi tie aludas bovistan kaj teksistinan stelojn (Altairo kaj Vego), kiuj, laŭ ĉina antikva legendo, estas du amantaj steloj.*

*elĉinigrigis **Veĵdo** (Ĉinio)*

## Sola trinkanto

Ekstere de fenestro hurlas la neĝ-ŝtormo,  
en domo mi trinkadas vinon ĉe fajr-forno,  
preferas mi fiŝkapti en aŭtuna pluvo,  
al mi pli bona estas enboate l' dormo.

## La funebra tago

Pluveto milde falas en funebra tago  
Survojaj homoj paŝas kun malĝoja koro.  
"Ĉu ie estas vindrinkejo, paŝtisteto?"  
Li montras la vilaĝon Abrikota Floro.



*tradukinto **Ardo** (Ĉinio)*

## Alessandra Madella (Italio)



### Intervjuo kun Ĵenja Amis pri la teatraĵo “1910”

aŭtoro, Alessandra Madella

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) proponas ĉiujare du tekstojn por la komuna legado de la 15-a de decembro, Zamenhofa Tago kaj Tago de la Esperanta Libro. Krom la rondiranta rakonto “Pri viroj kaj kunikloj”, la ĉefa propono por 2024 estas la teatraĵo “1910”, kiu estis prezentita, kun granda sukceso, dum la UK en Montrealo en 2022. Ĝi estis filmita de Alekso Miller kaj la filmo estas plene disponebla rete en la kanalo “Exploring Esperanto” de Alekso Miller.

Ni intervjuis ĝian aŭtorinon, Ĵenja Amis, kiu ankaŭ planas publikigi libron pri ĝi en 2025.



**ĴA:** Ĵenja Amis

**AM :** Alessandra Madella

AM: Ni legos la unuan parton de via teatraĵo “1910” por la jam tradicia komuna

legado dum la Zamenhofa Tago. Kia estas la figuro de Zamenhof en ĝi?

ĴA: La figuro de Zamenhof estas tre grava en la rakonto. Iom kiel la aero, li estas “ĉiam ĉeesta”. Jen ni “vidas lin”, dank’ al la rakonto de s-ro Mann, ĉe la tablo, ornamita per verdaj rubandoj, sur la ŝipo rapidanta al Ameriko... Jen li alvenas per trajno al Vaŝingtono por la Internacia Kongreso kaj paŝas, kvazaŭ tra la triumfa arko, inter la vico da jubilitaj kongresanoj... Jen li submetiĝas al la taskego saluti individue ĉiujn kongresanojn, dum s-ino Zamenhof modeste intermiksiĝas kun samideanoj... Oni sentas lin spirite eĉ kiam la rakonto “saltas” al aliaj, estontecaj tempolinioj. Sed jen grava afero! Zamenhof ne estas la ĉefa heroo de la teatraĵo — ĝia ĉefa heroo estas s-ro Mann, nia ĝentila kaj afabla rakontisto, kaj li absolute adoras la Zamenhofojn. Sed jen paradokso: s-ro Mann fakte pensas, ke li ne estas la ĉefa heroo de la rakonto!



AM: Kion via teatraĵo povas alporti al instruistoj kaj lernantoj?

ĴA: Multon, kaj pro multaj kialoj. Unue, la enhavo; due, la interaga formato kaj trie, la fakto, ke legajon akompanas la filmo!

La enhavo de la teatraĵo estas la rakonto pri nia propra historio, la historio de nia Esperanto-Movado. La legantoj povas “preni la tempomaŝinon” kaj plonĝi al la komenco de la antaŭa jarcento kaj mem trasperti, per legado aŭ aktorado, la fruan tempon de la Movado. Estas abunda tereno por diskutoj kaj komparoj de la Movado tiam kaj nun.

Due, la formato estas partopreniga: oni, fakte, povas transformi la legad-sesiojn

al rol-legado kaj kvazaŭ teatrumado. Diversaj homoj povas alpreni la rolojn de demandantoj, kaj tiel oni povas partoprenigi eble eĉ ĉiujn ĉeestantojn de la sesio.

Kaj trie, la filmo, kiun faris la mirinda Aleksio Miller dum la viva prezento de la teatraĵo, estas vera trezoro. Laŭ mia scio, ĝi estas la unua kaj la sola plenlonga filmo de teatraĵo en Esperanto havebla rete! Spektado de la filmo estas perfekta aktivaĵo, ĉu individua aŭ klasĉambra, kiu perfekte komplementos la legadon. Kaj la legaĵo, kaj la filmo estas bonaj por absolute ĉiuj niveloj de lingvoposedo.

AM: “1910” estas speciala, ĉar jam en la verkado mem vi multe strebis por ĝia sursceniĝo. Kiel ĝi diferencas de aliaj teatraĵoj ne tiel konscie pensitaj por tiu celo? ĴA: En Esperantujo, ĝenerale, mankas teatraĵoj, aparte plenlongaj teatraĵoj, kiujn oni sursceniĝis: ja la verko de la teatraĵo kaj ĝia efektiva prezento estas tamen du malsamaj taskoj. La sursceniĝa laboro estas peza, defia kaj eventuale multekosta, aparte sursceniĝa laboro en Esperanto, kie ne abundas profesiaj aktoroj kaj en la cirkonstancoj, kiam estas malfacile kunveniĝi homojn por ekzercoj. Do, la ĉefa diferenco estas ke “1910” estas la verko, kiu ekzistas ne nur surpapere, sed ĝi fakte estas prezentita antaŭ publiko, do, “pruvita sursceneĵe”.

La sursceniĝo de teatraĵo neniam estas banala afero, sed la sursceniĝo de “1910” estas en la kategorio de “tute farebla”. Ĝi bezonas nur du aktorojn, nur kelkajn rekvizitojn kaj kelkajn kromaktorojn, kiuj ludas la publikon kaj kiuj bezonas tre malmulte da prepariĝo. La teksto estas verkita tiel, ke la aktoro havu memor-helpilon (ekzemple, la fama taglibro de s-ro Mann, la ĉefa rekvizito de la prezento, helpas minimumiĝi la parkerigon), kaj la libro enhavas ĉiujn gvidilojn por la aktoroj kaj la produkta skipo. Multajn el tiuj instrukcioj, cetere, mi ĝustigis post la prezento, do, ili estas praktikitaj kaj “testitaj” en la vera vivo. Cetere, la teatraĵo povas esti prezentita ne nur teatre. Ĝi estas adaptebla al klasĉambro aŭ en kiu ajn kunveno aŭ ajna spaco. La instrukcioj ne estas “absolutaj”, kompreneble. Oni povas ĉiam adapti la teatraĵon al la ĉirkaŭaĵo kaj iom improvizi.



AM: Ĉu vi pensas, ke la filmo de Alekso Miller igas vian teatraĵon komprenebla ankaŭ por komencantoj?

ĴA: Jes, la filmo absolute bonas por komencantoj! Tiu filmo estas perfekta lernilo por komencantoj, unue, ĉar ĝi havas absolute modelan prononcon. Mi pensas, ke eĉ homoj tute novaj al Esperanto povas ĝenerale kapti, kio okazas. Ne forgesu ankaŭ, ke la teatraĵo havas du kantojn en Esperanto, kiujn ĉiuj kantemuloj ĝuos kunkanti!

Alia grava afero — la filmo havas subtekstojn en la angla, franca, hispana, hungara kaj, kompreneble, Esperanto mem! Al mi ĉiam plaĉas spekti filmojn kun subtekstoj en la lingvo de la prezento mem, kaj mi pensas, ke kaj la lernantoj kaj la instruistoj, aparte aprezos la Esperantajn subtekstojn! Mi ankaŭ aldonu, ke estis Alekso Miller, kiu kreis Esperantajn kaj anglajn subtekstojn! Mi vere ne povas danki lin sufiĉe pro ĉiu lia laborego! Cetere, oni povos aĉeti la blu-radian diskon de “1910” de Alekso Miller en 2025, per la butikoj de Esperanto-USA kaj lia Jutuba kanalo (Exploring Esperanto), kie ankaŭ haveblas la filmo. La disko estos ankaŭ vendata dum la Usona-Kanada Landa Kongreso en julio 2025 — do, venu al Toronto por nepre havi vian ekzempleron!

AM: Vi diskutis “1910” kun diversaj internaciaj publikoj, ekzemple ĉe Bobelarto. Kiuj demandoj impresis vin plej multe?



ĴA: La demando, kiu venas plej ofte, estas, ĉu vere ekzistis la taglibro de s-ro Mann. La respondo estas: “jes kaj ne”. Bone, la taglibro, kiun vi vidas en la teatraĵo, ne estas vera taglibro de s-ro Mann. Ĝi estis rekvizito de la teatraĵo, kiun, tamen, la ĉefa aktoro — Garry Evans — diligente kaj manskribite plenigis, por povi legi la partojn, kie s-ro Mann legas el la taglibro. Tamen mi absolute certas, ke s-ro Mann posedis

taglibron, en kiu li skribis pri ĉiu okazintaĵo de la vojaĝo en 1910. Poste, kiam li verkis sian raportegon por LA BRITA ESPERANTISTO (verŝajne, revenante, sur la ŝipo), li, certe, multe uzis sian tagĵurnalon. Kiel mi scias tion? Simple ĉar alimaniere li ne povus reteni tiom da precizaj detaloj. Krome, li estis profesia ĵurnalisto, kiu, certe, ne farus eĉ unu paŝon sen sia notlibro. Do, dum la teatraĵo la uzo de la taglibro — kiu ankaŭ plenumis gravan praktikan funkcion — sentiĝis kiel bona elekto.

La dua plej ofta demando estas, ĉu la publiko demandas spontane. Bone, ĉi-foje la respondo, estas “tute ne”. Tio estas, fakte, mia plej ŝatata demando, ĉar tio pruvas, ke la prezento sentiĝis natura kaj ne teatra. La demandoj de la publiko helpis diversigi la etoson kaj engaĝi la publikon. Tiu formato de demandoj-respondoj donis multajn eblojn spontaneumi kaj improvizi (ekzemple, Garry Evans, kiu ludis s-ron Mann, multe ŝercis, pri kiel la homoj vestiĝas nuntempe).

Oni ankaŭ demandis, ĉu la rakonto de s-ro Mann estis mia sola fonto de la teatraĵo. S-ro Mann, efektive, provizis la plejparton de la elementoj, kiujn mi uzis, en sia artikolego en LA BRITA ESPERANTISTO de oktobro 1910. Sed mi tamen legis multajn aliajn raportojn pri la vaŝingtona kongreso de 1910 — el Francio, Usono kaj aliaj landoj, por havi kiom eble plej plenan bildon pri la evento. Nur et-eta parto de tio eniris en la teatraĵon.



Oni ofte demandis pri la muziko. La muziko rolas gravege en la teatraĵo: ĝi helpas rakonti la rakonton, prezenti la epokon kaj la etoson, fari la ŝanĝojn inter la scenoj, emfazi gravajn momentojn kaj transirojn... Ni estis bonŝancaj en Montrealo havi bonegajn muzikistojn, kiuj vive prezentis dum la teatraĵo (Stefano Laflamme kaj Kristina Miroshkina).



AM: Kion enhavos la libro pri la teatraĵo?

ĴA: Krom la kompleta teksto kaj la detalegaj instrukcioj por la aktoroj, ĝi havos kelkajn pliajn elementojn: la artikolon de s-ro Mann, kiu estis la ĉefa fonto de la teatraĵo, kaj plurajn ekzercojn por helpi al lernantoj kaj instruistoj. Krome, mi rakontos pri la eventoj kaj homoj, pri kiuj parolas la teatraĵo.

Ni solvos kelkajn misterojn — unue, pri nia mistera s-ro Mann, pioniro de la Esperanto-Movado el Britio, forgesita, sed reveninta, dank’ al tiu teatraĵo. La legantoj ankaŭ malkovros kelkajn ĝis nun tute nekonatajn faktojn pri la familio de Zamenhof, kiu enmigris al Kanado kaj kiun li vizitis post la vaŝingtona Internacia Kongreso. Mi rakontos pri la kvazaŭ-detektiva laboro trovi, kiu estis lia onklino (kies nomo ne troviĝas en kiu ajn historia libro) kaj lia samnomulo kaj samaĝulo, alia Ludoviko Zamenhof (!). Do la legantoj ekscios pri la tute nekonata, amerika parto de la Zamenhofa familio. Mi iomete parolos pri la sperto verki kaj produkti la teatraĵon mem kaj pri la mirakla remalkovro de la Unua Kanto de la Kontinento: unua kanto en Esperanto, verkita en Nord-Ameriko. Estas interese, kiom da mirindaj malkovroj kaj remalkovroj okazis dum la verkado!

Cetere, la muziko el la teatraĵo prezentita Montreale en 2022 estos havebla por la aĉetantoj de la libro, tiel ke se oni volos prezenti “1910”, oni havos ĉiujn elementojn por produkti la teatraĵon ĉu profesie aŭ amatore.

AM: Ambaŭ ĉi-jaraj proponoj de ILEI emas aktivigi la legantojn. Ĉu amatoraj samideanoj povus facile ludi vian teatraĵon?

ĴA: Ho, absolute jes! Memoru, ke nia montreala s-ro Mann — ludata de Garry Evans — fakte, ne estis profesia aktoro, eĉ se la aktorado estis en lia koro. Ni havis la bonŝancon havi profesionan aktoron, Alena-n Adler, kiu multe helpis al li. Alena mem ludis “Mary” en la fina parto de la teatraĵo kaj estis la reĝisoro de “1910” prezentita Montreale.



Kion mi rekomendus por legantoj? Aktori kun via koro. Ne timu iom troigi kaj

“paroli kun viaj manoj”. Ne timu fari paŭzojn kaj legi iom malpli rapide, ol vi normale farus. Memoru, ke s-ro Mann rakontas pri kio okazis. Do, pensu, kiel vi rakontus, se vi mem vojaĝus kun Zamenhof al Ameriko en 1910. Ne timu doni al s-ro Mann vian propran “guston” kaj karakteron.

Mi tre rekomendas spekti la filmon “1910” kaj atente legi la tekston anticipe, do, antaŭ ol vi faros la komunan legadon. En la filmo, notu diversajn detalojn. Se vi estas “s-ro Mann”, vidu, kiel Gary ludis s-ron Mann, sed ne hezitu montri s-ron Mann, kiel vi vidas kaj sentas lin. Eĉ se temas pri legado, provu iom internigi la tekston kaj rigardu la publikon, dum vi legas — ĉu ĉeeste aŭ virtuale. Por la legado, kompreneble, s-ron Mann povas ludi ankaŭ virinoj. Mi mem, cetere, ludis s-ron Mann je kelkaj okazoj. Alia afero, du malsamaj legantoj povas fari la rolon de s-ro Mann: unu kiam s-ro Mann parolas, kaj la alia povas fari la partojn, kiam li legas el la taglibro (la partoj, kiam li legas el la taglibro, estas indikitaj en la teksto).

Se vi estas la “demandanto”, ne hezitu montri vian entuziasmon, kiam vi faras viajn demandojn. Legu vian demandon anticipe kaj rigardu la publikon dum vi fakte demandas. Pensu, ke s-ro Mann estas via samklubano, kiu revenas de fora pasinteco kaj de alia lando, kaj vi estas avida aŭdi lian rakonton. Sciu, ke via entuziasmo fari la demandojn ankaŭ transdoniĝos al la persono, kiu “legas” por s-ro Mann!

La teksto donas al vi miajn aŭtorajn instrukciojn, sed vi ankaŭ rajtas improvizi kaj ŝerci (tamen, sekvu la ordon de la demandoj). Post la komuna legado vi povas eventuale pensi, kiujn aliajn demandojn vi farus al s-ro Mann, kaj se via “s-ro Mann” estas sufiĉe kuraĝa, “li” povas provi respondi ilin. En tia kazo, ne estas ajna malbona demando aŭ malbona respondo — gravas, ke vi havu amuzan tempon!

### **El CRIOline**

<https://esperanto.cri.cn/2024/11/12/ARTIuwHeiSnU8n8sv9eokS0C241112.shtml>

**CRIOline** | **ESPERANTO**

Ĉefpaĝo | Radio | E-klubo | Ĉina-lingvo | Pliaj Lingvoj | Pri ni

## Intervjuo kun Ĵenja Amis pri la teatraĵo “1910”

Alessandra Madetta | Publikigita: 2024-11-12 10:49:43

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) proponas ĉujare du tekstojn por la komuna legado de la 15-a de decembro, Zamenhofs Tago kaj Tago de la Esperanta Libro. Krom la rondiranta rakonto “Pri viroj kaj kunikiloj”, la ĉefa propono por 2024 estas la teatraĵo “1910”, kiu estas prezentita, kun granda sukceso, dum la UK en Montrealo en 2022. Ĝi estis filmita de Aleksio Miller kaj la filmo estas plene disponebla rete en la kanalo “Exploring Esperanto” de Aleksio Miller.

Ni intervjuis ĝian aŭtorinon, Ĵenja Amis, kiu ankaŭ planas publikigi libron pri ĝi en 2025.



## John Huang (Kanado)



*aŭtoro, John Huang*

### Turisma vojaĝo tra Tanzanio (5)

De la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2024, la 109-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) sukcese okazis en la bela urbo Aruŝo, Tanzanio. Ĉi tio estis la unua fojo en la historio de UK, kiam la kongreso okazis sur la afrika kontinento, kaj ankaŭ mia unua fojo paŝi sur ĉi tiun antikvan kaj misteran kontinenton. Mi havis la honoron esti la oficiala fotisto de la kongreso, kaj per mia fotilo mi kaptis multajn valorajn momentojn. Ĉi tiuj fotoj ne nur registris la ĝojplenan kunvenon de esperantistoj el la tuta mondo, sed ankaŭ atestis la unikan ĉarmon de Esperanto kiel ponto por internacia komunikado.

#### Neforgesebla Momento tra la Fotilo



La 2-an de aŭgusto 2024, unu tagon antaŭ la malfermo de la 109-a UK, ni atingis neforgeseblan momenton ĉe la fino de nia ekskurso en la Nacia Parko Serengeto en Tanzanio. Starante sur la vasta afrika savano, esperantistoj el diversaj landoj kunvenis flank-al-flanke, ridetante kun kontento kaj ĝojo. Sub la blua ĉielo kaj blankaj nuboj, ni levis flagojn kaj komunikis per la lingvo de amikeco — Esperanto. Ĉi tiu komuna foto ne nur kaptas niajn memorojn pri la mirinda migrado de diversaj sovaĝaj bestoj en Serengeto, sed ankaŭ atestas nian kortuŝon kaj respekton antaŭ la grandiozaj naturaj mirindaĵoj. Kiel la fotisto de ĉi tiu vojaĝo, mi premis la obturatoron por fiksi ĉi tiun valoran momenton, eterne konservante la belecon de la harmonio inter homoj, naturo, amikeco kaj lingvo.

## Tra la Tuta Mondo ĉiuj Estas Familianoj



Iom frue, ĉe la enirejo de la Ngorongoro-Naturezervejo en Tanzanio, mi kaptis varman kaj kortuŝan momenton: kvar esperantistoj Lee Mikyeong (Koreio), Chiza Serge (Kongo), Iris Lepert (Germanio) kaj Wolfgang Schwanzer (Germanio) staris ĝoje kune, ridetante al mia fotilo. Tio perfekte reflektis la etoson de "Tra la tuta

mondo, ĉiuj estas familio". Ĉi tiu foto, kune kun bildo de mi, en kiu mi tenis fotilon en ĵipveturilo en la Serengeta Nacia Parko, estis elektita por la kovrilo de la septembra numero de la revuo *Esperanto* en 2024. Mi sentas min tre honorata kaj fiera pro tio!

Ekde 2022, mi jam sinsekve dum tri jaroj servis kiel la oficiala fotisto de UK. En 2022, mi ĉeestis la UK-on en la bela franclingva urbo Montrealo, Kanado; en 2023, en la antikva urbo Torino, Italio; kaj en 2024, en la mirinda urbo Aruŝo, Tanzanio. En 2025, mi vojaĝos al la ĉeĥa urbo Brno, en Mezeŭropo, por denove servi kiel fotisto por la UK. Mi antaŭĝojas kapti pliajn neforgeseblajn momentojn por Esperantujo en la estonteco!

## La Fiero de la Burundaj Esperantistoj



La 3-an de aŭgusto 2024, estis la unua tago de la 109-a UK. Frumatene, grupo da junaj esperantistoj el Burunda Respubliko marŝis kaj kantis kun fiero kaj konfido, alte tenante sian nacian flagon. Iliaj vizaĝoj radiis je ĝojo kaj fiereco, dum la flago flirtis en la matena vento. La ruĝa, blanka kaj verda koloroj de la flago brilis hele sub la sunradioj.

Kvankam Burundo estas malgranda lando, ĝi havas rimarkindan ĉeeston en la Esperanto-movado, kun miloj da esperantistoj. Ĉi tiu atingo ne estus ebla sen la klopodoj de elstaraj pioniroj kiel J ĉanie Sabiyumva, estrarano de UEA. Li kaj aliaj dediĉis sin al la disvastigo de Esperanto en Burundo, edukante kaj inspirante grandan

nombron da entuziasmaj Esperanto-lernantoj kaj uzantoj. La amo kaj persisto de la burundanoj por Esperanto estas vere admirindaj.

## Kovrilaj Personoj de la Revuo *Esperanto*

Je la 3-a de aŭgusto, mi kaptis ĉi tiun junecan kaj energiplenan momenton dum la registriĝa tago de UK. Sur la foto vidiĝas tri junaj esperantistinoj el D.R. Kongo — Wandjo, Beloty kaj Djofina. Kiam ili ricevis siajn kongresajn materialojn, iliaj okuloj brilis pro ekscito kaj iliaj ridetoj reflektis la ĝojon kaj fieron partopreni en sia unua UK. Mi havis la plezuron babilu kun ili, kaj ili parolis tre flue en Esperanto, montrante elstaran lingvonivelon kaj bonegan lernokapablon.



Ĉi tiu foto ne nur kaptas junajn ridetojn, sed ankaŭ atestas la daŭrigon de la Esperanto-spirito inter la juna generacio kaj alportas varman kaj esperplenan etoson al la tuta kongreso. Ĝi ne nur prezentas la individuajn personecojn de tiuj junulinoj, sed ankaŭ simbolas la energion kaj vigecon de la juna generacio de esperantistoj sur la internacia scenejo. Ĝi estis elektita kiel la kovrilo de la septembra numero de la revuo *Esperanto* en 2024.



## Renkontiĝo trans la tempo



Dum la 109-a UK, la ĉina esperantisto Grando Zhang Wei kaj la hispana esperantistino Sandra Vives neatendite renkontiĝis post ses jaroj. En 2018, kiam Grando vojaĝis tra Hispanio, li renkontis malfacilaĵojn por atingi la ĉefurbon Madrido. Tiam estis Sandra, kiu etendis sian manon, kontaktis amikojn kaj certigis, ke Grando estu sekure veturigita ĝis Madrido. Ĉi tiu translimenira helpo ankoraŭ profunde restas en la koro de Grando. Nun, en Arusha, Tanzanio, ili renkontiĝis denove. Ili brakumis unu la alian kun larĝaj ridetoj, plenaj je ĝojo kaj sincereco. En tiu momento, la fluo de tempo kvazaŭ haltis, kaj la amikeco inter ili reviviĝis. Ĉi tiu foto estis elektita por esti publikigita en la retejo de UEA, en la rubriko UEA Facila de decembro 2024. Ĝi fariĝis bela simbolo de la amikeco inter esperantistoj, kiu transportas kulturojn, lingvojn kaj la pason de la tempo.

## Gvidantoj renkontiĝas: Kunlaboro kaj Vizio



La 4-an de aŭgusto 2024, la dua tago de la 109-a UK, post la malferma ceremonio, okazis la Movada Foiro. Ĉiu landa aŭ faka Esperanto-asocio havis sian propran budon por prezenti siajn agadojn kaj atingojn. Kiel prezidanto de la Nordamerika filio de la Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF), mi havis la honoron reprezenti IKEF ĉe sia budo. Mi kaptis gravan momenton per mia fotilo: la prezidanto de UEA Duncan Charters kaj la prezidanto de IKEF Ĉielismo Wang Tianyi premis la manojn antaŭ la budo de IKEF.

Tiu ĉi manpremo ne estis nur ĝentila saluto, sed ankaŭ simbolo de komuna vizio kaj engaĝiĝo por antaŭenigi internacian kunlaboron en la kampo de ekonomio pere de Esperanto. Ĝi transdonis klaran mesaĝon: Esperanto ne estas nur lingvo, sed ankaŭ ponto por kultura kaj komerca interrilatado. Ĉi tiu foto estis elektita por la unua numero de la revuo *Esperanto* en 2025, fariĝante simbolo de transfaka kunlaboro kaj komuna progreso, kaj ĝi konservas tiun historian momenton por la estonteco.

## La Espero de la Junaj Afrikaj Esperantistoj



Antaŭ la budo de IKEF, grupo da junaj tanzaniaj esperantistoj staras kun broŝuroj kaj informiloj en la manoj, iliaj vizaĝoj radias ĝojon kaj memfidon. Ili entuziasme montras siajn materialojn al la fotilo, esprimante sian amon kaj subtenon al la Esperanto-movado. Ĉielismo ĝoje rigardis ilin. Ĉi tiu bildo ne nur montras la neanstataŭigeblan rolon de la juna generacio en la disvastigado de Esperanto, sed



ankaŭ simbolas la viglan evoluon kaj la brilan estontecon de Esperanto sur la afrika kontinento.

## Esperanto kaj Svahilo: Similecoj laŭ Renato Corsetti



Dum la 109-a UK, la respektata antaŭa prezidanto de UEA, profesoro Renato Corsetti prezentis fascinan prelegon pri la simileco inter Esperanto kaj la svahila lingvo. En ĉi tiu multe atentata prelego, li kun profunda scio pri lingvistiko kaj sia alloga prelegmaniero, malkaŝis al la ĉeestantoj interesajn ligojn inter la strukturo, vortprovizo kaj esprimmaniero de la du lingvoj. Dum la prelego, li citis multajn ekzemplojn kaj analizis la komunajn inter la du lingvoj, esplorante la eblajn kialojn malantaŭ tiuj similecoj. Tio ne nur helpis la ĉeestantojn pli bone kompreni Esperanton, sed ankaŭ plifortigis ilian aprezon pri la diverseco kaj unikeco de la afrikaj lingvoj.

## Sincera Funebra Omaĝo al Moriwaki Yasumasa



Dum la kongreso, la konata japana esperantisto Moriwaki Yasumasa bedaŭrinde forpasis la 5-an de aŭgusto 2024. Kiel sekretario de la Kjuŝua Esperanto-Ligo, li multfoje partoprenis en Universalaj Kongresoj kaj dediĉis sian tutan vivon al la Esperanto-movado. Ĉi tiu foto, kiun mi kaptis unu tagon antaŭ lia forpaso, fariĝis eterna memoraĵo.

En la foto, sinjoro Moriwaki trankvile sidas en rulseĝo, kun esprimo paca kaj decidema. Lia profunda rigardo kvazaŭ reflektas la jarojn, kiujn li pasigis kun Esperanto. Li tenas en sia mano la kongresan materialan sakon, kaj lia simpla sporta jako esprimas lian sindonan spiriton kaj nevenkeblan volon. Poste mi eksciis, ke lia familio provis malrekomendi lian partoprenon en ĉi tiu kongreso, ĉar lia sanstato jam ne taŭgis por longdistanca vojaĝo. Tamen, li persistis ĉeesti, spite al sia fizika laceco kaj multaj malfacilaĵoj. Tiu sindediĉo kaj pasia amo al la Esperanto-movado profunde tuŝis min kaj ĉiujn esperantistojn, kiuj havis la honoron koni lin. Fakte, dum la fermo-ceremonio de la kongreso, ĉiuj partoprenantoj iam staris kaj silente omaĝis al li dum unu minuto.

Ĉi tiu foto ne estas nur bildo, sed ankaŭ profunda emocia omaĝo. Ĝi esprimas nian plej altan respekton al pioniro, kiu pasigis sian tutan vivon batalante por la Esperanto-idealo. Lia rakonto vivos eterne en niaj memoroj, inspiros generacion post generacio de esperantistoj, kaj instigos nin pluporti la noblan mision de disvastigado de paco kaj unueco.

## Ĝojo kaj Kultura Kunfandiĝo

La 109-a UK ne estis nur festo de lingvo, sed ankaŭ simfonio de diversaj kulturoj. Ĉi tie, esperantistoj el diversaj landoj per arto, danco kaj muziko prezentis siajn kulturajn tradiciojn, transformante la kongreson en viglan kaj buntan tutmondan kulturajn pentraĵon.



Junaj esperantistinoj el Burundo, inter ili Liesse kaj ŝiaj amikinoj, surhavis buntajn tradiciajn vestojn kaj prezentis plenenergian kanton kaj dancon dum la kongreso. Iliaj memfidaj ridetoj kaj gajaj dancaĵoj altigis la etoson de la evento ĝis sia kulmino, transdonante la unikan vigecon kaj varmecon de la afrika kulturo. Ĉiu movo de iliaj dancoj rakontis historion, kunfandante la tradicion kaj nuntempon de Afriko, kaj montrante la vivantan esencon de ĝia kulturo.



Dum la kulturaj eventoj de la kongreso, grupo da masajoj en tradiciaj vestoj paŝis sur la scenejoj kaj prezentis energiplenan spektaklon por festi la kongreson. Per sia unika danco kaj kantado, ili montris la kulturan memfidon kaj pasion de la masaja popolo, tuj ekbruligante la etoson de la evento. Ili portis buntajn vestojn, ĉefe en ruĝaj kaj bluaj nuancoj, ornamitajn per delikataj tradiciaj ornamaĵoj, kiuj esprimis la profundan kulturon kaj tradicion de la masajoj. La ĉeestantaj esperantistoj rigardis la mirindan prezentadon kun plena atento, kun ĝojaj ridetoj sur la vizaĝoj. Multaj el ili elprenis siajn fotilojn aŭ poŝtelefonojn por kapti tiun belan momenton, fiksante la interŝanĝon de kulturo kaj amikeco en eterna bildo.



La ĉina delegacio prezentis al la kongreso mane pentritan longan volvbildon pri la Silka Vojo, kiu simbolas la interkulturajn interŝanĝojn inter Ĉinio kaj aliaj landoj. Ĉi tiu volvbildo estis malrapide malfaldita de la reprezentantoj, montrante la historian pejzaĝon de la Silka Vojo kaj prezentante la gloron de jarmila kulturo antaŭ la ĉeestantoj. Tanzaniaj oficialuloj kune kun membroj de la ĉina delegacio, inkluzive de Ĉielismo Wang kaj Chen Ji, prezentis ĉi tiun artaĵon, gajnante varmajn aplaŭdojn de la tuta kongresejo.



La esperantistino Ilia el Indonezio prezentis kanton sur la scenejo, kortuŝante ĉiun ĉeestanton per sia profunda kaj emociplena voĉo. Ilia estas aktiva esperantistino, kaj ŝia kantado estas varma kaj penetra, lerte kunigante muzikon kaj Esperanton por transdoni mesaĝon de paco kaj espero. La milda kaj kortuŝa gitarakompano perfekte harmoniis kun ŝia voĉo.



La ĉinaj esperantistoj Kong Lei kaj Zhang Mingying prezentis elegantan tajĝjiĉjūanon sur la scenejo. Ili surhavis tradiciajn tajĝjiĉjūanajn vestojn, kaj iliaj movoj estis fluaj kaj serenaj, kombinante forton kaj molon, kvazaŭ ili rakontus per korpa lingvo la ekvilibron kaj harmonion de orienta filozofio. Dum la prezento, la spektantaro spirretene kaj atente observis, sentante la profundan signifon malantaŭ ĉiu movo.



La koreaj esperantistinoj Lee Youngran (dekstre, flava) kaj Li Hyonsuk (maldekstre, blanka) surhavis belegajn tradiciajn kostumojn kaj prezentis ĉarman tradician dancon. La dancistinoj tenis silkajn rubandojn kaj moviĝis gracie laŭ la muziko. La brilkoloraj vestoj, flirtante dum la danco, kreis spektaklon de fluanta arto. Ĉiu movo estis plena de forto kaj eleganteco, perfekte montrante la unikan ĉarmon de la korea tradicia kulturo.

## Eterna Momento: Komuna Foto



Ĉiun jaron, dum la UK, mi fotas komunan foton de la partoprenantoj. Ĉi tio estas la tria sinsekva jaro, kiam mi ricevis la honoran taskon fari ĉi tiun foton; la antaŭaj okazis en Montrealo, Kanado en 2022, kaj Torino, Italio en 2023.

En ĉi tiu momento, la fotilo ne nur kaptas la ĉeestantajn esperantistojn el ĉiuj anguloj de la mondo, sed ankaŭ enkorpiĝas la komunan strebon al unueco, paco kaj espero, kiuj ekzistas en ĉies koro. En la foto, ni povas vidi reprezentantojn el diversaj landoj, kiuj kolektiĝis por rideti al mia fotilo kaj saluti unu la alian. Sur iliaj vizaĝoj reflektiĝas fiereco kaj ĝojo. Kvankam iliaj vestaĵoj, kulturoj kaj lingvaj fonoj estas malsamaj, en ĉi tiu momento ili ĉiuj formas unu grandan familion — Esperantujo. En la foto troviĝas la saĝo de pli aĝaj generacioj, la energio de junuloj kaj la senkulpa rido de infanoj. Ĉiu detalo rakontas historion pri la interkompreno inter kulturoj kaj koroj. Sur la ekrano super la grupo legeblas la vortoj: **"Havu fruktodonan kongreson en Aruŝo!"**, kio aldonas specialan signifon al ĉi tiu renkontiĝo.

Ĉi tiu komuna foto ne nur kaptas grandiozan momenton, sed ankaŭ estos vaste dividita en Esperantujo, aperante en revuoj, retejoj kaj sociaj retoj. Ĝi fariĝos simbolo, kiu inspiros pli da homoj aliĝi al la granda Esperanto-familio. Ĝi ne estas nur bildo, sed ankaŭ daŭrigo de spirito kaj promeso por estonteco plena je unueco kaj paco.

## Familia Amo kaj Esperanto: Bildo de Espero



Ĉi tiu esperantistino el Burundo nomiĝas Nimpagaritse Donavine. Ŝi estas la edzino de la estrarano de UEA J'émie Sabiyumva. Mi kaptis varman familian momenton dum la kongreso, kiam ŝi pozis kun sia juna filo, Sabiyumva Johnelie Jeredo. Ĉi tiu foto transdonas la profundan ligon inter familio kaj Esperanto.

En la foto, ŝi rigardas la fotilon kun firma kaj milda esprimo, dum la infano en ŝia brakumo trankvile rigardas la objektivon per siaj scivolemaj kaj puraj okuloj. Ĉi tiu sceno, en la bruo kaj vicleco de la kongresejo, elstaras pro sia varmo kaj kortuŝeco. Eble ĉi tiu infano ankoraŭ ne komprenas la signifon de Esperanto, sed li jam fariĝis



unu el la plej junaj partoprenantoj de ĉi tiu granda evento. Lia ĉeesto simbolas la esperon pri la estonteco de Esperanto kaj atestas, ke Esperanto ne estas nur ilo por lingva komunikado, sed ankaŭ ponto por spirita transdono tra generacioj.

## La kultura heredaĵo de la aŭkcio



Dum la kongreso okazis speciala aŭkcio de esperantaj historiaj objektoj, libroj kaj artaĵoj, kiu sukcese altiris la atenton de multaj partoprenantoj, montrante la diversecon kaj riĉecon de la Esperanto-kulturo. Ĉi tio ne estis nur simpla aŭkcia evento, sed ankaŭ festo de kultura heredaĵo kaj emocia interŝanĝo inter esperantistoj.

La aŭkciestro estis la itala esperantisto Michael Boris Mandirola. Kiel la gvidanto de la aŭkcio, li ĉiujare dum la UK alportas vivon al ĉiu el la objektoj per sia elokventa kaj karisma parolado. Kun malgranda ligna martelo en sia mano, rideto sur la lipoj kaj forta, alloga voĉo, li en detalo prezentas la historian fonon kaj kulturan valoron de ĉiu objekto per flua Esperanto. Per sprita kaj humura lingvaĵo, li kreas viglan etoson kaj kaptas la atenton de ĉiuj ĉeestantoj. La objektoj en ĉi tiu aŭkcio estis tre diversaj: raraj esperantaj libroj, historiaj fotoj, artverkoj kaj eĉ limigitaj memorindaĵoj kun granda historia valoro. Ĉiu objekto rakontas sian propran historion, ligante esperantistojn el malsamaj landoj kaj kulturaj fonoj.

Sub la gvido de Michael, la aŭkcia etoso estis plena je energio kaj amikeco. Proponantoj alte levis siajn manojn, konkure ofertante, tamen en etoso plena je respekto kaj kuneco. Ĉiufoje kiam objekto estis sukcese aŭkciita, la salono eksplodis per varmaj aplaŭdoj. Tio ne estis nur gratulo al la nova posedanto de la objekto, sed ankaŭ esprimo de respekto al la kultura heredaĵo, kiun ĉi tiu aŭkcio reprezentas.

## Fermoceremonio: Komuna Kantado de *La Espero*



Dum la fermoceremonio, ĉiuj partoprenantoj de la kongreso unuvoĉe kantis *La Espero*, kaj la kantado resonis super la kongresejo, simbolante esperon, unuecon kaj pli belan estontecon. Ĉi tio ne estis nur kanto, sed ankaŭ spirita ligilo, kiu transpasas landlimojn kaj kulturojn, firme unuigante partoprenantojn el la tuta mondo.

*La Espero* estas la oficiala himno de la Esperanto-movado kaj simbolo de la spirita idealo de ĉiuj esperantistoj. La vortoj estis verkitaj de la fondinto de Esperanto, d-ro Ludoviko Zamenhof, kaj la muziko estis komponita de F. ĉicien Menu de M. ĉnil.

En ĉi tiu kortuŝa sceno, la reprezentantoj staris respektplene kaj solene ĉe siaj lokoj, kantante el la koro. Sur iliaj vizaĝoj speguligis pasio kaj dediĉo; iuj fermis siajn okulojn, plene mergiĝante en la etoso de la kanto, dum aliaj rigardis antaŭen kun emociaj briletoj en siaj okuloj. De ĉiuj aĝoj kaj etnoj, esperantistoj kuniĝis en harmonia kaj firma voĉo, transformante la kongresejon en simbolon de unueco kaj paco.

La 109-a UK ne estis nur festo de lingvo kaj kulturo, sed ankaŭ renkontiĝo plena de memoroj, emocioj kaj espero. Ĉiu foto, ĉiu momento estis ponto konstruita per la koroj de esperantistoj, ligante ĉiujn angulojn de ĉi tiu mondo.

Dankon al ĉiuj partoprenantoj. Ni kune antaŭĝojas la venontan renkontiĝon!

**(Fino)**